

EL *Popola*  
**ĈINIO**

N-ro 6.

NOVEMBRO 1966





## CITITAJ VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ

“Post kiam la malamikoj kun armiloj estos ekstermitaj, restos ankoraŭ malamikoj sen armiloj; ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni; ni devas nepre ne subtaksi tiujn ĉi malamikojn. Se ni ne tiel elmetas kaj ekkonas la problemon nun, ni faros grandegan eraron.”

— *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra  
Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*





Kamarado Maŭ Zedong en la 11-a Plena Sesio de la  
8-a Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio

# Decido de la Centra Komitato Ĉinio Koncerne al la Granda

(Aprobata en la 8-a

*La vastaj revoluciaj amasoj de Ŝanhajo varmege celebras la okazigon de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio kaj esprimas al la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ sian decidon firme konduki la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino.*





# de Komunista Partio de Proleta Kultura Revolucio

(1<sup>o</sup> de Aŭgusto, 1966)

## 1

### NOVA STADIO EN LA SOCIALISMA REVOLUCIO

La granda proleta kultura revolucio nun disvolviĝanta estas granda revolucio, kiu tuŝas la animon de homoj kaj formas novan pli profundan kaj pli vastan stadion en disvolviĝo de la socialisma revolucio en nia lando.

En la Dekaj Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, kamarado Maŭ Zedong diris: Por renversi politikan potencon estas ĉiam necese, unue, krei publikan opinion, fari laboron en la ideologia sfero. Tiel agas la revolucia klaso kiel ankaŭ la kontraŭrevolucia klaso. Praktiko pruvis, ke tiu tezo de kamarado Maŭ Zedong estas tute korekta.

Kvankam la burĝaro estas jam renversita, tamen ĝi ankoraŭ provas korupti la amasojn kaj konkeri ilian menson per la malnovaj ideoj, kulturo, moroj kaj kutimoj de la ekspluataj klasoj, strebante al sia celo de restariĝo. La proletaro devas fari ĝuste la malon — doni fortan baton al ĉiu provoko de la burĝaro en la ideologia kampo, kaj uzi la novajn ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn de la proletaro por ŝanĝi la spiritan fizionomion de la tuta socio. Nuntempe nia celo estas

batali kontraŭ la kapitalisman vojon irantaj personoj en potenco ĝis ilia kolapsiĝo, kritiki la reakciajn burĝajn akademiajn “aŭtoritatulojn”, kritiki la ideologion de la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj kaj reformi edukadon, literaturon kaj arton kaj ĉiujn aliajn partojn de la superstrukturo, kiuj ne respondas al la socialisma ekonomia bazo, por faciligi la firmigon kaj disvolvadon de la socialisma sistemo.

## 2

### LA ĈEFA FLUO KAJ ZIGZAGOJ

La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj, revoluciaj intelektuloj kaj revoluciaj kadroj formas la ĉefan forton de tiu ĉi granda kultura revolucio. Grandaj nombroj da revoluciaj gejunuloj, antaŭe nekonataj, fariĝis bravaj kaj aŭdacaj pioniroj. Ili estas kuraĝaj kaj inteligentaj en agado. Uzante la formojn de opini-afiŝoj kaj grandaj debatoj, ili plene eldiras siajn opiniojn, malkovras kaj kritikas ĉiujn malbonojn, kaj decideme faras atakojn kontraŭ la malkaŝaj kaj kaŝaj reprezentantoj de la burĝaro. En tiel granda revolucia movado, ili neeviteble havas tiajn aŭ aliajn mankojn, sed ilia ĉefa revolucia direkto estas ĉiam ĝusta. Tio estas la ĉefa fluo de la granda proleta kultura revolucio. Ĝuste laŭ tiu ĉi ĉefa direkto la granda

proleta kultura revolucio nun kontinue marŝas antaŭen.

Ĉar la kultura revolucio estas revolucio, do neeviteble ĝi renkontas reziston. La rezisto venas ĉefe de tiuj personoj en potenco, kiuj ŝteligis en la Partion kaj iras la kapitalisman vojon. Ĝi venas ankaŭ de la malnova forto de kutimo en socio. Nuntempe, tiu rezisto restas ankoraŭ sufiĉe forta kaj obstina. Tamen, la granda proleta kultura revolucio, malgraŭ ĉio, estas ĝenerala tendenco nerezistebla. Abundaj faktoj montras, ke tiu ĉi rezisto estos tuj frakasita, se la amasoj nur estos plene mobilizitaj.

Ĉar la rezisto estas sufiĉe forta, okazos returniĝo kaj probable eĉ ripetadaj returniĝoj en tiu luktado. Estas nenia malutilo en tio. Tio hardos la proletaron kaj aliajn laborantajn amasojn, precipe la junan generacion. Ili ricevos el tio spertojn kaj lecionojn, kaj ekkomprenos ke la revolucia vojo estas zigzaga kaj malebena.

### METI "KURAĜON" SUPER ĈIO ALIA KAJ SENREZERVE MOBILIZI LA AMASOJN

Ĉu la gvidantoj de la Partio kuraĝas aŭ ne mobilizi senrezerve la amasojn, tio decidos la sorton de tiu granda kultura revolucio.

Troviĝas nun kvar malsamaj situacioj en gvidado de la movado de kultura revolucio fare de diversnivelaj organizoj de la Partio:


(1) La respondeculoj de la partiaj organizoj povas stari sur la plej antaŭa loko de la movado kaj kuraĝas mobilizi senrezerve la amasojn. Ili estas komunismaj batalantoj kaj bonaj lernantoj de Prezidanto Maŭ, kiuj metas "kuraĝon" super ĉio alia kaj timas nenion. Ili pledas por opini-afiŝoj kaj grandaj debatoj, kuraĝigas la amasojn malkaŝi ĉiujn demonojn kaj diablojn kaj samtempe ankaŭ kuraĝigas amasojn kritiki iliajn difektojn kaj erarojn en la laboro.

*Lernantinoj de la Unua Knabina Mezlernejo de Pekino, kiuj skribis al la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ por proponi la reformon de la malnova eduka sistemo, lernas kun ekscitiĝo kaj emocio la Decidon de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio pri la granda proleta kultura revolucio.*





*La revoluciaj amasoj de la ĉefurbo varmege celebras sur Tian-anmen-Placo la fermigon de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio kaj huraas al ĝia Decido pri la granda proleta kultura revolucio.*



## KOREKTOJ

- p. 367, dekstra kolono, l. 10: Legu "inter revolucio kaj kontraŭrevolucio" anstataŭ "inter revoluciuloj kaj kontraŭrevoluciuloj".  
 P. 393, l. 1: Legu "Pariza" anstataŭ "Paiza".

Tiu korekta gvido rezultas el tio, ke ili elstarigas la proletan politikon kaj metas la penson de Maŭ Zedong en la gvidan lokon antaŭ ĉio.

(2) En multaj organizoj, la respondeculoj havas ankoraŭ tute ne bonan komprenon pri la gvido de tiu granda batalo, gvidas ĝin tute ne serioze kaj tute ne efike, kaj tial trovas sin nekapablaj kaj en malforta pozicio. Metante "timon" super ĉio alia, firme alkroĉitaj al malnovaj manieroj ili ne volas rompi la rutinajn regulojn kaj ne strebas al antaŭeniĝo. Ili sentas abruptecon antaŭ la nova revolucia ordo de la amasoj, tiel ke ilia gvidado postrestas post la situacio kaj la amasoj.

(3) En iuj organizoj la respondeculoj, kiuj faris tiajn aŭ aliajn erarojn en la pasinto, des pli metas "timon" super ĉio alia, ili timas la amasojn kapti ilin je la vunda loko. En efektiveco, se ili nur faras serioze memkritikon kaj akceptas kritikojn de la amasoj, ili trovos indulgon ĉe la Partio kaj la amasoj. Se ili ne tiel faras, ili plue faros erarojn kaj fariĝos obstakloj al la amasa movado.

(4) Iuj organizoj estas regataj de tiuj personoj en potenco, kiuj ŝteliĝis en la Partion kaj iras la kapitalisman vojon. Tiuj personoj en potenco ekstreme timas la amasojn malkaŝi ilin, kaj tial serĉas

diversajn pretekstojn por subpremi la amasan movadon. Adoptante taktikojn turni la celon de atako kaj inversigi nigron en blankon, ili provas konduki la movadon al malĝusta direkto. Kiam ili sentas sin tre izolitaj kaj ne povas plu teni sin kiel antaŭe, ili provas ankoraŭ sin turni al intrigoj, kaŝpafi aliulon de post la dorso, fabriki onidirojn kaj fari ĉion eblan por konfuzi la diferencojn inter revolucioj kaj kontraŭrevolucioj, por ataki la revoluciulojn.

Tio, kion la Centra Komitato de la Partio postulas de diversnivelaj partiaj komitatoj, estas persisti ĉe la korekta gvidado, meti "kuraĝon" super ĉio alia, senrezerve mobilizi la amasojn, ŝanĝi la staton de malforteco kaj senkapableco, kuraĝigi tiujn kamaradojn, kiuj faris erarojn kaj volas korekti ilin, al formeto de siaj mensaj ŝarĝoj kaj partopreno en la batalo, eksigi la personojn en potenco, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj revenigi la gvidantecon en la manojn de la proletaj revoluciuloj.

## 4

### LASU LA AMASOJN EDUKI SIN MEM EN LA MOVADO

La granda proleta kultura revolucio povas esti nur liberigo de la amasoj per si mem, ne estas uzebla ajna metodo por fari aferojn anstataŭ ili.

proleta kultura revolucio nun kontinue marŝas antaŭen.

Ĉar la kultura revolucio estas revolucio, do neeviteble ĝi renkontas reziston. La rezisto venas ĉefe de tiuj personoj en potenco, kiuj ŝteliĝis en la Partion kaj iras la kapitalisman vojon. Ĝi venas ankaŭ de la malnova forto de kutimo en socio. Nuntempe, tiu rezisto restas ankoraŭ sufiĉe forta kaj obstina. Tamen, la granda proleta kultura revolucio, malgraŭ ĉio, estas ĝenerala tendenco nerezistebla. Abundaj faktoj montras, ke tiu ĉi rezisto estos tuj frakasita, se la amasoj nur estos plene mobilizitaj.

Ĉar la rezisto estas sufiĉe forta, okazos returniĝo kaj probable eĉ ripetadaj returniĝoj en tiu luktado. Estas nenia malutilo en tio. Tio hardos la proletaron kaj aliajn laborantajn amasojn, precipe la junan generacion. Ili ricevos el tio spertojn kaj lecionojn, kaj ekkomprenos ke la revolucia vojo estas zigzaga kaj malebena.

### METI "KURAĜON" SUPER ĈIO ALIA KAJ SENREZERVE MOBILIZI LA AMASOJN

Ĉu la gvidantoj de la Partio kuraĝas aŭ ne mobilizi senrezerve la amasojn, tio decidos la sorton de tiu granda kultura revolucio.

Troviĝas nun kvar malsamaj situacioj en gvidado de la movado de kultura revolucio fare de diversnivelaj organizoj de la Partio:

(1) La respondeculoj de la partiaj organizoj povas stari sur la plej antaŭa loko de la movado kaj kuraĝas mobilizi senrezerve la amasojn. Ili estas komunismaj batalantoj kaj bonaj lernantoj de Prezidanto Maŭ, kiuj metas "kuraĝon" super ĉio alia kaj timas nenion. Ili pledas por opini-afiŝoj kaj grandaj debatoj, kuraĝigas la amasojn malkaŝi ĉiujn demonojn kaj diablojn kaj samtempe ankaŭ kuraĝigas amasojn kritiki iliajn difektojn kaj erarojn en la laboro.

*Lernantinoj de la Unua Knabina Mezlernejo de Pekino, kiuj skribis al la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ por proponi la reformon de la malnova eduka sistemo, lernas kun ekscitiĝo kaj emocio la Decidon de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio pri la granda proleta kultura revolucio.*





*La revoluciaj amasoj de la ĉefurbo varmege celebras sur Tian-anmen-Placo la fermigon de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio kaj huraas al ĝia Decido pri la granda proleta kultura revolucio.*



Tiu korekta gvido rezultas el tio, ke ili elstarigas la proletan politikon kaj metas la penson de Maŭ Zedong en la gvidan lokon antaŭ ĉio.

(2) En multaj organizoj, la respondeculoj havas ankoraŭ tute ne bonan komprenon pri la gvido de tiu granda batalo, gvidas ĝin tute ne serioze kaj tute ne efike, kaj tial trovas sin nekapablaj kaj en malforta pozicio. Metante "timon" super ĉio alia, firme alkroĉitaj al malnovaj manieroj ili ne volas rompi la rutinajn regulojn kaj ne strebas al antaŭeniĝo. Ili sentas abruptecon antaŭ la nova revolucia ordo de la amasoj, tiel ke ilia gvidado postrestas post la situacio kaj la amasoj.

(3) En iuj organizoj la respondeculoj, kiuj faris tiajn aŭ aliajn erarojn en la pasinto, des pli metas "timon" super ĉio alia, ili timas la amasojn kapti ilin je la vunda loko. En efektiveco, se ili nur faras serioze memkritikon kaj akceptas kritikojn de la amasoj, ili trovos indulgon ĉe la Partio kaj la amasoj. Se ili ne tiel faras, ili plue faros erarojn kaj fariĝos obstakloj al la amasa movado.

(4) Iuj organizoj estas regataj de tiuj personoj en potenco, kiuj ŝteliĝis en la Partion kaj iras la kapitalisman vojon. Tiuj personoj en potenco ekstreme timas la amasojn malkaŝi ilin, kaj tial serĉas

diversajn pretekstojn por subpremi la amasan movadon. Adoptante taktikojn turni la celon de atako kaj inversigi nigron en blankon, ili provas konduki la movadon al malĝusta direkto. Kiam ili sentas sin tre izolitaj kaj ne povas plu teni sin kiel antaŭe, ili provas ankoraŭ sin turni al intrigoj, kaŝpafi aliulon de post la dorso, fabriki onidirojn kaj fari ĉion eblan por konfuzi la diferencojn inter revoluciuloj kaj kontraŭ-revoluciuloj, por ataki la revoluciulojn.

Tio, kion la Centra Komitato de la Partio postulas de diversnivelaj partiaj komitatoj, estas persisti ĉe la korekta gvidado, meti "kuraĝon" super ĉio alia, senrezerve mobilizi la amasojn, ŝanĝi la staton de malforteco kaj senkapableco, kuraĝigi tiujn kamaradojn, kiuj faris erarojn kaj volas korekti ilin, al formeto de siaj mensaj ŝarĝoj kaj partopreno en la batalo, eksigi la personojn en potenco, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj revenigi la gvidantecon en la manojn de la proletaj revoluciuloj.

#### 4

### LASU LA AMASOJN EDUKI SIN MEM EN LA MOVADO

La granda proleta kultura revolucio povas esti nur liberigo de la amasoj per si mem, ne estas uzbla ajna metodo por fari aferojn anstataŭ ili.

Fidu la amasojn, sinapogu sur ili kaj respektu ilian iniciativon. Formetu "timon", kaj ne timu malordon. Prezidanto Maŭ ofte diras al ni, ke revolucio ne povas esti en maniero tiel rafinita, tiel ĝentila, tiel milda, bonkora, afabla, ŝparema kaj rezignacia. Lasu la amasojn eduki sin mem en tiu granda revolucia movado por distingi, kio estas prava kaj kio malprava, kia agmaniero estas ĝusta kaj kia malĝusta.

Plene uzu la formojn de opini-afiŝoj kaj grandaj debatoj por plejeble eldirigi ĉiujn opiniojn, tiel ke la amasoj povas klarigi la korektajn vidpunktojn, kritiki la malkorektajn opiniojn kaj senmaskigi ĉiujn diablojn kaj demonojn. Nur tiamaniere, la vastaj amasoj povos plialtigi sian konscion dum la batalo, kreskigi sian kapablon kaj talenton, distingi pravon de malpravo, kaj diferencigi la malamikon de ni mem.

## 5

### FIRME SEKVI LA KLASAN LINION DE LA PARTIO

Kiuj estas niaj malamikoj? Kiuj estas niaj amikoj? Tio estas problemo de unua graveco por revolucio, kaj ankaŭ por la granda kultura revolucio.

Partiaj gvidantoj devas esti kapablaj trovi maldekstrulojn, disvolvi kaj fortigi

la vicojn de maldekstruloj kaj firme sin apogi sur la revoluciaj maldekstruloj. Nur tiamaniere, ni povos en la movado ĝisfunde izoli la plej reakciajn dekstrulojn, gajni la mezajn elementojn kaj unuigi kun la plejmulto, tiel ke post la movado ni fine atingos unuigon kun pli ol 95 procentoj de la kadroj kaj pli ol 95 procentoj de la amasoj.

Koncentru ĉiujn fortojn por bati plenanon da ekstreme reakciaj burĝaj dekstruloj kaj kontraŭrevoluciaj reviziistoj, plene malkaŝu kaj kritiku iliajn krimojn kontraŭ la Partio, kontraŭ socialismo kaj kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, por maksimume izoli ilin.

La ĉefa objekto de tiu ĉi movado estas tiuj personoj en potenco en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon.

Atentu pri strikta distingo inter la kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj dekstruloj kaj tiuj, kiuj subtenas la Partion kaj socialismon, sed diris aŭ faris ion eraran aŭ skribis iujn malbonajn artikolojn aŭ malbonajn verkojn.

Atentu pri strikta distingo inter la reakciaj burĝaj kleruldespotoj kaj "aŭtoritatuloj" unuflanke kaj tiuj, kiuj havas ordinarajn burĝajn akademiasajn ideojn aliflanke.

*Komandantoj kaj batalantoj de "Pionira Ŝipo sur Maro" de la ĉina mar-armeo serioze studas la Decidon de la Centra Komitato de la Partio pri la granda proletaj kultura revolucio.*







*Ruĝaj gvardianoj kaj vastaj amasoj de revolucia instruistoj kaj lernanto de la famekonata revolucia urbo Zunji propagandas antaŭ la kunveno de la Zunji-Kunveno la Decidon de la Centra Komitato de la Partio.*

## 6

### ĜUSTE TRAKTI KONTRAŬDIROJN INTERNE DE LA POPOLO

Estas necese fari striktan distingon inter la du malsamaj tipoj de kontraŭdiroj: ĉu tiuj interne de la popolo aŭ tiuj inter la malamiko kaj ni mem? Ne traktu kontraŭdirojn interne de la popolo kiel tiujn inter la malamiko kaj ni mem, nek prenu kontraŭdirojn inter la malamiko kaj ni mem kiel tiujn interne de la popolo.

Estas normale, ke inter la popolamasoj ekzistas malsamaj opinioj. Kaj disputoj inter malsamaj opinioj estas neeviteblaj, necesaj kaj utilaj. En normala kaj plene disvolvita debato, la amasoj rekonos tion, kio estas ĝusta, korektos tion, kio estas erara, kaj iom post iom venos al unuanimeco.

La metodo, kiun oni devas uzi en debatoj, estas prezenti faktojn, argumenti racie kaj konvinki la aliajn per rezonado. Ne estas permesate uzi ian ajn metodon

de subpremo kontraŭ malplimulto, kiu havas malsamajn opiniojn. Oni devas protekti la malplimulton, ĉar iafoje la vero estas ĉe la malplimulto. Eĉ se la opinioj de la malplimulto estas eraraj, devas esti ankoraŭ permesite al ĝi argumenti kaj rezervi siajn opiniojn.

Kiam okazas debato, ĝi devas esti farata per rezonado, sed ne per forto.

Dum debato ĉiu revoluciulo devas bone pripensi memstare kaj disvolvi la komunisman spiriton: kuraĝe pensi, kuraĝe paroli kaj kuraĝe agi. Sub la premo de sameco en ĉefa direkto, revoluciaj kamaradoj devas eviti senfinan disputadon pri negravaj problemoj por fortigi unuiĝon.

## 7


### GARDU KONTRAŬ TIO KE IUJ ATAKAS LA REVOLUCIAJN AMASOJN KIEL "KONTRAŬREVOLUCIULOJN"

Respondeculoj de iuj lernejoj, organizoj kaj laborgrupoj de la kultura revolucio

organizas kontraŭatakojn kontraŭ la amasoj, kiuj skribis opini-afiŝojn pri ili, kaj eĉ elmetas tiajn sloganojn kia: opono kontraŭ la gvidantoj de koncerna organizo aŭ laborgrupo signifas oponon kontraŭ la Centra Komitato de la Partio, signifas oponon kontraŭ la Partio kaj socialismo, kaj signifas kontraŭrevolucion. En tia agmaniero, iliaj frapoj neeviteble falos sur iujn verajn revoluciajn aktivulojn. Tio estas eraro de direkto kaj eraro de linio, kaj tiel agi estas absolute nepermeseble.

Iuj personoj kun seriozaj ideologiaj eraroj, kaj precipe iuj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj dekstruloj, profitante iujn mankojn kaj erarojn en la amasa movado, disvastigas onidirojn kaj klaĉojn, faras agitadon, kaj intence atakas iujn el la amasoj kiel "kontraŭrevoluciulojn". Estas necese gardi kontraŭ tiaj poŝtelistoj kaj ĝustatempe malkaŝi iliajn artifikojn.

Dum la movado, devas esti punataj laŭ la leĝo nur la kontraŭrevoluciuloj en agado kun efektiva pruvo de krimoj kiaj: murdo, incendiigo, venenado, detruado kaj ŝtelo de ŝtataj sekretoj. Neniun paŝon oni alprenu kontraŭ studentoj aŭ lernantoj de universitatoj, kolegioj, mezlernejoj kaj elementaj lernejoj, pro problemoj leviĝintaj en la movado. Por preventi forturnon de la batalo for de ĝia ĉefa objekto, estas malpermesite uzi ĉian ajn pretekston por inciti la amasojn aŭ la lernantojn al interbatalo unuj kontraŭ aliaj. Eĉ pri pruvitaj dekstruloj oni ankaŭ devas pritrakti laŭ iliaj kulpoj nur en posta stadio de la movado.



*Ruĝaj gvardianoj de Ŝanhajo entuziasme propagandas sur Nankina Strato la Decidon de la Centra Komitato de la Partio pri la granda proleta kultura revolucio.*

## 8

### LA PROBLEMO DE KADROJ

La kadroj povas esti proksimume dividitaj en la jenajn kvar kategoriojn:

- (1) bonaj;
- (2) kompare bonaj;
- (3) tiuj, kiuj faris seriozajn erarojn, sed ankoraŭ ne estas kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj dekstruloj;
- (4) malgranda nombro da dekstruloj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj.

Ordinare, la unuaj du kategorioj (de bonaj kaj kompare bonaj) estas en granda plimulto.



La kontraŭpartiajn, kontraŭsocialismajn dekstrulojn oni devas plene malkovri kaj kontraŭbatali ĝis ili estos faligitaj, kolapsigitaj kaj senkreditigitaj kaj iliaj influoj eliminitaj. En la sama tempo, oni devas doni al ili eliron por ke ili povu komencian novan vivon.

## 9

### **KULTURAJ REVOLUCIAJ GRUPOJ, KOMITATOJ KAJ KONGRESOJ**


Multaj novaj aferoj komencis aperi en la granda proleta kultura revolucio. La kulturaj revoluciaj grupoj, komitatoj kaj aliaj organizaj formoj, kreitaj de la amasoj en multaj lernejoj kaj organizoj, estas novaj aferoj kiuj havas grandan historian signifon.

La kulturaj revoluciaj grupoj, komitatoj kaj kongresoj estas bonegaj novaj organizaj formoj, en kiuj la amasoj edukas sin mem sub la gvido de la Komunista Partio. Ili estas bonegaj pontoj por teni nian Partion en intima kontakto kun la amasoj. Ili estas organoj de povo de la proleta kultura revolucio.

La batalo de la proletaro kontraŭ la malnovaj ideoj, kulturo, moroj kaj kutimoj, postlasitaj de ĉiuj ekspluatitaj klasoj dum miloj da jaroj, daŭros necese tre, tre longan tempon. Tial, la kulturaj revoluciaj grupoj, komitatoj kaj kongresoj ne devas esti provizoraj organizoj, sed longdaŭraj, konstantaj amasaj organizoj. Ili ne nur konvenas por lernejoj kaj institucioj, sed ĝenerale ankaŭ por fabrikoj, minejoj, aliaj entreprenoj, urbaj kvartaloj kaj vilaĝoj.

Estas necese praktiki la sistemon de ĝeneralaj elektoj, laŭ tiu de la Pariza Komunumo, por elekti membrojn de la kulturaj revoluciaj grupoj kaj komitatoj kaj reprezentantojn al la kulturaj revoluciaj kongresoj. La listoj de kandidatoj devas esti elmetitaj de la revoluciaj amasoj post plena diskutado, kaj la elektadoj devas esti faritaj post kiam la listoj estas ripetade diskutitaj de la amasoj.

La amasoj rajtas iam ajn kritiki membrojn de la kulturaj revoluciaj grupoj kaj komitatoj kaj reprezentantojn elektitajn al la kulturaj revoluciaj kongresoj. Se tiuj membroj aŭ reprezentantoj pruviĝas nekompetentaj,



*Amaso de Hefej, Anhuj-provinco, aĉetas kun ĝojo ĵurnalojn, en kiuj estas publikigita la Decido de la Centra Komitato de la Partio.*

ili povas esti anstataŭgataj per elekto de novaj aŭ revokitaj de la amasoj post diskutado.

La kulturaj revoluciaj grupoj, komitatoj kaj kongresoj en lernejoj devas konsisti ĉefe el revoluciaj studentoj, samtempe ili devas enhavi certan nombron da reprezentantoj de la revoluciaj instruistoj, oficistoj kaj laboristoj.

## 10

### EDUKA REFORMO

Reformo de la malnova eduka sistemo, reformo de la malnovaj principoj kaj metodoj de instruado estas ekstreme grava tasko de la granda proleta kultura revolucio.

En tiu ĉi granda kultura revolucio estas necese komplete ŝanĝi la staton de regado de burĝaj intelektuloj super niaj lernejoj.

En ĉiu speco de lernejo estas necese plene efektiviĝi kaj praktiki la principon de eduko en servo al proleta politiko kaj eduko en kombiniĝo kun produkta laboro, elmetitan de kamarado Maŭ Zedong, por ke la edukatoj disvolviĝu kiel morale, tiel

ankaŭ intelekto kaj korpe, kaj fariĝu laboruloj kun socialisma konscio kaj klereco.

La lernotempo devas esti mallongigita. La kursoj devas esti pli bonaj kaj malplimultaj. La instrumaterialo devas esti ĝisfunde reformita, en iuj kazoj oni devas unue simpligi la komplikajn. Kun studo kiel sia ĉefa tasko, la lernantoj devas lerni ankaŭ aliajn aferojn. Tio estas, aldone al siaj studoj, ili devas lerni ankaŭ industriajn laborojn, agrokulturajn kaj militajn aferojn, kaj partopreni ĉiam ajn en la luktoj de la kultura revolucio por kritiki la burĝaron.

## 11

### PROBLEMO DE KRITIKADO KUN NOMCITO EN LA GAZETARO

Dum irado de la amasa movado de la kultura revolucio oni devas tre bone kombini la disvastigon de la proleta mondkoncepto kaj la disvastigon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kun la kritikado de la burĝa kaj feŭda ideologioj.



*La Decido de la Centra Komitato de la Partio pri la granda proleta kultura revolucio ekstreme emocias la revoluciajn amasojn mjaŭajn kaj dungajn en Guj-ĝoŭ-provinco. Ili arope skribas ĝoj- kaj decid-esprimajn skribojn kaj ĉie estas laŭde cirkulanta la informo pri tiu ĉi granda ĝojiga afero.*





*Kantante kaj dancante gelernantoj de Sudokcidenta Nacieca Instituto firme subtenas la Decidon de la Centra Komitato de la Partio pri la granda proleta kultura revolucio.*

Oni devas organizi kritikadon kontraŭ la tipaj burĝaj reprezentantoj, kiuj enŝteliĝis en la Partion, kaj reakciaj burĝaj akademiaj "aŭtoritatuloj", inkluzive la kritikadon kontraŭ la diversspecaj reakciaj vidpunktoj en filozofio, historio, politika ekonomio kaj edukado, en verkoj kaj teorioj de literaturo kaj arto, en teorioj de naturaj sciencoj kaj en aliaj kampoj.

La kritikado kontraŭ iu ajn kun cito de la nomo en la gazetaro devas esti decidita de la Partia komitato de la sama nivelo post diskuto, kaj en iuj kazoj prezentita al la Partia komitato de pli alta nivelo por aprobo.

## 12

### **POLITIKO KONTRAŬ LA SCIENCISTOJ, TEKNIKISTOJ KAJ ORDINARAJ LABORANTOJ**

Rilate al la sciencistoj, teknikistoj kaj ordinaraĵaj laborantoj, ni devas en tiu ĉi movado plue apliki la politikon de "unuiĝo, kritiko, unuiĝo", se ili nur estas patriotaj,

laboras aktive, ne oponas kontraŭ la Partio kaj socialismo kaj ne havas kontraŭlegajn rilatojn kun fremda lando. Ni devas protekti tiujn sciencistojn kaj sciencajn kaj teknikajn laborantojn, kiuj faris rimarkindan kontribuon. La mondkoncepton kaj laborstilon oni povas helpi ilin transformi paŝon post paŝo.

## 13

### **PROBLEMO PRI ARANĜOJ DE KOMBINO KUN LA SOCIALISMA EDUKA MOVADO EN URBO KAJ KAMPARO**

La kulturaj kaj edukaj organizoj kaj la gvidaj organoj de la Partio kaj registaro en la grandaj kaj mezgrandaj urboj estas la ĉefaj punktoj de la nuna proleta kultura revolucio.

La granda kultura revolucio pliriĉigis la socialisman edukan movadon en urbo kaj kamparo kaj levis ĝin al pli alta nivelo. Estas necese konduki tiujn du movadojn en kombino. Pri tio ĉiuj regionoj kaj ĉiuj

departementoj povas fari aranĝojn laŭ siaj specifaj kondiĉoj.

La socialisma eduka movado kondukata nun en kamparo kaj en entreprenoj en urbo ne devas esti malordigata, kie la originala aranĝo estas taŭga kaj la movado iras bone, sed daŭrigata laŭ la originala aranĝo. Tamen, en konvena tempo, la problemoj elmetitaj de la nuna granda proleta kultura revolucio, devas esti submetitaj al la amasoj por diskuti por plie forte elstarigi la proletan ideologion kaj elimini la burĝan ideologion.

En iuj lokoj, la granda proleta kultura revolucio servas kiel centro por komuniki movon al la socialisma eduka movado, kaj fari purigadon en la kampoj de politiko, ideologio, organizo kaj ekonomio. Oni povas tiel fari, se la loka Partia komitato opinias tion taŭga.

#### 14

### FIRME TENI LA REVOLUCION, STIMULI PRODUKTON

La granda proleta kultura revolucio celas revoluciigi la ideologion de homoj kaj tiel ebligi al la laboroj en ĉiuj kampoj atingi pli grandajn, pli rapidajn, pli bonajn kaj pli ekonomiajn rezultojn. Se la amasoj estas plene mobilizitaj kaj taŭgaj aranĝoj estas faritaj, eblas garantii samtempe konduki la kulturan revolucion kaj produkton, sen malhelpo unu al la alia, kaj garantii altan kvaliton en ĉiuj laboroj.

La granda proleta kultura revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando. La vidpunkto de kontraŭstarigo de la granda kultura revolucio kontraŭ la disvolvo de produkto estas erara.

#### 15

### LA ARMITAJ FORTOJ

En la armitaj fortoj, la movadoj de la kultura revolucio kaj la socialisma edukado devas esti kondukataj laŭ la instrukcioj de la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra

Komitato de KPCĈ kaj la Ĝenerala Politika Departemento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

#### 16

### LA PENSO DE MAŬ ZEDONG ESTAS LA ORIENTILO POR AGADO EN LA GRANDA PROLETA KULTURÀ REVOLUCIO

En la granda proleta kultura revolucio estas necese teni alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj meti proletan politikon en komandon. Estas necese disvolvi kampanjon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ inter la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj de kadroj kaj intelektuloj kaj preni la penson de Maŭ Zedong kiel la orientilon por agado en la kultura revolucio.

En tia komplika granda kultura revolucio, la Partiaj komitatoj de diversaj niveloj des pli devas serioze studi kaj apliki kreive la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj precipe studi ripetade tiujn pri la kultura revolucio kaj pri la gvidaj metodoj de la Partio, ekz., *Pri Nov-Demokratio, Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo, Parolado en la Tutlanda Konferenco pri Propaganda Laboro de la Komunista Partio de Ĉinio, Kelkaj Demandoj pri la Metodoj de Gvidado kaj Labormetodoj de la Partia Komitato.*

La Partiaj komitatoj de diversaj niveloj devas sekvi la instrukciojn donitajn dum jaroj de Prezidanto Maŭ, nome, praktiki plene la amasan linion de "el la amasoj kaj en la amasojn", kaj esti unue lernantoj antaŭ ol fariĝi instruantoj. Ili klopodu eviti unuflankecon kaj limigitecon. Ili devas subteni la uzadon de materiisma dialektiko kaj oponi metafizikon kaj skolastikon.

Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Maŭ Zedong la granda proleta kultura revolucio certe gajnos grandan venkon.



# Komuniko de la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio

(Aprobata je la 12-a de Aŭgusto, 1966)

**L**A 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio okazis en Pekino de la 1-a ĝis la 12-a de aŭgusto, 1966.

La 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato okazis sub la prezido de kamarado Maŭ Zedong. Ĝin partoprenis komitatanoj kaj alternaj komitatanoj de la Centra Komitato. Ĝin ĉeestis ankaŭ kamaradoj de la regionaj burooj de la Centra Komitato kaj partiaj komitatoj de ĉiuj provincoj, urbegoj kaj aŭtonomaj regionoj,

membroj de la Grupo pri Kultura Revolucio de la Centra Komitato, kamaradoj de koncernaj departementoj de la Centra Komitato kaj la Registaro, kaj reprezentantoj de revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la ĉefurbaj altlernejoj.

La 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato aprobas post diskuto la “Decidon de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio”.

*La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la Centra Nacieca Instituto varmege krias: Vivu, longe vivu la plej, plej amata granda gvidanto de nia multnacia popolo Prezidanto Maŭ.*





*Revoluciaj amasoj en Harbin nombrantaj 200 mil personojn okazigas grandegan kunvenon en pluvo kaj varmege subtenas la Komunikon de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio.*

La Plena Sesio sankcias post diskuto la gravajn politikajn decidojn kaj gravajn rimedojn, koncernantajn problemojn enlandajn kaj eksterlandajn, alprenitajn de la Politika Buroo de la Centra Komitato ekde la 10-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato okazinta en septembro, 1962.

## ENLANDE

En la 10-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato, kamarado Maŭ Zedong faris korektan analizon pri la tiama situacio kaj refoje emfazis la teorion pri kontraŭdiroj, klasoj kaj klasbatalo en socialisma socio. Ĝi estas kompasoj por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado en nia lando. Dum la lastaj kvar jaroj, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de kamarado Maŭ Zedong kaj sub la direktado de la Ĝenerala Linio de la Partio streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, la popolo

de nia lando disvolvis la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, kaj akiris grandajn venkojn. La popolaj komunumoj pli solidiĝis kaj disvolviĝis. En la tuta lando ĉie regas varma revolucia atmosfero kaj elmontriĝas situacio de nova plenampleksa antaŭensalto.

La nacia ekonomio de nia lando antaŭen disvolviĝas kontinue kaj sane. La politiko de reĝustigo, solidigo, plenumo kaj altigo elmetita de la Centra Komitato de la Partio jam venke efektiviĝis. De la kuranta jaro, komenciĝis la plenumado de la Tria Kvinjara Plano. Sur la industria fronto, la produktoj ne nur multe kreskis en kvanto kaj specaro, sed ankaŭ leviĝis en kvalito. Sur la agrikultura fronto, bonaj rikoltoj estas gajnitaj dum kvar sinsekvaj jaroj. La merkato prosperas kaj la prezoj estas stabilaj. La sukceso de tri nukleaj provoj koncentre montris la novan nivelon atingitan en la disvolvado de la scienco, tekniko kaj industrio de nia lando.



De la lastaj kelkaj jaroj, socialisma eduka movado estas vaste disvolvata en la kamparo, urboj kaj armeo de la tuta lando. Nun, granda proleta kultura revolucio senprecedenca en historio estas leviĝanta en nia lando. La amasa movado, en kiu la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, revoluciaj intelektuloj kaj vastaj amasoj de kadroj kreive studas kaj aplikas la verkojn de kamarado Maŭ Zedong, inaŭguris novan eraon de rekta posedo kaj apliko de marksism-leninismo de la laboranta popolo.

La Plena Sesio tute aprobas la “Decidon de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio pri Kelkaj Problemoj en la Nuna Kampara Laboro (Projekto)” publikigitan en la 20-a de majo, 1963, kaj la resumajn notojn pri la diskuto en la Tutlanda Labora Konferenco kunvokita de la Politika Buroo de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio je la 14-a de januaro, 1965: “Kelkaj Problemoj Nun Leviĝintaj en la So-

*Gelaboristoj de Ŝanhaja Fabriko de Pezaj Maŝinoj entuziasme studas la Komunikon de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio.*



cialisma Eduka Movado en la Kamparo”, t. e., la 23 reguloj. Tiuj du dokumentoj estis ellaboritaj sub la persona gvido de kamarado Maŭ Zedong kaj estas potenca ideologia armilo por la popolo de nia lando en kondukado de la socialisma revolucio. Tiel en la kamparo kiel en la urboj, oni devas kontinue konduki ĝis la fino, laŭ tiuj du dokumentoj kaj en kombino kun la granda proleta kultura revolucio, la movadon de “kvar purigoj”, t. e., la socialisman edukan movadon de purigo de politiko, purigo de ideologio, purigo de organizo kaj purigo de ekonomio.

La Plena Sesio tute aprobas la serion da saĝaj politikaj decidoj elmetitaj de kamarado Maŭ Zedong en la lastaj kvar jaroj. Tiuj politikaj decidoj ĉefe estas la jenaj:

Pri la demando de praktikado de la principo de demokratia centralizismo kaj disvolvo de la revolucia tradicio de la amasa linio,

Pri la demando de edukado kaj elkulturado de daŭrigantoj de la proleta revolucia afero,

Pri la alvoko por lerni de Daking en industrio, lerni de Daĝaj en agrikulturo, lerni de la Popola Liberiga Armeo en la tuta lando kaj fortigi politikan kaj ideologian laboron,

Pri la strategia principo de prepariteco al milito, prepariteco al naturaj katastrofoj kaj ĉio por la popolo,


Pri la demando frakasi fremdlandajn rutinajn regulojn kaj iri nian propran vojon de industria disvolviĝo,

Pri la demando de sistemo kaj dislokigo en ekonomia konstruado kaj nacidefenda konstruado,

Pri la alvoko, ke la tuta partio zorgu pri militaj aferoj kaj ĉiuj popolanoj soldatiĝu,

Pri la demando de planado kaj aranĝado de laŭgrada mekanikigo de agrikulturo, kaj

Pri la alvoko, ke la Popola Liberiga Armeo kaj fabrikoj, vilaĝoj, lernejoj, komercaj kaj servaj organizoj, la partiaj kaj registaraj institucioj, ĉiuj devas fariĝi grandaj lernejoj de revolucio.



*La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de Anhuja Universitato skribas opini-afiŝojn por esprimi sian firman apogon al la granda alvoko elmetita en la Komuniko kaj juri ĝisfundan kondukon del a granda proleta kultura revolucio.*

La Plena Sesio emfazas, ke la serio da direktivoj de kamarado Maŭ Zedong pri la granda proleta kultura revolucio estas la orientilo de agado en la nuna kultura revolucio de nia lando kaj formas gravan disvolviĝon de marksism-leninismo.

La Plena Sesio opinias, ke la ŝlosilo por sukcesigi tiun grandan kulturalan revolucion estas fidi al la amasoj, sinapogi sur ili, senrezerve mobilizi ilin kaj estimi ilian iniciativon. Do estas necese persisti pri la linio: “de la amasoj kaj al la amasoj”. Fariĝu unue lernantoj de la amasoj antaŭ ol esti iliaj instruistoj. Kuraĝu revolucii, kaj estu lertaj en revolucio. Ne timu malordajojn. Oponu alprenon de la burĝa starpunkto, protektadon al dekstruloj, baton kontraŭ maldekstruloj kaj subpremado al la granda proleta kultura revolucio. Oponu kreadon de multaj limigoj por kateni la manojn kaj piedojn de la amasoj. Ne agu kiel grandsinjoraj moŝtoj blinde ordonante la amasojn de supre.

Donu varman subtenon al la revoluciaj maldekstruloj, atentu pri strebado al unuiĝo kun ĉiuj unuigeblaj homoj kaj koncentru

niajn fortojn por bati plenmanon da kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj burĝaj dekstruloj.

La Plena Sesio opinias, ke la serio da demandoj elmetitaj de kamarado Maŭ Zedong en la lastaj kvar jaroj pri socialisma revolucio kaj socialisma konstruado multe akcelis la disvolviĝon kaj venkon de la socialisma afero en nia lando kaj havas eksterordinare profundan kaj malproksimatingan signifon por solidigi la proletan diktaturon kaj socialisman sistemon en nia lando, preventi reviziisman uzurpon de la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato kaj restariĝon de kapitalismo, garantii la persistadon de nia lando en proleta internaciismo kaj aktiva subtenado al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj de la mondo kaj garantii la paŝopost-paŝan transiron de nia lando al komunismo en la estonteco.

## INTERNACIE

La 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio opinias, ke tre bona estas nun la situacio de la batalo de la tutmondaj marksist-leninistoj kaj revoluciaj popoloj por oponi imperiismon, diverslandajn reakciulojn kaj modernan reviziismon. Nun estas nova epoko de la monda revolucio. Diversaj politikaj fortoj estas trapasantaj procezon de granda skuiĝo, granda dividiĝo kaj granda reorganiziĝo. La revolucia movado de diverslandaj popoloj, precipe de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, progresas impete. Malgraŭ ke neeviteble aperos en la disvolviĝo de la internacia situacio iaj aŭ aliaj zigzagoj kaj inversiĝoj, tamen, la ĝenerala tendenco ke imperiismo iras al plena ruiniĝo kaj socialismo iras al la triumfo tra la tuta mondo estas neniel ŝanĝebla. La kruela subpremado, furioza atako, subaĉeto kaj trompo kontraŭ la revoluciaj amasoj fare de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj en diversaj landoj ne povas savi ilin el ilia sorto de pereco. Male, tio povas nur plie akceli la revolucionan vekigon de diverslandaj popoloj. La kontraŭpopolaj kaj kontraŭrevoluciaj agoj fa-



ritaj de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj en diversaj landoj estas akcelantaj la revolucion agadon de la popoloj de tiuj landoj. La usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj en diversaj landoj aspektas potencaj, sed fakte ili estas tre malfortaj. El la vidpunkto de longa tempo ili ĉiuj estas papertigroj.

Heredinte la doktrinon de Ĥruŝĉov, la nova gvidanta kliko de la Komunista Partio de Sovetunio praktikas Ĥruŝĉov-reviziismon sen Ĥruŝĉov. Ĝia linio ja estas protekti la imperiisman kaj koloniisman dominadon en la kapitalisma mondo kaj restarigi kapitalismon en la socialisma mondo. La gvidanta kliko de la Komunista Partio de Sovetunio perfidis marksism-leninismon, perfidis grandan Lenin, perfidis la vojon de la granda Oktobra Revolucio, perfidis la proletan internaciismon, perfidis la revolucion aferon de la internacia proletaro kaj la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj, kaj perfidis la interesojn de la granda sovetunia popolo kaj la popoloj de ĉiuj socialismaj landoj. Ĝi blasfemas la Komunistan Partion de Ĉinio kulpigante ĝin pri tiel nomataj “dogmismo”, “sektismo” kaj “maldekstra aventurismo”. Fakte, tio, kion ĝi atakas, estas ĝuste marksism-leninismo. Ĝi estas sin kunliganta kun imperiismo, estrata de Usono, kaj diverslandaj reakciuloj por formi novan sanktan aliancon kontraŭ komunismo, popolo, revolucio kaj Ĉinio. Tamen tia kontraŭrevolucia sankta alianco estas destinita al bankroto kaj nun jam estas en procezo de displitiĝo.

La Plena Sesio opinias, ke la plenampleksa kaj publika kritiko kontraŭ Ĥruŝĉov-reviziismo farita de nia partio en la lastaj jaroj estas tute korekta kaj necesa. La “Propono pri la Ĝenerala Linio de la Internacia Komunisma Movado” elmetita de la

Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio je la 14-a de junio 1963, estas progameca dokumento. Tiu dokumento ellaborita sub la persona gvido de kamarado Maŭ Zedong, kaj la naŭ komentoj pri la malferma letero de la Centra Komitato de Komunista Partio de Sovetunio kaj la *Kommento pri la Marta Kunveno de Moskvo*, skribitaj de la redakcioj de la *Popola Ĵurnalo* kaj la gazeto *Ruĝa Flago*, kaj *Vivu la Venko de Popola Milito* verkita de kamarado Lin Biaŭ, ktp., faras marksism-leninisman sciencon analizon pri serio da gravaj problemoj de la monda revolucio en la nuna epoko kaj estas potencaj ideologiaj armiloj kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo.

La Plena Sesio opinias, ke por oponi imperiismon, oni devas nepre oponi modernan reviziismon. En la batalo inter marksism-leninismo kaj moderna reviziismo absolute ne ekzistas meza vojo. Oni devas nepre streki klaran limlinion kontraŭ la moderna reviziisma kliko kun la gvidantaro de la Komunista Partio de Sovetunio kiel la centro, kaj malkaŝi decideme ĝian veran vizaĝon de laborist-renegato. Estas neeble fari ian “unuigitan agadon” kun ĝi.

La Plena Sesio montras, ke la proleta internaciismo estas la plej alta gvidprincipo de la eksterlanda politiko de nia lando. La Plena Sesio varme subtenas la justan batalon

*La komandantoj kaj batalantoj de iu artileria trupo ĉe la fronto en Fugian-provinco varmege huraas la Komunikon de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio.*



de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kontraŭ imperiismo estrata de Usono kaj ĝiaj lakeoj kaj subtenas la revoluciajn batalojn de la popoloj tra la tuta mondo.

La Plena Sesio plej forte kondamnas la krimagon de plivastigo de la agresiva milito kontraŭ Vjetnamio fare de la usona imperiismo. La Plena Sesio plej varme kaj plej firme subtenas la "Alvokon" de kamarado Ho Chi Minh, prezidanto de la Vjetnama Demokratia Respubliko, kaj firme subtenas la vjetnaman popolon batali ĝis la fino, ĝis estos akirita la fina venko en ĝia milito kontraŭ la usona imperiismo por savi la nacion. La Plena Sesio plene konsentas al ĉiuj paŝoj faritaj kaj agoj farotaj de la Centra Komitato de nia partio kaj nia registaro deciditaj post interkonsiliĝo kun la vjetnama flanko koncerne al la helpo al Vjetnamio por rezisti kontraŭ la usona imperiismo.

La Plena Sesio forte kondamnas la reviziisman gvidantan klikon de Sovetunio, kiu praktikas kontraŭrevolucion duoblan politikon de falsa subteno kaj vera perfido en la problemo de la batalo de Vjetnamio kontraŭ la usona imperiismo.

La Plena Sesio opinias, ke la usona imperiismo estas la plej feroce komuna malamiko de la popoloj de la tuta mondo. Por maksimume izoli kaj bati la usonan imperiismon, estas necese starigi plej vastan internacian unuecfronton kontraŭ ĝi kaj ĝiaj lakeoj. La reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio sekvas la politikon de kunlaboro inter Sovetunio kaj Usono por superregi la mondon kaj faras en la internacia komunisma movado kaj la naci-liberiga movado splitigajn, subfosajn kaj renversajn agadojn, en aktiva servado al la usona imperiismo. Ĝi kompreneble ne povas esti inkluzivita en tiu unuecfronto.

Ni devas nepre kunligiĝi kun ĉiuj homoj en la mondo, kiuj oponas imperiismon kaj koloniismon, por konduki la batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj ĝis la fino.

Ni devas nepre konduki la batalon kontraŭ la moderna reviziismo ĝis la fino kaj antaŭenpuŝi la revolucion aferon de la internacia proletaro kaj la mondaj popoloj, kune kun ĉiuj revoluciaj marksist-leninistoj en la tuta mondo.

### ALTE TENU LA GRANDAN RUĜAN STANDARDON DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

La 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato emfazas, ke la fervorega studado de la verkoj de kamarado Maŭ Zedong fare de la tuta Partio kaj tuta nacio estas grava evento kun historia signifo. Kamarado Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna

*Membroj (malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj) de Nanjuana Popola Komunumo en antaŭurbo de Pekino firme subtenas la Komunikon de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio.*





epoko. Kamarado Maŭ Zedong genie, kreive kaj plenamplekse heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismon, kaj levis ĝin al tute nova stadio. La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo de la epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta kolapso, dum socialismo iras al venko en la tuta mondo. La penso de Maŭ Zedong estas la gvidprincipo de ĉiuj laboroj de nia tuta partio kaj nia tuta lando. La Plena Sesio opinias, ke la alvoko de kamarado Lin Biaŭ al la Popola Liberiga Armeo por disvolvi amasan movadon de studado de la verkoj de kamarado Maŭ Zedong en la tuta armeo starigis brilan ekzemplon por la tuta Partio kaj tuta lando. Armi la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciajn intelektulojn kaj vastajn amasojn de kadroj per la penso de Maŭ Zedong kaj plie akceli la revolucigon de la ideologio de homoj, estas la plej fidinda kaj plej fundamenta garantio por preventi reviziismon kaj la restariĝon de kapitalismo kaj por la venko de nia socialisma kaj komunisma afero. La metodo de studo de verkoj de kamarado Maŭ Zedong studi kun demandoj, studi kaj apliki ilin kreive, kombini studon kun apliko, studi unue kion oni urĝe bezonas por rikolti tuj rezultojn, kaj peni plej energie pri aplikado de ĉio studita estas pruvita efika kaj universale aplikebla kaj devas esti plie disvastigata tra la tuta Partio kaj la tuta lando.

La Komunista Partio de Ĉinio estas partio granda, glora kaj korekta. Nia partio estas partio fondita kaj kulturata de kamarado Maŭ Zedong kaj armita per marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong. Nia partio estas proleta avangardo kiu kombinas teorion kun praktiko, intime sin kunligas kun la popolamasoj kaj havas seriozan memkritikan spiriton. Nia partio estas proleta revolucia partio kiu spertis plej intensan, plej penigan, plej longtempan kaj plej kompleksan batalon en la historio. Nia popolo estas granda popolo. Nia lando estas granda lando. Nia armeo estas granda armeo. Ni firme kre-

das, ke sub la gvido de la granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, sin apogante sur la propraj fortoj kaj strebante al prospero, la armeo kaj popolo de la tuta lando certe povas venki ĉiujn malfacilojn kaj barojn, certe povas plenumi la mision donitan de la historio, kaj certe ne vanigos la esperon de la mondaj revoluciaj popoloj metitan sur ni.

La 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato alvokas ĉiujn laboristojn, popolkomunumanojn, komandantojn kaj batalantojn de la Popola Liberiga Armeo, revoluciajn kadrojn, revoluciajn intelektulojn, revoluciajn instruistojn kaj lernantojn, sciencajn kaj teknikajn laborantojn de la lando ankoraŭ pli alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, unuiĝi kun ĉiuj unuigeblaj homoj, venki la reziston devenantan de diversaj flankoj, de la kontraŭrevolucia reviziismo kaj "maldekstra" kaj dekstra oportunistoj, konkeri malfacilojn, mankojn kaj erarojn, konkeri la mallumajn flankojn en la Partio kaj socio, konduki la grandan proletan kulturan revolucion kaj la socialisman revolucion ĝis la fino, kaj lukti por realigi la Trian Kvinjaran Planon kaj konstrui nian landon en potenca socialisman landon.

Ni devas nepre havi grandajn kaj bravajn proletajn aspirojn, kuraĝi iri vojon neniam iritan kaj surgrimpi altan montpinton neniam surgrimpitan de niaj antaŭuloj. Ni devas nepre bone konstrui la socialisman Ĉinion, kiu havas kvaronon de la loĝantaro de la mondo, kaj fari ĝin nedifektebla proleta ŝtato el ŝtalo, kiu neniam ŝanĝos sian koloron. Ni nepre liberigos Tajvan. Ni nepre plivigliĝos centoble nian singardemon kontraŭ surprizatakoj fare de la usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj. Se ili aŭdacos trudi militon al ni, la sepcentmilion-a ĉina popolo sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio certe rompos la spinon de la agresantoj kaj ekstermos ilin firme, ĝisfunde, tute kaj komplete.



*La lernantinoj de elementa lernejo en antaŭurbo de Ĉengdu akiras kun ĝojo la Cititajn Vortojn de Prezidanto Maŭ, kiun alportas laboristoj kaj oficistoj de Hinhua-librejo.*

*Gelaboristoj kaj geoficistoj de Hinhua-presejo en Pekino tre zorge kontrolas la pretajn ekzemplerojn de la libro Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong (kunbindita eldono) antaŭ ellivero.*



# CK de Ĉina Grandkvante la

**P**OR kontentigi la urĝan bezonon de la vastaj popolamasoj en studo de la penso de Maŭ Zedong, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio decidis eldoni la verkojn de Prezidanto Maŭ plirapide kaj grandkvante, kaj alvokis la vastajn kadrojn, laboristojn kaj oficistojn en la branĉoj de eldono, presado kaj distribuo tra la tuta lando ekagi senprokraste kaj tutforte preni la eldonon kaj distribuon de la verkoj de Prezidanto Maŭ kiel taskon plej gravan. Dank' al la plirapida kaj grandkvanta presado en la kurenta kaj venonta jaroj, la verkoj de Prezidanto Maŭ, kiujn la vastaj amasoj varme deziras

*Ŝanhajaj revoluciaj instruistoj la netakseble valoran revolucion de Maŭ Zedong.*





# Kompartio Decidis Eldoni Verkojn de Prezidanto Maŭ

eĉ en sonĝo, estos liverataj paŝon post paŝo sen limigo en la tuta lando.

Laŭ la instrukcio de la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio, la Ministrejo de Kulturo lastatempe okazigis landan kunvenon pri laboroj de presado kaj distribuado de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Estas ellaboritaj konkreta plano pri grandkvanta presado de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj plano pri distribuado. 35 milionoj da ekzempleroj de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* estos presitaj kaj distribuitaj en la kuranta kaj venonta jaroj. La presadon de la *Elektitaj Legaĵoj el Verkoj de Maŭ Zedong*

(Eldonoj A kaj B) kaj verkoj de Prezidanto Maŭ en apartaj eldonoj ĝenerale mem prirespondos provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. La bezono de vastaj amasoj estos plene kontentigita paŝon post paŝo en la kuranta kaj venonta jaroj.

Tio estas afero kun granda historia signifo en la politika vivo de nia lando, ke la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio decidis eldoni kaj distribui plirapide kaj grandkvante la verkojn de Prezidanto Maŭ. Ĝi estas granda ĝojo de la tutlanda popolo kaj plia venko de la nuna granda proleta kultura revolucio.

*kaj lernantoj huraante akceptas trezoron — Elektitajn Verkojn*

*Vilaĝaj komunumanoj de Hangiang-gubernio, Giangsu-provinco, amase aĉetas, kun profunda klasa sento, revoluciajn trezorajn librojn—verkojn de Prezidanto Maŭ.*





*La membroj de Liucun-Komunumo de Linfen-gubernio, Ŝanhi-provinco, soife studas verkojn de Prezidanto Maŭ.*



*La Ĉina Popola Liberiga Armeo estas granda lernejo por kreive studi kaj apliki la penson de Maŭ Zedong. Komandantoj kaj batalantoj de trupo en Pekino kune studas verkon de Prezidanto Maŭ.*



*La revoluciaj nacimalplimultaj geinstruitoj kaj gelernantoj de la Medicina Instituto de Interna Mongolio kantas kaj dancas ĝojplene pro la ĵusa akiro de Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong.*



# La Brilo de la Penso de Maŭ Zedong Lumigas la Tutan Mondon

— Kolektive Skribita de Raportistoj Senditaj  
de Hinhua-a Novaĵ-agentejo al Eksterlando

**Noto de la Redakcio de Popola Ĵurnalo:**

*“Maŭ Zedong estas granda direktilisto de la monda revolucio.” “La verkoj de Maŭ Zedong disradias senlimajn brilojn kaj lumigas la revolucionan vojon de la popoloj de la mondo.” “La penso de Maŭ Zedong estas suno neniam subiranta.” La revoluciaj popoloj de diversaj landoj en la mondo esprimas sian senliman amon al Prezidanto Maŭ Zedong kaj senliman estimon al la penso de Maŭ Zedong en malsamaj lingvoj.*

*La penso de Maŭ Zedong estas la penso por liberiĝo de ĉiuj subpremataj nacioj kaj popoloj en la nuna epoko. La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo kreive disvolvita dum la longdaŭra praktiko de la ĉina revolucio kaj en la granda batalo de la popoloj en diversaj landoj kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj en la nuna epoko. Ĝi estas kulmino de marksism-leninismo en la nuna epoko.*

*Kamarado Maŭ Zedong estas la plej granda genio en la nuna epoko. Estas malofsta en la historio tia revolucia gvidanto kia kamarado Maŭ Zedong, kiu trapasis tiel longdaŭrajn, kompleksajn, akrajn kaj multflankajn batalojn. Kamarado Maŭ Zedong staras plej alte kaj vidas plej malproksime; li observas problemojn plej profunde, trovas ilin plej rapide, kaj solvas ilin plej radikale. La penso de Maŭ Zedong ne nur estas la plej granda trezoro de la ĉina popolo, sed ankaŭ la komuna trezoro de la revoluciaj popoloj de la mondo.*

*Kien la penso de Maŭ Zedong lumas, tie la popolo ekhavas direkton por batalakiri liberiĝon kaj esperon de venko de la revolucio. La penso de Maŭ Zedong donas al ili forton, saĝecon, kuraĝon kaj fidon por batali. Ju pli vaste disvastiĝas la penso de Maŭ Zedong en la tuta mondo, des pli vigle kaj vaste disvolviĝas la revoluciaj bataloj de la subpremataj kaj ekspluatataj popoloj. La vivo de imperiismo ne estos longa.*



*La vasta amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de Vjetnamio senlime amas Prezidanton Maŭ. Ĉi tie la junaj gelaboristoj, kun senkompara respekto, pendigas la portreton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.*

Dum la vizitado en diversaj partoj de la mondo, de Pacifiko ĝis Atlantiko, de Azio, Afriko, Latinameriko ĝis Eŭropo, ĉie kie ni alvenis, ni sentis profundan amikecon de diverslandaj popoloj al la ĉina popolo. Tamen, precipe kortuŝa kaj neniam forgesbla por ni estas tio, ke la popoloj de diversaj landoj en la mondo elkore amas kaj estimas nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ Zedong kaj senlime amas liajn verkojn. Ĉe nia renkontiĝo kun diverslandaj amikoj, multaj el ili antaŭ ĉio demandis pri la farto de Prezidanto Maŭ kaj deziris al li longan vivon. Ili diris: “La bona sano de Prezidanto Maŭ Zedong estas feliĉo por la revoluciaj popoloj de la mondo!” La plej trezora donaco, kiun ili deziris akcepti de ni, estis ĉiam la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* aŭ silkbrodita portreto de Prezidanto Maŭ. Foje kaj refoje ili legadis la *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* senlace eĉ centfoje. Ili tre tre longe rigardis la portreton de Pre-

zidanto Maŭ kaj ne volis lasi ĝin. Fikse rigardante la silkan portreton de Prezidanto Maŭ, iuj amikoj kun emociiĝo diris al ni: “Vi estas la plej feliĉaj, ĉar vi havas tian grandan gvidanton kia Maŭ Zedong! Ankaŭ ni estas feliĉaj, ĉar ni amikiĝis kun la ĉina popolo, kiu estas kulturita de Maŭ Zedong! Maŭ Zedong apartenas al vi, kaj ankaŭ al ni, li apartenas al la revoluciaj popoloj de la tuta mondo!”

Dum nia vizitado en fremdlandoj la vivecaj faktoj, kiujn ni vidis kaj aŭdis, pruvas ke nia estimata gvidanto Prezidanto Maŭ ne nur estas granda gvidanto de la diversnacieca popolo de nia lando, sed ankaŭ granda gvidanto de la revoluciaj popoloj de la mondo. La penso de Maŭ Zedong estas kulmino de marksism-leninismo, la plej alta kaj plej viva marksism-leninismo en la nuna epoko kaj forta ideologia armilo en batalo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo. Hodiaŭ, en la tempeste



kaj bole leviĝanta revolucia batalo de la popoloj en la mondo, la penso de Maŭ Zedong ĉiam pli elmontras sian brilon, ĝi lumigas la korojn de la revoluciaj popoloj de la mondo, kaj montras al ili la vojon al venko de la revolucio.

## PLENE VENKI LA MALAMIKON PER MAGIA RIMEDO DE POPOLA MILITO

Kiom da vivecaj rakontoj svarmas en niaj cerboj, kiom da emociaj bildoj reaperas antaŭ niaj okuloj. Karaj legantoj, eble vi jam legis multe da batalaj rakontoj pri la heroaj gefiloj de suda Vjetnamio. Tamen, ĉu vi scias ke multaj el ili batalas kontraŭ la krimegaj usonaj agresantoj kunportante la verkojn de Prezidanto Maŭ?

Sur la flama batalkampo de la suda Vjetnamio, ĉu en la altaj montaroj kun primitivaj arbaroj ĉu en la vastaj ebenejaj liberigitaj regionoj ni vizitis multajn elstarajn partizanajn taĉmentojn. Disvolvante popolan militon, ili seninterrompe batas kaj ekstermas la malamikojn. Ili lertas en surprizatako, embuska batalo, bataloj per minoj, per bambuaj pikiloj, per vespoj, ktp. El la verkoj de Prezidanto Maŭ ili lernis la sperton de la ĉina revolucia milito kaj kun kreado konstante disvolvas ĝin en sia praktiko de batalado, batante la usonajn agresantojn kaprompe kaj sangfluige. Per la venkaj bataloj ili konfirmis la brilan aserton de Prezidanto Maŭ ke imperiismo kaj ĉiuj reakciularoj estas paperaj tigroj. Ni vizitis iun faman gerilan taĉmenton aktivantan apud la ŝoseo n-ro 1 en la meza parto de suda Vjetnamio. Ĝi faris pli ol 150 batalojn en unu jaro. Ĝiaj anoj ekstermis taĉmenton da malamikaj veturiloj kaj militkaptis usonan "konsiliston" en daŭro de nur kelkaj minutoj en embuska batalo. Ili parkere lernis kaj tre bone aplikis en batalo la formulon (en 16 ĉinaj vortoj) de Prezidanto Maŭ pri gerila milito: "Retiriĝu, kiam la malamiko antaŭeniras; ĝenu ĝin kiam la malamiko kampadas; ataku ĝin kiam la malamiko laciĝas; persekutu ĝin kiam la malamiko retiriĝas." Iu ensemblo de la Liberiga Armeo eĉ verkis ludaĵon el la supre menciita formulo kaj ĝin prezentis al la armeanoj kaj popolamasoj en la liberigitaj

regionoj por ke ili pli bone komprenu kaj posedu tiun formulon.

Neforgesebla por ni estas tiu nokto, kiun ni pasigis en densa arbaro en Annam-montaro de suda Vjetnamio. Tiam trupo de la Liberiga Armeo aranĝis por ni bivakfajran vesperon. Kiam la nokto vualis la arbaron, ekbrulis la fajroj. Aplaudante kaj kantante la batalantoj jubilis pro la venko de batalo. Ĉe la komenco de la kunveno leviĝis iu juna batalanto kaj diris: "Antaŭ ĉio permesu al ni sendi varmajn salutojn al Prezidanto Maŭ pere de la ĉinaj kamaradoj." Tuj eksplodis varmaj manklakoj en la kunveno. Ni sciigis al ili ke Prezidanto Maŭ estas tre sana kaj antaŭ nelonge ĉeestis mitingon okazintan antaŭ Tian-anmen-pordego por subteni la vjetnaman popolon en ĝia nacisava batalo kontraŭ la usona agresado. Tuj eksplodis ree tondra aplaŭdo. Leviĝis tiam batalantino kaj diris: "Dankon al Prezidanto Maŭ, dankon al la ĉina popolo pro ilia zorgo kaj subteno al ni, ni deziras longan vivon al onklo Maŭ por gvidi la ĉinan popolon de venko al pli granda venko." Tiam la batalantoj refoje varme aplaudis, kaj samtempe ili emocie ekkantis la kanton *Liberigi la Sudon*.

En suda Vjetnamio ni trapasis multajn "strategiajn vilaĝojn" ĵus detruitajn de la popolamasoj kaj ankaŭ vizitis multajn batalantajn vilaĝojn. En iu loko funkciulino rakontis al ni sian batalsperton: en 1961, kiam la malamiko ĉie starigis "strategiajn vilaĝojn", ŝi kaj ŝiaj kunbatalantoj interkonsiliĝis por trovi metodon por detrui la "strategiajn vilaĝojn". Tiutempe ŝi ĉeestis gravan kunvenon kunvokitan de la supera instanco, por studi la instrukciojn de la pli supera instanco kaj diskuti kiel agi. Dum la kunveno ŝi studis la *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* kaj estis inspirita de la "Raporto pri Esplorado de Kamparana Movado en Hunan-provinco". Ŝi diris: "Mi turnis specialan atenton al la problemo kiel mobilizi kaj armi la kamparanojn." Poste, en iu apudmara provinco ŝi kaj ŝiaj kamaradoj gvidis la kamparanajn amasojn arde disvolvi la batalon por detrui la "strategiajn vilaĝojn" kaj akiris brilajn venkojn. Ekscitiĝe ŝi diris al ni: "Ni devas venki plene la malamikon per la magia rimedo de popola milito."

## LA VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ DONAS AL ILI SENFINAN FORTON

En Laoso, konata kiel lando de ĝangaloj, ni ne nur atingis urbojn Khangkhaj kaj Siengkuang, sed ankaŭ vizitis militajn konstruaĵojn kaj artileriajn poziciojn ĉe fajrolinio, kaj ankaŭ gastis ĉe la kamparanaj familioj en montregiono. Tie ni vidis, ke la portreto de Prezidanto Maŭ pendas preskaŭ en ĉiu domo. Troviĝas pli ol dek portretoj de Prezidanto Maŭ pendantaj en la komandejo de la patriotaj fortoj en Siengkuang. En la domoj de la diversrondaj respondeculoj de la urbo ankaŭ pendas portretoj de Prezidanto Maŭ. Ho, nia granda kaj saĝa gvidanto! Vi estas kune kun la laosa popolo en batalo kaj laboro. Viaj verkoj fariĝis la plej potenca batalilo por la popolo de Laoso. La brilo de via granda penso lumigas ilian vojon al venko kaj donas al ili senfinan forton. La nefindireblaj dankaj vortoj kaj senfina amo al Prezidanto Maŭ de la laosaj amikoj ĝis nun ankoraŭ sonas ĉe niaj oreloj kaj reaperas antaŭ niaj okuloj.

Iu respondeculo de la milita komandejo de la patriotaj neŭtralaj fortoj de Laoso diris al ni: "Sub la gvido de la multe provitaj Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la ĉina popolo akumulis riĉajn batalspertojn, jam fariĝis hodiaŭ la plej forta kolono de la revoluciaj bataloj de la monda popolo, kaj estas apoganto de la popolo de la mondo por oponi kontraŭ la usona imperiismo." Li diris plue: "En la batalo ni devas nepre diferencigi, kiu estas malamiko kaj kiu amiko. Kaj kiu estas vera amiko, kiu pseŭda amiko,

kaj kiu estas la plej senŝanceliĝa kaj plej fidinda amiko... Tiun komprenaĵon ni akiris el la verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong." Iu respondeculo de la *Jurnalo de Liberiga Armeo* de Khangkhaj studas verkojn de Prezidanto Maŭ ĉiutage ekde 1962, seninterrompe ĝis nun, kaj persiste faras notojn post la legado. Li opiniis, ke el la verkoj de Prezidanto Maŭ oni povas akiri senfinan forton, klarigi sian penson kaj firmigi sian batalvolon. Li diris al ni: "Nun ni metas la esperon de la monda revolucio sur la Komunistan Partion de Ĉinio, precipe sur Prezidanton Maŭ. Maŭ Zedong estas la Lenin de la nuna tempo." Kun ekscitiĝo li esprimis sin antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ: "La verkoj de Prezidanto Maŭ donis al ni grandegan helpon. Ni devas, kiel Prezidanto Maŭ Zedong instruis, vere revoluciigi nin, hardi nin mem en firmajn revoluciajn batalantojn, kaj konduki la revolucion ĝis la fino."

La deziro studi la verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong, kiun havas diversrondaj popolanaroj de la liberigitaj regionoj de Laoso, estas tre forta. Antaŭ nelonge, sescent ekzempleroj de aparte eldonitaj verkoj de Maŭ Zedong tradukitaj en taja lingvo estis enportitaj en Khangkhaj, tiutage la du patriotaj fortoj de Laoso ĝuste okazigis tie kunvenon de funkciuloj. Ĝin partoprenis ĉiuj respondeculoj de administraj kaj armeaj unuoj, inkluzive tiujn de la provinco kaj gubernio de Siengkuang. Tiu stoko da verkoj de Maŭ Zedong estis portita rekte al la kunvenejo kaj kaŭzis grandan sensacion. La kunvenantoj entuziasme diris: "Jen alvenas la vero!" "Tio estas la plej dezirata donacaĵo!" La respondeculo de la provinco



*La penso de Prezidanto Maŭ pri popola milito estas posedata ĉiam de pli kaj pli da diverslandaj revoluciaj popoloj. Multaj soldatoj kaj popolanoj en la liberigita regiono de Laoso kunportas kun si verkojn de Prezidanto Maŭ kaj persistas en studo eĉ dum la tempo de intensaj bataloj.*



Siengkvang, kiu ĵus revenis de sia vizito al Ĉinio, ripetfoje petis, ke oni donu al li pliajn ekzemplerojn. Li diris: "Niaj funkciuloj de longe komisiis min kunporti al ili verkojn de Maŭ Zedong. Nun ili senpacience atendas la librojn por studi." Iu reprezentanto de la Centra Komitato de Laosa Patriotfronta Partio senĉese atentigas surloke ĉiujn: "Tiuj libroj estas ege valoraj. Vi devas bone kaj serioze studi ilin." Krome, li admonis la distribuantojn disdoni la librojn unue al armitaj trupoj.

Ni vizitis ankaŭ la fronton de la heroa Fukhut-monto en Laoso. Kiel arde amas Prezidanton Maŭ la vastaj amasoj de armeanoj kaj popolanoj tie batalantaj! Kiam ili aŭdis el radiodisaŭdigoj aŭ el paroladoj la nomon de Maŭ Zedong, ili tuj kriis nedeteneble: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Tri batalherooj, montrante siajn surbruste brilantajn medalojn de Prezidanto Maŭ, alparolis nin: "Medalo de Prezidanto Maŭ estas la plej bona donacaĵo kiun ni ricevis. Eĉ en la tempo de intensa batalo, ni ankaŭ plej bone konservas ĝin. Ni absolute ne permesas ion ajn makuli la honoron de granda Prezidanto Maŭ!" Krome ni informiĝis pri tia kortuŝa afero: En batalo, oni trovis i. a. notlibron de iu batalanto, kiu glore oferis sian vivon. Sur ĝia unua paĝo troviĝis algluita foto de Prezidanto Maŭ, detranĉita de bildgazeto. Sur la dorso de la foto estis skribo: "Prezidanto Maŭ, ni arde amas vin!"

## BATALI KUNPORTANTE VERKOJN DE MAŬ ZEDONG

Ruliĝantaj revoluciaj ondegaj nun envolvas la vastan kontinenton de Afriko. Afriko vekiĝis. Afriko batalas. Tra la tuta Afriko aŭdiĝas revolucia klariono. Nia amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la revolucia Afriko estas kun vi!

La neforviŝebla memoro ree kondukis nin en Kongolandon (B.). En la Virina Tago (la 8-a de marto) ĉijare, la vekiĝintaj, batalantaj virinoj de Kongolando okazigis grandiozan manifestacion, ĝoje pasigis la feston de la laborantaj virinoj de la tuta mondo, senfinaj homamasoj trairis la stratojn de la afrika urbo tretitajn antaŭe de la feraj hufoj de koloniistoj, la amasoj kun ŝprucanta entuziasmo kaj alta

batalspirito kriis sloganojn pri ĝisfina batalado por libero kaj emancipo. Subite aperis ankoraŭ pli kortuŝa sceno: batalantaj virinoj de Kongolando svarme alproksimiĝis, alte tenante grandan portreton de Prezidanto Maŭ. La publiko ĝojkriis kaj aplaŭdegis. La krioj "Vivu Maŭ Zedong!" trafendis la aeron super la tuta urbo. Kiel ni povis ne esti kortuŝitaj ĝis larmo kiam ni vidis tiun emocian scenon en Afriko malproksima de la patrio je miloj kaj miloj da kilometroj?

La batalantoj de patriotaj fortoj de Kongolando (L.) kiuj faras vivmortan batalon kontraŭ la novaj kaj malnovaj koloniistoj kun la usonaj imperiistoj ĉe la kapo iras batali kunportante la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj armas sin per la teorio de popola milito de Maŭ Zedong. Iu respondeculo de gerila taĉmento de Kongolando (L.) diris al ni: "La verkoj de Prezidanto Maŭ jam fariĝis nemalhavebla legaĵo de la gerilanoj de Kongolando. Ili rigardas la verkojn kiel trezorojn." Dum ripozado la gerilanoj kune studas kaj diskutas la verkojn de tiu granda marksist-leninisto. Gerilanoj diris: "Maŭ Zedong kvazaŭ estis iam en nia Afriko. Alie, kial ĉiu diro en lia verko estas kvazaŭ skribita por ni?"

Kiom profundiĝis la penso de Maŭ Zedong en la korojn de la popolo de Alĝerio, kiu travivis naciliberigan militon dum 7 jaroj, kiel en la jaroj de akraj bataloj, tiel en la rekonstrua periodo post sendependiĝo. Estas por ĉiam neforgeseble ke multaj oficiroj kaj batalantoj de la iama naciliberiga armeo de Alĝerio, kiujn ni renkontis sur la landlimaj frontoj en montaroj kaj densaj arbaroj, tiel bone konas la penson de Maŭ Zedong pri milito. Ni trovis verkon pri la "deksekvorta formulo" de Prezidanto Maŭ sur la lito de iu oficiro de la ĉefstabejo en la unua nokto de nia unua vizito al la orienta fronto de Alĝerio. Foje ni vidis 4 volumojn de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en franca traduko, en la oficejo de iu politika komisaro de la Naciliberiga Armeo en la landlima regiono. Sur lia tablo ni trovis ke en la fama verko *Strategia Problemo de la Ĉina Revolucia Milito* de Prezidanto Maŭ estas faritaj arablingvaj notoj en densaj linioj. Estis ne facile akiri verkon de Prezidanto Maŭ Zedong dum tiuj jaroj por la batalantoj en la fronto de Alĝerio, tiel ke iafoje ili eĉ ne povis



*En la ekspozicio pri ĉina ekonomia konstruado okazigita en Brazzaville la tieaj gejunuloj konkuras inter si por esti fotografataj antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ por esprimi sian amon kaj respekton al la granda gvidanto de la popolo de la mondo.*

ne serĉi traktadon faritan de Prezidanto Maŭ pri popola milito pere de libroj pri Ĉinio skribitaj de francaj aŭtoroj.

Foje ni tranoktis ĉe Boriĉo, kiu rakontis al ni, kiel li iris en Kapiri-montregionon por informiĝi pri la sperto de gerila milito. Li diris, ke kiam la komandantoj parolis pri siaj bataloj, ili ĉiam ripete akcentis: “Tio estas la teorio de Maŭ Zedong.” “Tio estas vortoj de Maŭ Zedong” ktp.

Post sendependiĝo de Alĝerio, ofte aperis en gazetoj kaj ĵurnaloj artikoloj, kiuj pristudis aŭ prezentis pensojn de Maŭ Zedong. Pli disvastiĝis la verkoj de Prezidanto Maŭ. Pli

multaj homoj legas liajn verkojn. Miloj kaj dekmiloj da ekzempleroj de verkoj de Prezidanto Maŭ tre rapide elveniĝis en Alĝerio.

### **EKKONO DE LA VERO “REGPOTENCO VENAS DE PAFILO”**

En Zanzibaro, la heroo popolo leviĝis por armita revolucio en januaro de 1964, kaptis armilojn el la manoj de malamikoj per hakiloj, sabroj, bastonoj el ligno kaj fero, kaj per unu puŝo renversis la feŭdan reakcian regadon longtempe subtenatan de imperismo. Rakontante pri la venko, multaj revoluciaj batalantoj, partoprenintaj la armitan ribelon, ĉiam esprimas dankojn al Maŭ Zedong pro lia orientado en la penso kaj pro tio ke liaj verkoj helpis multajn el ili koni la veron. Ili citis la vortojn de Prezidanto Maŭ, ke kie estas subpremo, tie estas rezisto, kaj ke ĉio reakcia ne falos mem, se oni ĝin ne batos. Post la venko de la revolucio, la zanzibara popolo firme tenas siajn pafilojn en la manoj, konservas altan revolucion singardemon, gardas sin severe

kontraŭ renversa intrigo de malamikoj. Multaj citis la vortojn de Prezidanto Maŭ, ke la malamikoj ne volonte rekonas sian malvenkon. Se imperismo nur tenas en siaj manoj glavojn, ankaŭ ni devas teni glavojn en niaj manoj kiel ili, kaj ni nepre ne dormu profundan dormon.

Parolante pri sia impreso post la legado de la artikolo “Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio” de Prezidanto Maŭ, iu parlamentano de Somalio diris, ke leginte tiun ĉi artikolon li ekkomprenis, kiuj estas malamikoj kaj kiuj amikoj, sur kiuj oni devas apogi sin kaj kun kiuj oni devas unuiĝi en la naciliberiga





*Membroj de la gvinea ŝtata ensemblo "Djoliba" kantas en Pekino la "Batalanta Afriko Kantas pri Maŭ Zedong kaj Lia Granda Entrepreno".*

unuecfrento kontraŭ imperiismo kaj koloniismo, kaj ekkomprenis la gravecon de edukado de framaj fortoj de la naciliberiga batalo kaj aliajn gravajn problemojn de la revolucio. Li sentis sin klara en la kapo kaj akra en la vido, kaj plifortiĝis lia fido kaj decidemo pri la nacia revolucio. Li priskribis sian impreson dum la legado de tiu ĉi artikolo tiel: kvazaŭ en longa malluma nokto ekbrulas lanterno, kiu lumigas la vojon antaŭen.

Nun la verkoj de Prezidanto Maŭ ĝuas altan estimon kaj prestiĝon ankaŭ inter multaj liberaj batalantoj de Mozambiko, Zimbabve, Angolo kaj Azanio. La afrikaj filoj kaj filinoj, kiuj heroe batalas por sia nacia sendependiga kaj liberiga afero, pli kaj pli komprenas el sia propra sperto, ke la armita batalo estas ununura ĝusta vojo por gajni venkon, kaj havas bonan komprenon pri la universala vero "regpotenco venas de pafilo" kaj la saĝaj tezoj pri popola armeo kaj popola milito elmetitaj de Prezidanto Maŭ. Tial, multaj el ili, kiuj renkontiĝas kun ĉinaj amikoj, ĉiam deziras akiri kiel donacon la verkojn pri militaj aferoj de Prezidanto Maŭ Zedong.

Kun tiuj verkoj de Prezidanto Maŭ, la batalantoj de "Portugala" Gvineo, kiuj kon-

dukas armitan batalon kontraŭ la koloniisma regado de portugaliaj koloniistoj por sia nacia liberigo, studas ilin dum batalado. Aplikante la teorion de Prezidanto Maŭ pri popola milito ili fondis vastajn revoluciajn bazojn en vilaĝoj de "Portugala" Gvineo, starigis milicojn, gerilajn trupojn kaj regulan armeon, disvolvas gerilon, konstante rebatas kaj ekstermas malamikojn, ĉirkaŭsieĝas portugaliajn koloniistojn en malmultaj urboj, kaj gajnis grandajn venkojn. En la jaro de 1964 ni renkontiĝis kun Alpha Diallo, vickomandanto de iu milita distrikto de la patriotaj armitaj fortoj de "Portugala" Gvineo, kaj donacis al li medalon kun portreto de Prezidanto Maŭ. Li varme brakumis la donacinton dirante, ke ĝuste tion ĉi li deziras de multaj jaroj, kaj li montros ĝin al siaj batalamikoj en la fronto.

### **VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ ESTAS NECESAJ LERNOLIBROJ POR REVOLUCIULOJ**

Ni vizitis ankaŭ Latinamerikon. Oni scias, ke en tiu ĉi vasta kontinento, de longe konata kiel "postkorto de Usono", nun vigle flamas naciliberigaj bataloj. Ankaŭ tie ni vidis brilajn

radiojn de la penso de Maŭ Zedong. En februaro 1963, okazis sensacia afero, skuanta la tutan okcidentan mondon. Naŭ junaj venezuelaj patriotoj armitaj kaptis la grandan ŝipon "Anzoatequi", bravege supervenkis la ĉirkaŭbaron de usonaj militŝipoj kaj aviadiloj, kaj fine kondukis la ŝipon al Brazilo. Post unu monato, ni renkontis tiujn venezuelajn bravulojn en internacia konferenco en Brazilo. Jesus, kiu funkciis kiel kapitano de la kaptita ŝipo, rakontis al ni la okazaĵon. Estas nature, ke ni esprimis nian senliman admiron al la kuraĝaj venezuelaj junuloj, aŭskultante la sensacian historion de la ŝipokapta batalo, sed ĝis nun neforgesebla por ni estas la profunda kaj arda amo de la venezuelaj revoluciuloj al la ĉina popolo kaj nia granda gvidanto. Antaŭ adiaŭo ni alpinglis malhelruĝan memorinsignon de Tian-anmen-pordego sur la bruston de Jesus. La lasta ĝojegis dirante: "Belege! Ĝustion ĉi mi volis akiri de vi. Kiam mi reiros al Venezuelo, mi portos ĝin sur la brusto en batalo, kiel en montaro tiel sur ebenejo. Mi sciigos al miaj batalamikoj, ke mi jam vidis ĉinajn kamaradojn, manpremis kaj interparolis kun ili. Niaj venezuelaj revoluciaj batalantoj ĉiam havas altan estimon por la ĉinaj kamaradoj. Ĉar ni scias, ke la revolucia Ĉinio kun sia sepcentmiliono popolo estas la plej potenca forto subtenanta nian batalon, kaj ni fieras havi tiel firman batalamikon kiel Ĉinio." Li diris plie: "En Venezuelo estas neniuj, kiu ne scias kamaradon Maŭ Zedong. Liaj verkoj jam fariĝis la plej popularaj lernolibroj necesaj por la venezuelaj revoluciuloj." Krome li forte premis al ni la manojn dirante: "Permesu al mi, pere de vi, esprimi al granda kamarado Maŭ Zedong kaj al la granda ĉina popolo la estimon de la tuta venezuela popolo."

En aliaj landoj de Latinameriko, la revoluciaj popoloj ankaŭ soife studas la penson de Maŭ Zedong — la plej altan kaj la plej vivan marksism-leninisman de nia tempo. En Ĉilio, kiam ni renkontiĝis kun grupo da progresemaĵoj, ili ofte tuŝis la temon pri studado de la verkoj de Maŭ Zedong. Ili diris, ke pro okupiteco en aliaj tagoj ili ofte faras kolektivitan studadon en dimanĉoj. Kun forta revolucia entuziasmo ili foje kaj refoje studis la artikolon "Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio" kaj aliajn verkojn de Prezidanto Maŭ lige kun la


konkretaj cirkonstancoj de Ĉilio. Foje, iu el ili diris al ni, ke Prezidanto Maŭ montris, ke por juĝi ĉu junulo estas revolucia aŭ ne, oni vidu, ĉu li volas aŭ ne kombiniĝi kun la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj tiel faras aŭ ne en praktiko. Tial la ĉiliaj revoluciuloj devas unue iri inter la amasojn de laboristoj kaj kamparanoj por kombiniĝi kun ili. Li diris ankaŭ, ke post studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ li ekkomprenis, ke la ĉiliaj marksistoj devas nepre teni sin memstaraj kaj konservi sian gvidantecon en la unueca fronto, kiam ili starigas ĝin kune kun la naciaj burĝoj. En la tagoj de nia restado en Ĉilio, Ana Eugenia Ugalde, prezidantino de la Ĉilia-Ĉina Kultura Instituto, ofte parolis kun ni pri sia sopiro al Ĉinio. Lasttempe ŝia prisonĝata deziro efektiviĝis kaj fine alvenis al Ĉinio. Tuj post eliro el la aeroplano, ŝi petis, ke ni transdonu ŝian saluton al Prezidanto Maŭ. Ŝi diris: La granda revolucia figuro de Ĉinio jam profunde gravuriĝis en la korojn de la ĉilia popolo, kaj nenio povas skui la sinceran senton kaj senliman amon de la ĉilia popolo al la estimata Prezidanto Maŭ kaj la ĉina popolo.

### MAŬ ZEDONG ILIN INSPIRAS KAJ KURAĜIGAS

Ĉie en Brazilo kies teritorio ampleksas pli ol 8,000,000 kvadratajn kilometrojn ofte aŭdiĝis la demando: "Ĉinio estas granda lando, kaj tia estas ankaŭ Brazilo. Sed Ĉinio estas liberigita; kial Brazilo ankoraŭ ne? Kial Ĉinio povis venki la armeon de Ĉiang Kajŝek kun 8,000,000 anoj armitan de Usono kaj rekte frakasis la atutajn trupojn de Usono en Koreio, sed nia Brazilo restas nun ankoraŭ sub la usona tretado?" Multaj el brazilanoj mem respondas: "Tio rezultis el tio, ke en Ĉinio estas granda marksism-leninisma komunista partio kaj Ĉinio havas la grandan popolan gvidanton Maŭ Zedong!" En la urboj aŭ en la vilaĝoj, tuj kiam brazilanoj eksciis ke ni estas ĵurnalistoj el Pekino, ili ĉiuj varme etendas manojn al ni, dirante: "Bonvenon al vi, amikoj el la lando de Maŭ Zedong!" Ĉirkaŭante nin ili ofte demandis pri la konstruado de la nova Ĉinio kaj deziris bonan sanon al Prezidanto Maŭ Zedong. En Belo Horizonte iu maljunulo nomata Jaime persiste petis nin iri al lia hejmo



En la Paiza Foiro, la bildo el Ĉinio titolita "El 600-miliona Popolo en Ĉinio Ĉiuj Estas Modeloj kaj Herooj" altiras milojn kaj dekmilojn da francaj vizitantoj, kiuj senlime amas la novan Ĉinion kaj senlime respektas Prezidanton Maŭ.



por renkontiĝi kun grupo da liaj parencoj kaj amikoj kiujn li invitis. Kiam ni eniris la salonon ili ĉiuj leviĝis kaj eksonis el gramofono la kanto "Ruĝas la Oriento". Jaime diris: "Per tio ni esprimas saluton al la nova Ĉinio, al Prezidanto Maŭ Zedong kaj al la amikoj el la de ni respektata lando." La *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* estas eldonitaj en portugala lingvo en Brazilo. Antaŭ la ŝtatrenverso en 1964, la verkoj de Prezidanto Maŭ en unuopaj eldonoj estis tre vaste vendataj en la urboj. En filozofiaj fakultatoj de iuj universitatoj, studentoj proprainiciate sin organizis por studi la filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili aplikis la penson de Maŭ Zedong por konduki akran debaton kontraŭ tieaj ĥruŝĉov-istoj. La laboranta popolo de Brazilo ege amas Prezidanton Maŭ. Foje, iu laboristo zorge eltranĉis la portreton de Prezidanto Maŭ el la bildgazeto *Ĉinio*, kiun li aĉetis, kaj diris al ni: "Mi ĝin garnos per kadro kaj pendigos sur mia muro, mi havas la plej grandan respekton por Maŭ Zedong!"

En iuj lernejoj de Meksikio fondiĝis grupoj por studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Meksikianoj diris: "La usona imperiismo estas la malamiko n-ro 1-a de la popolo de la mondo, ni meksikianoj komprenas tion aparte klare. La usonaj imperiistoj okupis duonon de nia teritorio, ni absolute ne povas forgesi tiun debeton ŝuldatan al ni!" En bankedo ĉeestata de dekoj da meksikiaj amikoj por bonvenigi

ĉinajn gastojn, iu knabino deklamis al la ĉinaj gastoj la ardajn versojn, kiujn ŝi mem verkis. Unu stanco legiĝas:

*Al l' oriento ni rigardas,  
Montriĝas tie jam aŭroro.  
Kaj kiu homo nin inspiras,  
Nin kuraĝigas kun bonvolo?  
Maŭ Zedong — la konata nomo  
kaj de ni estimata homo.*

Dum vizito al Ekvadoro, ni gastis ĉe iu gvidanto de indiana organizo en la nordorienta parto de la lando. Jam mallumiĝis, kiam ni atingis lian domon. Kiel aliaj indianoj, ankaŭ tiu gvidanto estas dungita kampilaboristo, li kulturas kampojn por bienulo. Li loĝas en malgranda kaj malalta kabano kun ronda pajla tegmento, la tuta familio vivas kune kun bovo, ŝafo kaj kokoj. Kiam li aŭdis ke alvenas ĉinaj gastoj, li fervore eliris por nin bonvenigi, ankaŭ eliris bonvenige la aliaj familioj el la najbaraj kabanoj. Estis varmaj manpremoj kaj ĉirkaŭprenoj. Ili nomis nin fratoj. Tiu gvidanto diris, ke kvankam ili neniam antaŭe vidis ĉinajn fratojn, tamen ofte aŭdis pri ĉinaj fratoj, kiuj sin liberigis sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj konstruas nun potencon landon. Li eklumigis la malgrandan olelampon (indianoj vivas tre mizere, ĝenerale ili ne lumigas lampon) kaj sidigis nin sur la maton apud bovo. Kun entuziasmo ili petis nin rakonti, kiel la

ĉina popolo venkis la klikon de Ĉiang Kajŝek kaj renversis la bienulojn kaj burokrat-kapitalistojn, sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Ili ĝoje aŭskultis nin kaj senĉese elmetis demandojn. Ili ĉiuj estis tre gajaj kaj ekscititaj kiam ili aŭdis ke la ĉinaj kamparanoj post batalado renversis bienulojn, ricevis terojn, sin organizis kaj fondis popolajn komunumojn. La gvidanto diris: “La ĉina popolo amas Prezidanton Maŭ, ankaŭ ni indianoj lin amas. La ĉinaj fratoj estas ekzemplo por ni. Kiel ĉinaj kamparanoj, ni devas leviĝi por gajni liberiĝon.”

## LA PENSO DE MAŬ ZEDONG SKUAS KAPITALISMAN MONDON

La ĉina popolo ankoraŭ tenas en sia memoro la vortojn plenajn de batalpasio, kiujn diris la gvidanto de usonaj negroj Robert Williams antaŭ kelkaj jaroj dum sia vizito al Ĉinio. Estis li, kiu rigardis la deklaron de Prezidanto Maŭ por subteni la batalon de la usonaj negroj kiel trezoron kaj per grandaj literoj enpresis ĝin en la gazeton de li redaktitan por dissendi ĝin al la negraj fratoj en Usono kaj Afriko. Estas li, kiu pendigis la subskribitan portreton de Prezidanto Maŭ en sia salono, kaj senfine rakontis pri la intervidiĝo kun Prezidanto Maŭ, neforgesebla por li la tutan vivon. En Kubo ni lin vidis pli ol unu fojon, li ofte parolis kun ni pri la inspiro, kiun donis al li kaj al la batalo de la usonaj negroj la ideo montrita de Prezidanto Maŭ en la menciita deklaro, ke la nacia problemo ja estas propre problemo de klasbatalo. Foje, aŭdinte ke la imperiistoj kaj ĉiulandaj reakciuloj atakas Ĉinion, li tuj faris refutojn. Post tio kun indigno li diris al ni: “Kiu plej firme subtenas nin? Ni negraj fratoj plej bone scias: Prezidanto Maŭ Zedong plej firme subtenas la batalon de niaj negraj fratoj de la tuta mondo!”

El la sukceso de la ĉina pavilono en la Pariza Foiro oni povas facile vidi kiel varme la franca popolo amas la novan Ĉinion kaj kiel profunde ĝi respektas Prezidanton Maŭ! En tiuj tagoj homamasoj fluis en la pavilonon seninterrompe. Post sia vizito multaj sentis ĝojon pro la atingoj de Ĉinio. Iuj priskribis sian viziton kiel “vidon de la espero de nia juneco”, aliaj diris: “Tre

bonaj estas la ĉinoj; ili donas al ni ekzemplon.” Kaj estis homoj, kiuj skribis en la notlibron jenajn sloganojn: “Vivu Ĉinio kiu alte tenas la standardon de marksism-leninismo!” “Vivu Maŭ Zedong!”. Foje ĉina ensemblo ludis en antikva urbo de Francio, maljunulino post spektado sin prezentis al la ensemblo kaj esprimis sian deziron ricevi medalon de Prezidanto Maŭ. Ricevinte ĝin, ŝi rigardadis la medalon foje kaj refoje kun granda ĝojo kaj preme ĉirkaŭbrakis la artiston, kiu donacis al ŝi la medalon. Poste dum la dua prezentado inter la spektantoj ree troviĝis tiu maljunulino, ĉifoje ŝi diris ke ankaŭ ŝia filino volas havigi al si medalon de Prezidanto Maŭ... Kiam la ĉina ensemblo vizitis Bologna, Italio, la artistoj ofte renkontis surstrate homojn, kiuj demandis ilin, ĉu ili estas el Ĉinio. Konfirmite ili ĝoje montris la dikan fingron, dirante: “Maŭ Zedong! Maŭ Zedong!” Foje la ensemblo faris viziton al Florenco, la fama itala kultura urbo; en iu fama galerio de pentraĵoj la artistoj trovis arĝentharan maljunulinon kopianta faman verkon. Kiam ŝi informiĝis ke tiuj gastoj venis el Ĉinio, ŝi turnis sin al la ĉinaj artistoj kun profundaj sentoj kaj ripete laŭdis: “Ĉinio, kiel bela lando! Ĉinio, la naskiĝloko de Maŭ Zedong!” La vortoj de franca amikino Marie Josèph elverŝis la korojn de la revolucia popolo. Ŝi diris: “Mi aparte amas la verkojn de via granda gvidanto Maŭ Zedong, ĉar mi arde amas kaj respektas lin.” Ŝi aldonis: “Mi tre volas lerni de la penso de Maŭ Zedong. Ĉar li estas granda homo, vere fidela batalanto kontraŭimperiisma. Lia granda penso skuas la kapitalisman mondon, precipe la usonan imperiismon.”

## MAŬ ZEDONG ESTAS GRANDA DIREKTILISTO DE LA MONDA REVOLUCIO

De unu kontinento al alia, ekzistas diferencoj en nacieco, lingvo kaj haŭtkoloro inter la revoluciaj popoloj, tamen ili havas same varman amon al Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ same ardan deziron lerni de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Estas senbezzone rakonti la profundan revolucian amon al Prezidanto Maŭ de la heroa albana popolo, kiu alte tenas la revolucian standardon de marksism-leninismo, aŭ priskribi la amon al nia granda gvidanto de la korea





*La albana popolo senlime amas la revolucion instruanton kaj grandan gvidanton de la popolo de la mondo Maŭ Zedong. En festotago ili ŝultroportas la grandan portreton de Prezidanto Maŭ kaj huraante antaŭenmarŝas sur la stratoj.*

kaj vjetnama popoloj, kiuj dividas kun ni la ĝojon kaj suferon kaj havas komunan sorton de vivo aŭ morto, ĉar ĉiuj tion scias. Ni ne povas forgesi la progreseman birman amikon, kies amo al la nova Ĉinio estas tiom profunda, kaj kiu tiom amas kaj respektas nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ Zedong. Li diris: "Pekino estas la simbolo de la monda revolucio. Maŭ Zedong estas la granda direktilisto de la monda revolucio. La verkoj de Maŭ Zedong dissendas brilajn radiojn kaj lumigas por la monda popolo la vojon de revolucio. Tiuj, kiuj volas revolucii, nepre devas legi serioze la librojn de Prezidanto Maŭ!" Ni ne devas forgesi ankaŭ grupon da gejunuloj en Tokio, Japanio. Ili sin organizis, jam en januaro de 1964, en "Studrondon de la Penso de Maŭ Zedong" kaj kunvenis unu fojon en ĉiu semajno por kune studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. En la daŭro de pli ol du jaroj ili persiste tion faris seninterrompe. Antaŭ nelonge tiuj japanaj gejunuloj interparolis kun ni pri sia kompreno akirita el la studo de la penso de Maŭ Zedong. Studentino de ĉina literaturo en iu universitato en Tokio diris, ke la teorio pri la meza zono elmetita de Prezidanto Maŭ Zedong estas tute ĝusta. La plej kerna punkto de la ideo ke la usona imperiismo estas papera tigo, estas fidi la fortojn de la popolo. Iu japana junulo opiniis, ke la vojo, sur kiu iris kaj iras Ĉinio sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong, prezentas ekzemplon por la popolo de la tuta mondo. Hodiaŭ estas ne eble iri la vojon al kapitalismo por la landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Kaj la vojo de Ĉinio konstrui socialismon per siaj propraj fortoj montris direkton al aliaj popoloj. Iu junulo, kiu sin okupas pri scienca esplorado, diris, ke Prezidanto Maŭ estas ne nur granda politikisto kaj milita spertulo, sed ankaŭ granda sciencisto. Prezidanto Maŭ Zedong estas tre saĝa elmetante la tri revoluciajn taskojn de klasbatalo, batalo por produkto kaj scienca eksperimento.

Kiam ni interparolis kun revoluciaj amikoj el diversaj landoj pri la impeta disvolviĝo kaj grandaj venkoj de la nunaj naciliberigaj movadoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko kontraŭ imperiismo kaj koloniismo, ili ĉiuj atribuis tiujn venkojn al la akcepto de la penso de Maŭ Zedong kiel orientilo. En sia artikolo komentanta pri la *Elektitaj Militaj Verkoj de*

*Maŭ Zedong*, la sveda verkisto Jan Myrdal montris, ke la grandeco de Maŭ Zedong kiel granda komandanto, estas nekontestebla, kaj tion rekonis eĉ liaj oponentoj jam delonge. Liaj verkoj provizis la revoluciojn de Azio, Afriko kaj Latinameriko per teoria bazo por la revoluciaj militoj, kiuj iras nun aŭ eksplodos estonte.

Ĝuste pro tio la diverslandaj revoluciaj popoloj kun forta revolucia entuziasmo studas la verkojn de Maŭ Zedong. Multaj homoj, spite la danĝeron de sia vivo, serĉas ĉie la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj sekrete ilin legas. Kaj multaj aliaj mimeografis aŭ kopiis artikolojn de Prezidanto Maŭ aŭ paragrafojn el ili por transdoni ilin al aliaj. Multaj revolucioj ne ĉesis legi librojn de Prezidanto Maŭ eĉ en malamikaj karceroj. Iu arestita venezuela revoluciulo trovis por la kunsuferantoj du ekzemplerojn de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ĉar la libroj estis nesufiĉaj por multaj homoj, la legantoj dividiĝis en grupetojn por legi kaj diskuti. Iuj eĉ ne dormis nokte kaj okupiĝis pri legado ĉe malforta lampolumo. Ni renkontis multajn amikojn, kies trezoraj ekzempleroj de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj ĵurnalaj eltranĉaĵoj de artikoloj de Prezidanto Maŭ estis jam difektitaj post multfoja legado. Ili diris: Oni ricevas ĉiufoje dum legado novan inspiron. Iuj amikoj diris: "La libroj verkitaj de Prezidanto Maŭ estas neelĉerpebla teoria trezoro, kaj por ĝin posedi oni bezonas legadi ilin ĉiutage."

## DISVASTIGO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG ESTAS NE MALHELPEBLA

Ĉiuj scias ke, post kiam la kliko de dekstralaj generaloj en Indonezio uzurpis regpotencon, ĝi faris grandajn sangajn masakrojn kaj amasajn arestojn en tiu lando de mil insuloj kaj senbride agis kontraŭ Ĉinio, kontraŭ la Indonezia Komunista Partio kaj popolo. Eĉ sub tia blanka teroro de faŝistoj, ni ankaŭ sentis ardan amon de la popolo de Indonezio al la Komunista Partio de Ĉinio kaj al nia estimata gvidanto Prezidanto Maŭ, dum ni restis en Indonezio. Kunportante kun si gipsan buston de Prezidanto Maŭ, niaj raportistoj revenis de Pekino al Djakarta en oktobro de la pasinta jaro.



*La penso de Maŭ Zedong estas la plej valora trezoro de la popolo de la mondo. Multaj homoj en Japanio studas verkojn de Prezidanto Maŭ por trovi la veron. Jen japanaj gejunuloj kunsidas por studi kaj pridiskuti verkojn de Prezidanto Maŭ.*



Kiam ili atingis la aerodromon en Djakarta, iuj indonezianoj vidis ĝin kaj ekkriis la nomon de Maŭ Zedong kun profunda emocio. Iufoje nia k-do ŝoforo legis la *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* en la aŭto, iu indonezia soldato vidis la foton de Prezidanto Maŭ sur la kovrilo, li tuj starigis sian dikan fingron, kaj ripete diris: “Maŭ Zedong, tre bona!” Tiuj aferoj okazis en Indonezio, kiam tie regis blanka teroro. Ili montras, kiel profunda estas la influo de la ĉina revolucio kaj la penso de Maŭ Zedong ĉe la indonezia popolo, kaj tiun influon la indoneziaj reakciuloj neniel povas forigi.

Ni ne povas ne mencii Sovetunion kaj iujn landojn en Orienta Eŭropo. La modernaj reviziistoj perfidintaj marksism-leninismon estas en koluzio kun imperiismo kaj diverslandaj reakciuloj kaj levis kontraŭĉinan kontraŭfluan, ili timas la veron kaj la penson de Maŭ Zedong, tial ili per ĉiuj rimedoj blokadis la verkojn de Maŭ Zedong, vane provante malebligi la disvastigon de la penso de Maŭ Zedong. Tamen, la vero neniel povas esti blokadita kaj ankaŭ la disvastigo de la penso de Maŭ Zedong neniel povas esti malebligita. Ju pli la modernaj reviziistoj blokadas la verkojn de Maŭ Zedong, des pli la tiea po-

polo deziras studi ilin; ju pli la modernaj reviziistoj atakas nian respektatan kaj amatan gvidanton Prezidanton Maŭ, des pli la tiea popolo amas lin. Dum la tempo kiam ni estis senditaj al Sovetunio kaj iuj landoj en Orienta Eŭropo, ni trovis, ke tie la vastaj popolamasoj ja volas daŭrigi la revolucion, ili firme defendas marksism-leninismon, firme oponas kontraŭ reviziismo, kaj metas la esperon sur la Komunistan Partion de Ĉinio kaj Prezidanton Maŭ. Ili diris: “Pekino estas la lumturo de la monda revolucio, kaj Maŭ Zedong estas ĝia direktilisto.”

### LA PENSO DE MAŬ ZEDONG ESTAS SUNO NENIAM SUBIRANTA


Per miloj kaj miloj da vortoj oni ne povas findiri la amon de diverslandaj popoloj en la mondo al Prezidanto Maŭ kaj ilian admiron al liaj verkoj. Ĉie kien ni iris, ĉiuj kiuj informiĝis ke ni venis el la nova Ĉinio, starigis sian dikan fingron kaj akklamis: “Maŭ Zedong!” Dum rigardo al ĉina filmo, kiam aperis Prezidanto Maŭ sur la ekrano, tuj eksplodis longtempa tondra aplaŭdado, iuj eĉ alte kriis “Vivu Prezidanto Maŭ!” La laosaj

patriotaj batalantoj kiuj batalas sur la fronto de Fukhut-monto, prenis la vortojn "Vivu Maŭ Zedong!" kiel unu el la kuraĝigaj batal sloganoj. Ni neniel povas forgesi la kortuŝan scenon en la ĉina ekspozicio okazinta en Somalio en novembro de 1965. Tiam somalianoj arope venis antaŭ la gigantan portreton de Prezidanto Maŭ por fotografiĝi sin antaŭ ĝi, oni konkure petis memorinsignojn de Prezidanto Maŭ, kaj la ricevintoj fiere portis ilin sur la brustojn. Multaj vizitantoj plenaj de emocio enskribis en la notlibron: "Saluton al Maŭ Zedong!" "Dankon al vi, Maŭ Zedong, pro tio ke vi montris al ni la direkton de antaŭenmarŝo!" "Vivu Maŭ Zedong!" Ni renkontis iun kantiston el Gvineo, kiu kun profunda emocio kantis sur sceno kanton mem komponitan "Batalanta Afriko Prikantas Maŭ Zedong kaj Lian Grandan Aferon". Li diris ke, kvankam li neniam vidis Prezidanton Maŭ, tamen li ne povas ne prikanti lin. Li diris, ke la verkoj de Prezidanto Maŭ estas fonto de forto neelĉerpebla, kaj ke lia penso estas suno neniam subiranta! Li diris, ke en Afriko

li volas dediĉi tiun kanton al la negraj fratoj, kaj li volus kanti al la blankaj fratoj, se li estus en Eŭropo kaj Ameriko. Li volas "disvastigi la veron, kiu estas batalkorno por libero, kiu estas la brila penso de Maŭ Zedong, lumiganta la universon!"


Senfinaj estas tiaj kortuŝaĵoj. Ili montras, ke en la koro de la monda revolucia popolo, Prezidanto Maŭ estas ne nur la granda gvidanto kiu gvidas la ĉinan popolon de venko al venko, sed ankaŭ la revolucia gvidanto de la popolo de la mondo. La ĉina popolo subtenas kaj amas lin, kaj same ankaŭ la popolo de la tuta mondo. La penso de Maŭ Zedong estas lumturo de la monda revolucio, la brilo de la penso de Prezidanto Maŭ lumigas la tutan globon, kaj la verkoj de Prezidanto Maŭ disvastiĝas tra la tuta mondo. Lasu la imperiistojn, diverslandajn reakciulojn kaj en- kaj eksterlandajn modernajn reviziistojn boji freneze, iliaj kalumnioj kaj atakoj al nia granda gvidanto povas neniom damaĝi la brilon de la penso de Maŭ Zedong.

*En la ekspozicio de ĉinaj belartaj verkaĵoj en Bukaresto aro da rumanaj vizitantoj staras antaŭ la ole-pentraĵo "Antaŭvespero de Decida Batalo" kaj longe rigardas la noblan figuron de Prezidanto Maŭ.*





# Prezidanto Maŭ Akceptas Revoluciajn Amasojn



Kamarado  
Maŭ Zedong  
kaj lia intima  
batalamiko,  
kamarado Lin  
Biaŭ, sur Tian-  
anmen - porde-  
go.





Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktoro de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj el diversaj lokoj de la tuta lando kaj en Pekino sur la



# *Blankhara Knabino*

Revolucia Baledo



Antaŭvespere de la nova jaro, reveninte de ŝuldevito, Jang Bajlaŭ donacas al sia filino dufutan ruĝan lanŝnuron, kaj Hi-er ege ĝojas pro tio.





Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda c  
revoluciaj instruistoj kaj lernantoj el diversaj lokoj de la tuta lando kaj en Pekino sur





direkttilisto, kaj lia intima batalamiko, kamarado Lin Biaŭ, intervidiĝas kun ruĝaj gvardianoj,  
Tian-anmen-placo. Tiutempe, ĉiuj ĝojegas kriante: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu, Vivu!"





Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko, kamarado Lin Biaŭ, kaj kamarado Ĝou Enlaj restas kune kun la reprezentantoj de revoluciaj lernantoj el diversaj lokoj de la tuta lando.

Ho, Prezidanto Maŭ, vi estas la ruĝa suno en nia koro. Ni ĉiam legos viajn verkojn, sekvos viajn vortojn, agos laŭ viaj instrukcioj kaj revolucios la tutan vivon kun vi.





# *Blankhara Knabino*

Revolucia Baledo



Antaŭvespere de la nova jaro, reveninte de ŝuldevito, Jang Bajlaŭ donacas al sia filino dufutan ruĝan lanŝnuron, kaj Hi-er ege ĝojas pro tio.





Sub ĉiurimeda turmentado kaj ofendado fare de Huang-familio, anstataŭ submetiĝi, Hi-er kuraĝe leviĝas por rezisti kaj batali.

Post forkuro el la domo de Huang-familio Hi-er kun ekscitita indigna voĉo kanta: "ne volas morti, mi deziras vivi, mi volas venĝi." (*supre maldekstre*)

Post eskapo el Huang-familio Hi-er luktas kun neĝoŝtormo kaj bestoj en sovaĝaj Spertinte tiom da alternoj de sezonoj kaj spite ke ŝiaj haroj turniĝis blankaj, Hi-er pli kuraĝa kaj pli nefleksebla en karaktero. (*supre dekstre*)

Vang Daĉun, kondukante Hi-er kaj samvilaĝanojn, renkontante al la suno, eli kavernon. (*malsupre*)





is: "Mi

montoj.  
er farigis

ris el la



Hi-er denuncas Huang Ŝijen pri liaj damnindaj krimagoj.

En la tagoj de jubilado pri liberiĝo, oni kantas: "La malnova socio turnas homon en fantomon, dum la nova socio turnas fantomon en homon."





# **La Popolo de Nia Lando Okazigis Grande- gajn Mitingojn kaj Manifestaciojn por Plej Firme kaj Plej Entuziasme Subteni la Vjet- naman Popolon Konduki la Nacisavan Ba- talon kontraŭ la Usona Imperiismo ĝis la Fino**

**E**KDE julio, en nia lando leviĝis tajdo de manifestacioj por kondamni la usonan imperiismon kiu plivastigis la agresan militon en Vjetnamio kaj por subteni la nacisavan batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo.

Je la 3-a de julio, la Registaro de nia lando publikigis deklaron plej forte kondamni la usonan imperiismon pro tio, ke ĝi komencis senskrupule kaj ripete bombadi Hanojon, ĉefurbon de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj Hajfongon, ĝian duan urbegon ekde la 29-a de junio, firme subteni la vjetnaman popolon konduki la nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fino.


Je la 22-a de julio, en la ĉefurbo Pekino proksimume miliono da popolanoj kolektiĝis sur Tian-anmen-placo kaj okazigis grandegajn mitingon kaj manifestacion por esprimi la plej firman kaj plej entuziasman subtenon de la ĉina popolo al la "Alvoko" de Prezidanto Ho Chi Minh, la granda gvidanto de la vjetnama popolo kaj la plej firman kaj plej entuziasman subtenon al la vjetnama popolo por konduki la grandan nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fina venko.

La partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de nia lando Liu Ŝaŭki, Song Kingling, Dong Bivu, Ĝou

Enlaj, Ĝu De, Deng Hiaŭping kaj aliaj partoprenis tiun mitingon.

La ambasadoro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio al Ĉinio Tran Tu Binh, la ĉefdelegito de la Konstanta Delegacio de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio al Ĉinio Tran Van Thanh estis invititaj al la mitingo. Ĉeestis la mitingon ankaŭ fremdlandaj amikoj el Azio, Afriko, Latinameriko, Eŭropo kaj aliaj regionoj de la mondo.

Ĉe la mitingo estis voĉlegitaj la Deklaro de la Prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko Liu Ŝaŭki kaj la telegramo de la ĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj Ĝu De sendita al la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Parlamento de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio Truong Chinh. La sekretario de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la vic-ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de nia lando k-do Taŭ Ĝu, la vjetnama ambasadoro Tran Tu Binh, la ĉefdelegito Tran Van Thanh, la komitatano de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la vic-ĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj



*La revolucia amaso de la ĉefurbo transdonas subtenan leteron al la Kons-tanta Delegacio de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio al Ĉinio*

kaj la prezidanto de Tutĉinia Federacio de Sindikatoj k-do Liu Ningji faris unu post alia paroladojn ĉe la mitingo, kaj ili gajnis tondrajn aplaŭdojn flanke de la tuta ĉeestantaro. Senintermite la popolamaso laŭte kriis: “Saluton al la herooa vjetnama popolo!” “Unu-igu la tutmondaj popoloj, faligu la usonan imperiismon!” “Vivu la batal-amikeco inter la ĉina kaj vjetnama popoloj!” “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Vivu Prezidanto Ho!” ktp. kaj la tuta placo prezentis scenon de leviĝantaj ondoj kaj fortega uragano.

Post la mitingo, la amaso faris grandan manifestacion.


Sekve de tio, la tajdo de la batalo subteni Vjetnamion kontraŭ la usona imperiismo disvastiĝis de Pekino al la tuta lando. En dek naŭ urboj, inkluzive de Kantono, Nanning, Kunming, Ŝenjang, Harbino, Fuĝoŭ, Hining, Lhasa ktp. pli ol 5 milionoj da personoj iris al la stratoj kaj faris mitingojn kaj manifestaciojn. Ĉe la landa limo, la popolo de la Hekoŭ-a Jaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio, Malipo-gubernio kaj Gingping-gubernio de Junnan-provinco najbare al Vjetnamio ankaŭ faris mitingojn kaj manifestaciojn je la 23-a de julio.

Laboristoj, membroj de kamparaj popolkomunumoj, komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo kaj personoj de aliaj socitavoloj en la grandaj urboj kiel Ŝanhaĵo, Tiangin, Hi-an, Ĉengdu, Vuhan ktp. ankaŭ okazigis malgrandajn kunvenojn por kondamni la ekstremajn krimagojn de la usona imperiismo.

Ĝis la 24-a de julio, la nombro de la partoprenantoj de la mitingoj, kunvenoj kaj manifestacioj tra la tuta lando atingis dek milionojn.

De la Amikeca Pasejo ĝis la Granda Hin-an-montaro, de la Tibeta Altebenejo ĝis la bordo de la Suda Maro, la partoprenantoj de la mitingoj, kunvenoj kaj manifestacioj indigne kaj kun

komuna malamo kondamnis la agreson de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio. Ili diris, ke la ĉina popolo, armita per marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, jam faris ĉiujn preparojn, ĉiam kaj ĉie respondos alvokon de la Patrio kaj alprenos necesan agon aprobitan de la ĉina kaj vjetnama popoloj por kune bati la usonajn agresantojn.








*Milicianoj de la ĉefurbo levas siajn brakojn kaj laŭte krias: "La ĉina popolo ĵuras subtenon al la vjetnama popolo!"*

*Popolamaso de la ĉefurbo nombranta proksimume milionon okazigas grandegajn kunvenon kaj manifestacion por subteni Vjetnamion kontraŭ Usono.*



# Prezidanto Ho Chi Publikis


**J**E la 17-a de julio, Prezidanto de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio Ho Chi Minh publikis “Alvokon”, severe kondamnis la netolereblajn krimojn de la usona imperiismo en ĝia barbara agresado kontraŭ Vjetnamio kaj alvokis la popolon kaj armeon de Vjetnamio unuanime

unuiĝi, ne timi malfacilaĵojn kaj oferojn, kaj firme batali ĝis la fina venko.

La plena teksto de la “Alvoko” publikita de Prezidanto Ho Chi Minh estas jena:

Samlandanoj kaj batalantoj tra la tuta lando!

*La heroaj mar-armeanoj de Vjetnamio varme respondas la batalalvokon de Prezidanto Ho Chi Minh kaj decidas ĝisfunde venki la usonajn agresantajn rabistojn timante neniujn malfacilojn kaj oferojn.*





# Minh

## “Alvokon”

La barbara usona imperiismo lanĉis la agresan militon kaj intencas aneksi nian landon. Sed ĝi estas trafanta grandan malvenkon.

Ĝi grandskale ensendis proksimume 300,000 ekspediciajn armeanojn en la sudan parton de nia lando. Ĝi utiligas la de ĝi breditajn pupan reĝimon kaj pupan armeon kiel instrumentojn de sia agresado. Ĝi uzas ekstreme barbarajn militajn rimedojn: ĥemiajn venenaĵojn, napalmajn bombojn k. s. Ĝi praktikas la politikon “ĉion bruligi, ĉiun mortigi kaj ĉion detru”. Per tiuj krimagoj, ĝi vane intencas surgenuigi niajn samlandanojn en la suda parto de nia lando.

Sed, sub la firma kaj prudenta gvido de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, la armeo kaj popolo de la suda parto de nia lando intime unuiĝas, brave batalas kaj gajnis ekstreme brilajn venkojn, kaj decidas batali ĝis la fina venko por liberigi la Sudon, defendi la Nordon kaj unuigi la patruon.

La usonaj agresantoj senbride kaj malkaŝe atakas nordan Vjetnamion per aerfortoj, intencas eviti malvenkon en la Sudo kaj devigas nin akcepti “intertraktadon” laŭ iliaj kondiĉoj.

Sed norda Vjetnamio neniam ŝanceliĝos. Nia armeo kaj popolo pli aktive disvolvas produktan konkurson kaj brave batalas.



*Prezidanto Ho Chi Minh publikigas Alvokon.*

Ĝis nun, ni jam disrompis pli ol 1,200 aerplanojn de la malamiko. Ni decidas venki la detruan militon de la malamiko, kaj samtempe ni tutanime kaj tutforte subtenos niajn osto-karne intimajn samlandanojn en la Sudo.

Lasttempe, spite ĉion, la usonaj rabistoj denove freneze faris ekstreme seriozan paŝon en la milita eskalado: ili bombadis la antaŭurbon de Hanojo kaj urbon Hajfongo. Tio estas malespera ago kvazaŭ furioza baraktado en agonio de grave vundita besto.

Johnson kaj liaj lakeoj devas kompreni: ili povas sendi 500 milojn, milionon aŭ ankoraŭ pli da soldatoj por plifortigi la agresan militon kontraŭ suda Vjetnamio. Ili povas uzi milojn da aerplanoj por intensigi la bombadon kontraŭ norda Vjetnamio. Sed ili absolute ne povas skui la ŝtalajn



*Batalantoj por publika sekureco de la popolaj armitaj fortoj en Hanojo skribas leteron al Prezidanto Ho por esprimi sian decidon konduki la nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis kompleta venko.*

volon kaj firmecon de la herooa vjetnama popolo en la nacisava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Ju pli furiozaj ili estas, des pli grandaj estas iliaj krimagoj. La milito povas daŭri ankoraŭ 5, 10, 20 jarojn aŭ plian tempon, Hanojo, Hajfongo kaj aliaj urboj, entreprenoj eble estos detruitaj, sed la vjetnama popolo ne povos esti timigita! Estas nenio pli kara ol la sendependeco kaj libereco. Kiam alvenos la tago de triumfo, nia popolo denove konstruos sian patrion pli pompa, pli belega!

Ĉiuj scias: ĉiufoje, kiam la usonaj rabis-toj preparas intensigi la kriman militon, ili ĉiam ludas trompaĵon de t. n. "paca intertraktado", vane intencante trompi la publikan opinion de la mondo kaj kulpigi Vjetnamion per tio ke ĝi ne volas "pacan intertraktadon"!

Prezidanto Johnson! Vi devas publike respondi al la popolo de Usono kaj la popoloj de la mondo: Kiu rompis la Ĝenevajn Interkonsentojn, kiuj garantias la suverenecon, sendependecon, unuecon kaj

teritorian integrecon de Vjetnamio? Ĉu la vjetnama armeo invadis Usonon kaj mortigis usonanojn? Ĉu ne estas la usona registaro, kiu sendis usonan armeon invadi Vjetnamion kaj buĉi vjetnamojn?

Usono nepre devas ĉesigi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio, nepre devas eltiri la usonan armeon kaj ĝiajn komplikajn armeojn el Vjetnamio, tiam paco tuj reaperos. Estas klara la starpunkto de Vjetnamio: tio estas la kvar-punkta pozicio de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj la kvin-punkta deklaro de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio. Alia elekto ne estas!

La vjetnama popolo tre varme amas pacon, veran pacon, pacon sur bazo de sendependeco kaj libereco, sed ne falsan pacon, "pacon" de usona tipo.

Por defendi la sendependecon de la patrio kaj por plenumi sian devon al diversaj nacioj batalantaj kontraŭ la usona imperiismo, niaj tuta popolo kaj tuta armeo, unuanime unuigitaj, ne timas malfa-



cilojn kaj oferojn, kaj firme batalos ĝis la fina venko. En la pasinteco, ni venkis la japanan faŝismon kaj la francajn koloniistojn sub multe pli malfacilaj kondiĉoj. Hodiaŭ, la enlandaj kaj internaciaj kondiĉoj estas pli favoraj al ni, la nacisava afero de nia popolo kontraŭ la usona imperiismo nepre gajnos ĝisfundan venkon.

Karaj samlandanoj kaj batalantoj!

Ni estas justaj, ni havas la solidaran forton de la popolo tra la tuta lando de la nordo ĝis la sudo kaj la tradicion de nefleksebla batalo, kaj ni akiris ankaŭ la vastajn simpation kaj subtenon de la socialismaj frataj landoj kaj la progresemaĵoj de la tuta mondo. Ni nepre venkos!

Sub la nova situacio, ni firme unuanime koncentras niajn fortojn, ne timas ĉiujn malfacilojn kaj oferojn, firme plenumas la gloran historian mision de nia nacio: venki la usonajn agresajn rabistojn!

Profitante la okazon, en la nomo de la vjetnama popolo mi esprimas varmajn dankojn al la popoloj de la socialismaj landoj kaj la progresemaĵoj de la mondo, inkluzive la usonan popolon, pro iliaj tutanimaj subtenoj kaj helpoj. Nuntempe, vizaĝe kontraŭ la nova, krima intrigo de la usona imperiismo, mi firme kredas, ke la socialismaj frataj landoj kaj la popoloj kaj registaroj de la landoj amantaj pacon kaj justecon, pliefike subtenos kaj helpos la vjetnanan popolon por konduki la nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fina venko.

Certe venkos la vjetnama popolo!

Certe malvenkos la usonaj agresantaj rabistoj!

Vivu Vjetnamio paca, unuigita, sendependa, demokratia kaj potenca!

Samlandanoj kaj batalantoj tra la tuta lando, brave marŝu antaŭen!


*Anoj de la Milica Memdefenda Trupo de norda Vjetnamio decideme respondas la alvokon de Prezidanto Ho kaj decidas konduki la nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fino.*



# Ĉinio Pretas en Ĉiu Ajn Tempo Alpreni Ĉiujn Necesajn Paŝojn por Helpi Vjetnamion en Ĝia Batalo kontraŭ Usona Imperiismo ĝis la Fino

— Parolado de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj dum  
Akceptado al Ambasadoro Tran Tu Binh

*Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj akceptas Tran Tu Binh, ambasadoron  
de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio al Ĉinio.*





Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko akceptis Tran Tu Binh, ambasadoron de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio al Ĉinio, en la 17-a de julio.

Ambasadoro Tran Tu Binh transdonis al Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kopion de la "Alvoko" publikigita de la Prezidanto de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio Ho Chi Minh en la 17-a de julio.

Ambasadoro Tran Tu Binh diris, ke la vjetnama popolo absolute ne submetiĝos antaŭ la minaco de la malamiko kaj ke la popolo de la suda kaj norda partoj de Vjetnamio donos al la malamiko pli pezan baton por frakasi la intrigon de la usona imperiismo kiu intencas devigi la vjetnaman popolon al surgenuiĝo per milita minaco. La vjetnama popolo konkeros ĉiujn malfacilojn kaj decideme kondukos la nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fino domaĝante neniajn oferojn.

En la nomo de la Vjetnama Laborista Partio, la Registaro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj la vjetnama popolo, ambasadoro Tran Tu Binh esprimis dankon al la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Registaro kaj la ĉina popolo pro la plej firma, plej ĝustatempa, plej forta kaj plej efika subteno kiun ili konstante donas al la vjetnama popolo en ĝia nacisava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Ambasadoro Tran Tu Binh montris, ke la Komunista Partio de Ĉinio estas granda, glora marksism-leninisma partio, kaj la ĉina popolo estas granda popolo armita per marksism-leninismo kaj per la penso de Maŭ Zedong, ke Ĉinio estas lando ĝisfunde revolucia, kaj ke kun la subteno de la 700-miliona ĉina popolo kaj la popoloj de ĉiuj socialismaj landoj la nacisava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo certe akiros la finan venkon.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj dankis Ambasadoron Tran Tu Binh pro lia transdono de la kopio de "Alvoko" de Prezidanto Ho Chi Minh. Kaj li ankaŭ esprimis varmajn aplaŭdon kaj subtenon al la firma decido de la Vjetnama Laborista Partio, la Registaro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj la tuta vjetnama popolo konduki la nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fina venko.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj diris, ke Ĉinio kaj Vjetnamio estas du socialismaj landoj kiuj interdependas kiel lipoj kaj dentoj kaj dividas inter si malfacilon kaj suferon. La popoloj de la du landoj ĉiam donas simpatian kaj subtenon unu al la alia en batalo kontraŭ imperiismo. Antaŭ ĉio, nun subtenas nin la granda nacisava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo, kaj tutforte subteni kaj helpi la vjetnaman popolon estas neforpuŝebla internaciisma devo de la ĉina popolo. Kion ajn faros la usona imperiismo, Ĉinio daŭre alprenos en ĉiu ajn tempo ĉiujn necesajn paŝojn, laŭ la intereso kaj postuloj de la vjetnama popolo, por subteni la grandan batalon de la vjetnama popolo ĝis la fina venko.

Parolante pri la revolucia amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj montris ke kvankam la usona imperiismo, la reakciuloj de diversaj landoj kaj la moderna reviziismo uzas ĉiuspecajn rimedojn por kalumnii kaj subfosi la rilatojn inter niaj du popoloj, la disvolviĝo de la historio difinis ke la popoloj de niaj du landoj unuiĝas kune, batalas kune kaj venkas kune. Tio estas la neevitebla tendenco de la historia disvolviĝo sendepende de la homa volo.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj esprimis sian konvinkon, ke sub la gvidado de Prezidanto Ho Chi Minh la 31-miliona vjetnama popolo, batalanta kun firmeco kaj domaĝanta neniajn oferojn, certe akiros la finan venkon.

# Nia Registaro Publikis Deklaron por Plejforte Kondamni la Usonan Imperiismon pro Ĝia Senskrupula kaj Sinsekva Bom- bado al Hanojo kaj Hajfongo

*Popolanoj el diversaj randoj de la ĉefurbo kunvenas por kondamni la bombadon al Hanojo kaj Hajfongo fare de la usona imperiismo kaj decideme subteni la vjetnaman popolon en ĝia nacisava batalo kontraŭ la usona imperiismo.*





**L**A 3-an de julio la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko publikis deklaron por plejforte kondamni la usonan imperiismon pro ĝia senskrupula kaj sinsekva bombado al Hanojo, la ĉefurbo de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, kaj Hajfongo, ĝia dua granda urbo. La plena teksto de la deklaro estas jene:

Deklaro de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko

La 3-an julio, 1966

Komence de la 29-a de junio, 1966, la usona imperiismo, spite al ĉio, daŭre bombadis Hanojon, la ĉefurbon de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, kaj Hajfongon, ĝian duan grandan urbon. La Ĉina Registaro kaj la ĉina popolo esprimas siajn senkomparan indignon kaj plej fortan kondamnon kontraŭ tia barbara, freneza kaj krima ago de agreso kaj milito de la usona imperiismo.

Post kiam la usona imperiismo unuafoje bombadis la nordan parton de Vjetnamio,

ĝi ja ekfaris plenampleksan agresan militon kontraŭ la 31-miliona vjetnama popolo. Kaj nun, disvastiginte la militan fajron al la ĉefurbo de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, la usona imperiismo levis la agresan militon al nova kaj pliserioza etapo.

La bombado kontraŭ Hanojo fare de la usona imperiismo montras ne ĝian fortecon, sed ĝian malfortecon kaj tion ke ĝi jam falis en senelirejan staton en sia agresa milito kontraŭ Vjetnamio. La ordono de Johnson pri bombado kontraŭ Hanojo spegulas ke la usona imperiismo troviĝas en embaraso kaŭzita de internaj kaj eksteraj malfaciloj, kaj estas esprimo de provo de persekutata hundo, kiu klopodas transsalti muron.

La usona imperiismo intencas per bombado kontraŭ Hanojo por minace devigi la vjetnaman popolon al submetiĝo kaj akcepto de ĝia trompo de "paca intertraktado". La laŭdezira kalkulo de la usona imperiismo estas "eldevigi pacan intertraktadon per

*La vastaj komandantaro kaj batalantaro de la Ĉina Popola Liberiga Armeo decideme esprimas, ke ili efike pliigos sian preparitecon al milito kaj estas ĉiam pretaj batali kune kun la vjetnama popolo ŝultro ĉe ŝultro.*



bombado”, por ke ĝi eterne okupu la sudan parton de Vjetnamio kaj prenu tiun parton kiel bazon por agresi la nordan parton de Vjetnamio, la tutan Hinda-ĉinion kaj la tutan Azion. Ĉio ĉi tio estas nura sonĝo. La tuta heroa vjetnama popolo, ĉu en la Sudo, aŭ en la Nordo, senĉese donas al la usona imperiismo pezegajn batojn tiel surtere kiel enaere. Tio ja estas ĝia fortega respondo al la usonaj piratoj.

En la kondiĉoj, ke la usona imperiismo rifuzas tute kaj komplete retiri sian agresan armeon kaj pli intense disvastigas sian agresan militon kontraŭ Vjetnamio, ĉiu ajn, kiu en ĉia ajn formo kolportas “pacan intertraktadon” en la vjetnama problemoj kaj eĉ faras kun Usono postkulisan negocon por efektiviĝi en kunordiĝo kun Usono la intrigon “eldevigi pacan intertraktadon per bombado”, fakte elvendas la nacisavan batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agresado kaj servas al la usona imperiismo.

La usona imperiismo jam delonge disŝiris komplete la Ĝenevajn Interkonsentojn, jam de longe rompita la limon inter la suda parto kaj la norda parto de Vjetnamio. Nun, ĝi pluapaŝe rompita tiun limon per bombado al la ĉefurbo de la heroa vjetnama

popolo. Usono devas preni sur sin la respondecon pri ĉiuj seriozaj sekvoj rezultantaj el tio.

Ĉar la limo estis jam rompita de Usono, do la vjetnama popolo estas submetita al nenia limigo, kaj ankaŭ ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj vere subtenas la vjetnaman popolon en ĝia rezistmilito kontraŭ la usona agresado, estas submetitaj al nenia limigo. Kiel fari poste la militon, jam ne decidita de Usono. Se la usona imperiismo povas alveni de aero kaj maro, kial aliaj ne povas aliri surtere?

Estas tute justa la defendo de sia patrio per ĉiuj rimedoj fare de la 31-miliona popolo de la tuta Vjetnamio. Kaj ĉiuj subtenoj kaj helpoj de la popolo de la Nordo de Vjetnamio al ĝia Sudo estas la sankta rajto de la vjetnama popolo.

Estas tute juste por ĉiuj landoj kaj popoloj de la mondo vere oponantaj la usonan imperiismon alpreni ĉiujn rimedojn por subteni kaj helpi la vjetnaman popolon en ĝia nacisava milito kontraŭ la usona agresado. Ili povas en ĉiu ajn tempo entrepreni tian agadon, kian ili mem opinias plej efika, por subteni kaj helpi la vjetnaman popolon. Tio estas tute ilia sankta rajto.

*Amaso de Tiangin nombranta 500 milojn okazigas grandegajn kunvenon kaj manifestacion por decideme subteni la justan nacisavan batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo.*





# Novaj Libroj pri la Kultura Revolucio

**Decido de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio**

**Komuniko de la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio**

**Alte Tenu la Grandan Ruĝan Flagon de la Penso de Maŭ Zedong, Aktive Partoprenu en la Granda Socialisma Kultura Revolucio**

**Vivu la Granda Proleta Kultura Revolucio**

**Pri "Trifamilia Vilaĝo"**

—La Reakcia Esenco de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan kaj Notoj de Trifamilia Vilaĝo*

Por mendo vin turnu al la perantoj de nia gazeto aŭ al la Libro-Servo de ĈEL (Poŝtkesto 313, Pekino)


La Ĉina Registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la Deklaron de Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio datitan la 30-an de junio. La Ĉina Registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la justan alvokon faritan de Prezidanto Ho Chi Minh en la nomo de la Vjetnama Registaro kaj la vjetnama popolo. En la 8-a de decembro, 1965, Prezidanto Ho Chi Minh diris: "Vjetnamio estas lando nedividebla, kaj la vjetnama nacio estas unueca tuto. Kiel gefiloj de la sama patrio la popolo de la Nordo certe unuanime kaj tutforte subtenas kaj helpas siajn gefratojn en la Sudo en ilia patriota batalo kontraŭ la usona agresado, samkiel la popolo de la Sudo unuanime kaj tutforte faras kontribuon por defendi la nordan parton de sia patrio". Li plue diris: "Ni neniam submetiĝos antaŭ la agreso de la usona imperiismo", "nia popolo decideme persistos ĉe batalo kaj elportos oferojn por dek jaroj, dudek jaroj aŭ eĉ pli longa tempo ĝis la plena venko."

Ĉinio kaj Vjetnamio estas najbaroj rilatantaj inter si kiel lipoj kaj dentoj kaj estas la plej intimaj frataj socialismaj landoj.

Ĉinio de ĉiam konstante, senrezerve kaj laŭ ĉiuj ebloj donas subtenon kaj helpon al Vjetnamio politike, morale, materie kaj en aliaj flankoj. Nun, ĉar la agresa milito farata de la usona imperiismo jam disvolviĝis al nova, pli serioza etapo, tiaj subteno kaj helpo niaj estas des pli liberigitaj de ĉia ligiteco kaj limigo. Laŭ la intereso kaj postuloj de la vjetnama popolo, ni faros en ĉiu ajn tempo necesajn paŝojn kiujn ni opinios necesaj. Tio estas nia neforpuŝebla proleta internaciisma devo.

La Ĉina Registaro kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj plurfoje deklaris serioze ke, kion la ĉinoj diras, ili plenumos, ke Ĉinio estas sinpreparinta, kaj ke kiam eksplodos la milito, ĝi ne havos limojn. Ni devas serioze averti la usonajn imperiistojn. Tute egale, kien ajn vi disvastigos la militon, kaj kiom ajn grandan prezon ni devos pagi, ni firme subtenos neŝanceliĝe la fratan vjetnaman popolon batali ĝis la fino, ĝis ĝi plene kaj komplete forpelos la usonajn agresantojn el Vjetnamio kaj gajnos la finan venkon.

Certe malvenkos la usona imperiismo, certe venkos la vjetnama popolo!



*Daĉun gvidas batalantojn de la Okavoja Armeo al la fronto. Hi-er kaj aliaj vilaĝanoj aliĝis al la batal-vicoj por konduki decideme la revolucion ĝis la fino.*

## Revolucia Baledo

### "Blankhara Knabino"

**D**UM la vigla leviĝo de la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio en nia lando estas prezentata la revolucia baledo *Blankhara Knabino*, kiu estas frukto akirita per firma sekvado de la literatura kaj arta linio de Maŭ Zedong kaj nova venko atingita en la revoluciigo de baledo post la *Ruĝa Virina Taĉmento*.

#### MEDITIGA HISTORIO

La baledo *Blankhara Knabino*, konsistanta el ok scenoj krom la preludo kaj ekstra finalo, estas kreita de la Ŝanhaja Dancarta Lernejo sur la bazo de samnoma opero.

Ĝi priskribas la obstinan lukton, kiun faris Hi-er, filino de malriĉa kamparano, kontraŭ naciperfida kaj tirana terposedanto dum la tempo de Kontraŭjapana Rezistmilito.

En venta kaj neĝa jarfina vespero, kiam revenas la malriĉa kamparano Jang Bajlaŭ de la rifuĝo

por eviti la kreditorojn, tuj alvenas la naciperfida, tirana terposedanto Huang Ŝijen kaj lia lakeo Mu Ĵenĝi kun akompano de aro da sekvantoj. La bienulo venas por devigi la kamparanon el-liveri sian filnon kiel pagon por ŝuldita sumo. Sub neretenebla indigno Jang Bajlaŭ decideme rezistas kaj frapegas la bienulon per vekto, rezulte la kamparano estas batmortigita de la sekvantoj de la bienulo. Juna malriĉa kamparano Vang Daĉun kaj aliaj samvilaĝanoj venas kulpigi la bienulon, sed Huang Ŝijen eĉ ekpafas por minaci la vilaĝanojn kaj fortiras kun si Hi-er. Vang Daĉun volas riski sian vivon por lukti kontraŭ la bienulo. Onklo Ĝaŭ, kompartiano, lin haltigas kaj admonas lin, ke li prefere aliĝu al la Okavoja Armeo kaj partoprenu la revolucion por venĝi la klasan malamon.

Perforte venigita al la domo de Huang Ŝijen, Hi-er estas multe turmentita kaj humiligita, sed ŝi absolute ne submetiĝis. Kun helpo de alia servistino onklino Ĝang ŝi eskapas el la domo



de Huang kaj sukcese evitas la postkurantojn. Hi-er kaŝas sin en dezertaj montoj kaj vivtenas per sovaĝaj fruktoj kaj legomoj, malfacile rezistante kontraŭ ventoj, neĝoj kaj sovaĝaj bestoj. Post unu jaro, ŝiaj haroj fariĝis blankaj, sed ŝia batalvolo fariĝis pli sentima kaj pli firma. Ŝi neniam forgesis pri venĝo kaj tag-nokte atendas la leviĝon de la suno en la oriento, la liberiĝon de la kamparanoj.

Fine la suno leviĝas! La Okavoja Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio liberigas ŝian hejmlokon kaj revenas ankaŭ Vang Daĉun. La Okavoja Armeo kaj onklo Ĝaŭ kaj aliaj mobilizas la amasojn por lukti kontraŭ tiranaj bienuloj. Huang Ŝijen kaj Mu Ĵenĝi provas forkuri. Sur la vojo ili renkontas pluvon kaj rifuĝas en malnovan templeton ĉe la piedo de dezerta monto, kie ili renkontiĝas kun blankhara knabino, kiu venas tien por trovi manĝaĵon. Vidante siajn mortajn malamikojn, Hi-er ne povas regi sian koleron, kiu eksplodas kvazaŭ vulkano, dum Huang Ŝijen kaj Mu Ĵenĝi estas terurita kaj forkuras konfuzite. Hi-er ilin postkuras plenforte. Tiam alvenas ĝustatempe ankaŭ okavojaj armeanoj kaj la amaso, kiuj persekutas la forkurintan bienulon.

Hi-er renkontiĝas kun Vang Daĉun. Tiom da amaraĵoj kaj malamo amasigitaj dum la longaj jaroj ekbolas en iliaj koroj. Plenaj de ĝojo kaj kortuŝiĝo ili alte kantas: "Leviĝas la suno... La suno ja estas Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio." Post la reveno al sia liberiĝita hejmvilaĝo, Hi-er indigne akuzas la krimojn de Huang Ŝijen antaŭ la samvilaĝanoj. La amaso ankaŭ lin akuzas kaj inde punas la naciperfidan, tiranan bienulon Huang Ŝijen kaj lian lakeon Mu Ĵenĝi. Fine, Hi-er aliĝas kun samvilaĝanoj al la Okavoja Armeo por ekpreni la pafilojn kaj decideme konduki la revolucion ĝis la fino.

La historio montras la krimojn de feŭdaj terposedantoj de la malnova Ĉinio, kiuj kruele subpremis la malriĉajn kaj mizerajn kamparanojn, kaj prikantas la kortuŝan luktadon, kiun la vasta suferanta kamparanaro kondukis kontraŭ la feŭdisma subpremo sub la gvidado de la Komunista Partio. Ĝi spegulas la universalan veron — kie estas subpremo, tie estas rezisto.

## ELSTARIGO DE KLASBATALO

Kreita sur la bazo de opero, la baledo *Blankhara Knabino* estas sufiĉe multe ŝanĝita kaj plibonigita en ideologia enhavo kaj tiel atingis grandan sukceson. La opero *Blankhara Knabino* naskiĝis en la tempo de demokratia revolucio de nia lando. Hodiaŭ, en la tempo de socialisma

revolucio, ĝi devas ludi pli grandan rolon por kuraĝigi kaj eduki la popolamasojn per forta spirito de la nuna epoko. Tio prezentis novajn, pli altajn postulojn al la kreintoj de la baledo. Sub la gvido de la Partio, la kreintoj studis verkojn de Prezidanto Maŭ pri klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, uzis la penson de Prezidanto Maŭ por analizi la temon kaj materialon kaj ekkomprenis pli profunde ke la rilatoj inter Jang Bajlaŭ, Hi-er kaj Vang Daĉun en unu flanko kaj Huang Ŝijen en la alia estas tiuj inter du antagonismaj klasoj vivmorte interbatalantaj. La travivaĵo de Hi-er, Daĉun k. a. priskribas ĝuste la vivon kaj sorton de sennombraj kamparanoj en la malnova Ĉinio. Kie estas subpremo, tie estas rezisto kaj batalo. La rezisto de Hi-er kaj armeaniĝo de Daĉun ĝuste spegulas la fortan deziron de la vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj al sinliberigo kontraŭ subpremo. La vojo de Hi-er kaj Daĉun estas ankaŭ la historia vojo, kiun trairis la vastaj kamparanaj amasoj de Ĉinio.

El verkoj de Prezidanto Maŭ, la kreintoj de la baledo plie ekkomprenis, ke por ĝuste esprimi la klasbatalon en la kamparo dum la demokratia revolucio estas necese elstarigi la temon de armita lukto kaj emfazi la nedisigeblecon de la klasbatalo kaj armita lukto for de la partia gvidado. La kreintoj kaj reĝisoroj de la baledo ne nur enkorpigis la rolon de la Partio en la figuroj de onklo Ĝaŭ kaj la Okavoja Armeo, sed ankaŭ en vivaj formoj koncentre esprimis la senliman dankemon kaj amon, kiujn la amaso havas por la Partio kaj la granda gvidanto Prezidanto Maŭ post la reveno de Hi-er kaj la venko en la batalo. La kantado de "La suno ja estas Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio" eldiras la koron de la vasta kamparanaro. Per tiuj aranĝoj, la kreintoj pliapaŝe profundigis kaj plialtigis la temon de la baledo.

Por elstarigi la supre menciitan temon, la ŝlosilo estas sukcese figuri la heroojn, Hi-er, Jang Bajlaŭ, Daĉun, onklo Ĝaŭ k. a., por esprimi pere de ili la rezistemon kaj revoluciemon de la malriĉaj kamparanoj.

La figuro de Hi-er estas tre bone formita en la baledo. Antaŭ la klasa malamiko ŝi montras sian firman, sentiman karakteron kuraĝi lukti ĝis la fino. Pere de kelkaj gravaj turnopunktoj de la historio, la baledo emfaze montras la formiĝadon kaj disvolviĝon de la karaktero de Hi-er: la morto de la patro kaj sia forrabiĝo, kiuj vekis ŝian fortan klasan malamon kaj decidigis ŝin venĝi la sangan maljustaĵon; turmentado suferita en la domo de Huang, kiu plifortigis ŝian volon de rezisto por sinliberigi, vivi kaj venĝi; kaj la

nehoma vivo en la dezertaj montoj kaj sovaĝaj arbaroj kaj lukto kontraŭ la naturo, kiuj pliprofundigis ŝian malamon kaj plifortigis ŝian karakteron.

Jang Bajlaŭ estas figurita kiel maljuna malriĉa kamparano plena de rezistemo. Li estas mortbatita, kiam li kontraŭbatalas la bienulon, kiu provas forrabi lian filinon per devigo de repago de ŝuldo. Tia morto estas aktiva kaj riĉa je baledemo.

La baledo ankaŭ traktas onklon Ĝaŭ kaj Daĉun en nova maniero. La unua estas figurita kiel trankvila kaj sperta sekreta kompartiano kaj la dua maturiĝas kiel firma kadro de la Oka-voja Armeo el juna malriĉa kamparano.

Oni trapasis procezon por atingi supre men-  
ciitajn rezultojn. La instruistoj kaj lernantoj de la dancarta lernejo studis la verkojn de Prezidanto Maŭ *Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio* kaj *Raporto pri Esplorado de Kamparana Movado de Hunan-provinco* por pliprofundigi sian komprenon. Prezidanto Maŭ diris tre klare, ke dum la demokratia revolucio la malriĉaj kamparanoj estas ĉiam la ĉefa forto kaj pioniroj de la revolucio. "Ili estas mortaj malamikoj de lokaj tiranoj kaj malbonaj sinjoroj kaj atakas senhezite la tendaron de la lastaj." Por pliprofundigi la komprenon pri tiuj asertoj de Prezidanto Maŭ la lernejo organizis la instruistojn kaj lernantojn por partopreni en la socialisma eduka movado en la kamparo antaŭ kaj post la kreado de la baledo *Blankhara Knabino* kaj konsulti laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn pri traktado de Jang Bajlaŭ kaj Hi-er en la baledo. Dank' al tio multe leviĝis al ĉiuj kreintoj de la baledo la nivelo de ideologio kaj kompreno, kaj ilia klasa sento estis plifortigita. Ili ekkomprenis ke la rezistemo de la malriĉaj kamparanoj Hi-er, Jang Bajlaŭ kaj aliaj prezentas la ĉefan fluon kaj esencon de la afero, kaj estas necese alte starigi la figurojn de Hi-er, Jang Bajlaŭ, onklo Ĝaŭ k. a. sur la sceno kiel la klasajn reprezentantojn de malriĉaj kamparanoj de Ĉinio kaj pere de ili prikanti la revolucionan spiriton de la laboranta popolo por eksciti la menson de la amasoj milionnombraj kaj stimuli ilian batalvolon.

## NOVAN VIVON AL BALEDARTO

Por utiligi baledon, fremdlandan klasikan artformon, en spegulado de la batalo de la modernaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de Ĉinio, serve al nia socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj en maniero komprenebla kaj akceptebla por la laboristoj, kamparanoj kaj

soldatoj, oni neeviteble frontas al demando, kiel speguli revolucionan ideologian enhavon per malnova artformo.

Kiel la kreintoj solvis tiun problemon kaj atingis kompare bonan kombinaĵon de la formo kaj enhavo? La fundamenta principo, kiun ili sekvis, estis: elirante el la revolucia reala vivo kaj la bezonoj de ideologia enhavo kaj karakteroj de figuroj, utiligi kaj reformi la malnovajn artformojn por krei novajn formojn de revolucia baledo.

Kvankam iuj teknikoj kaj dancmovoj de la artformo de la klasika baledo liveras kondiĉojn por iel utiligi ĝin, tamen ĝiaj formoj, normoj kaj teknikoj kaj ĝiaj t. n. facilaj, graciaj pozoj kaj dancstilo estas profunde stampitaj per la vivmaniero kaj pensoj kaj sentoj de la fremdlanda burĝaro. Senŝanĝe utiligante ilin por esprimi la revolucionan modernan vivon de la ĉina laboranta popolo, oni neeviteble distordus kaj malbeligus la figurojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sekve, antaŭ ol utiligi, estas necese unue reformi ilin. Por reformi oni devas havi kuraĝon detrui kaj starigi. Kun detruoj kaj starigoj estas eble disvolvi kaj krei. Detruo signifas rompi la originalajn ŝtoniĝintajn artformojn de la klasika baledo por ne esti katenita de ĝiaj malnovaj reguloj, formalajoj kaj normoj.

En praktikado, la kreintoj de la baledo profunde ekkomprenis, ke nur la batalvivo de la popolamasoj estas la sola fonto de arta kreado, kaj ke la baledoj el malnovaj tempoj estas fluo sed ne fonto kaj oni povas utiligi ilin nur kiel ekzemplojn. En solvado de la kontraŭdiroj inter malnovaj formoj kaj nova enhavo, ili antaŭ ĉio klopodas plene kompreni la vivon, poste prikonsideras la formon, kaj fine eldistilas dancmovojn. Tio signifas serĉi plej konvenajn artformojn sur la bazo de plena kompreno pri la esprimotaj vivenhavo kaj pensoj kaj sentoj de la herooj. Ekzemple, kiam la blankhara knabino ekvidis sub fulmoj siajn mortajn malamikojn Huang Ŝijen kaj Mu ĵenĝi en la templo, ŝian koron plene kaptis la dezirego: "Jen antaŭ mi la malamikoj. Ekflamas en mi la venĝemo..... Mi volas disŝiregi ilin en mil pecojn." En tiu difinita sceno, kiel ŝi devis agi? Sendube, ŝi devis persekuti la malamikojn ĉionforgesese. Ĝuste el tia kompreno, la kreintoj kaj reĝisoroj de la baledo kreis la pecon de dancado de persekuto al Huang Ŝijen fare de la blankhara knabino, tre forte esprimantan la ardan klasan malamon kaj sentiman batalspiriton de Hi-er. En tia kombino de la dancado, kvankam la dancmovoj devenas de baledo, tamen, esence ili estas transformiĝo de agoj en la vivo en artismajn kaj dancartajn movojn.



En kreado de la revolucia baledo, oni devis atingi ke la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj povos kompreni kaj ŝatos ĝin. Do la tasko ne limiĝis nur en esprimota enhavo, ĝi entenis ankaŭ la demandon, kiel esprimi por pli bone adaptiĝi al la kutimoj de aprezado, kiujn havas la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Por faciligi al la spektantaro la komprenadon, la kreintoj de la baledo rompis la malnovan regolon de baledo, — “ne uzi la buŝon” — kaj aldonis al ĝi akompanon de kanto, kreante tiel la novan formon de baledo: danco kun kanto. Kun akompano de kanto, la vidfiguro kombiniĝas kun la aŭdfiguro, kaj tio helpas samtempe en eksponado de la temo kaj de la pensoj kaj sentoj de la herooj, en plifortigo de drama atmosfero kaj en faciligo de komprenado pri la historio. Ekzemple, en la sepa sceno, kiam Hi-er estas elsavita de Daĉun kaj samvilaĝanoj kaj la kaverno estas lumigata de la ruĝa suno, eksonas la entuziasma kanto: “Leviĝas la suno..... La suno ja estas Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio.” Tiu kanto bone eldiras la pasion kiun dancado ne povas plene esprimi. En tiu tempo, la kanto kaj danco kombiniĝas en unu tutecan artfiguron, kiu produktas fortan artefikon.

La akompano de kanto, kiu trovas tre bonan akcepton ĉe la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, estas nova provo kaj nova kreo en baledo, precipe en baleda muziko.

### VENKO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

De tiom multe da jaroj, la baledo estas rigardata kiel arto “senkompare plej alta” de la tiel nomataj “specialistoj” burĝaj. Ili distrumpetas ke la baledo jam atingis “la plejsupron” de la arto. Ĝia jam estiĝinta formo estas kvazaŭ “sankta kaj netuŝebla”.

En la komenco, ekzistis diversaj opinioj ankaŭ inter la instruistoj kaj lernantoj de la Ŝanhaja Dancarta Lernejo pri la demando, ĉu la baledo povas speguli revolucian modernan vivon. Estis teorio de “senmalutilo”, kiu opiniis la baledon “unu el cent floroj kaj ke prezento de iuj senmalutilaj verkaĵoj estas permesebla en vesperkunvenoj”. Estis teorio de “reformo en la malproksima estonteco”, kiu opiniis ke revoluciigo kaj naciecigo de la baledarto kaj popularigi ĝin inter la amasoj estas afero de “malproksima estonteco”. Tiuj du opinioj povas resumiĝi en unu frazo: ne necesa, nek ebla estas revoluciigo de la baledarto.

Okaze de la Printempa Festo de la 1964-a jaro, la instruistoj kaj lernantoj iris al la kamparo kaj armitaj trupoj por fari prezentadojn. Ili ne povis resti kvietaj, kiam ili persone vidis la amon

kaj subtenon montritajn de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj al la teatraĵoj kun revoluciaj modernaj temoj kaj la fervoron de la amatoraj aktoroj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por prezenti mem tiajn teatraĵojn. Leviĝis al ili la tre akra demando, al kiuj servu finfine la baledarto. Al la plejmulto el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, aŭ al bienuloj kaj burĝoj? La partia organizo de la lernejo ĝustatempe organizis ilin por studi la verkon *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ kun tiu demando. La penso de Maŭ Zedong lumigis al ili la vojon antaŭen. Ili konvinkiĝis ke revolucia arto devas servi al la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, kiuj estas en plejmulto, kaj fariĝi konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino kaj efika armilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ ili decidis surscenigi laborantan popolon kiel heroojn en socialisma baledo kaj alpreni la revolucian batalvivon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiel tute novan enhavon de revolucia baledo, por tiel turni vere tiun arton en arttrezoron de la laboranta popolo.

La baledo *Blankhara Knabino* naskiĝis dank’ al mobilizo de la amaso kaj sekvado de la amasa linio kaj estas ankaŭ rezulto de multflanka kunlaboro, precipe de vasta konsultado al kaj aŭskulto de la opinioj de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj. La lernejo organizis tiucele multfoje kunsidojn inter la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kaj en la kunsidoj la lastaj prezentis pli ol 200 sugestojn koncerne al la temo, herooj, dancmovoj, ludteknikoj, muziko, akompana kantado kaj sceneja dekoracio. Tiuj sugestoj estas ne nur kun klara ideologio kaj profunda klasa sento, sed ankaŭ estas pli konformaj al la realo kiel de la vivo tiel de la arto. Ili estis utiligitaj kiel gravaj bazoj por senĉese plialtigi la kvaliton de la kreaĵo.

La Ŝanhaja Dancarta Lernejo havas historion nur de ses jaroj. Ĝiaj lernantoj aĝas meznombro nur 19 jarojn kaj ankaŭ la instruistoj estas tre junaj. Ĝi ne havas profesiajn verkistojn kaj reĝisorojn de baledo, nek sperton. Tamen, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ili kuraĝis krei novaĵon de socialismo kaj starigi originalecon de la proletaro por fari revolucion en la klasika baledarto. En mallonga tempo de pli ol unu jaro, ili sukcesis krei revolucian baledon kun kompare alta ideologia kaj arta nivelo kaj akumuli valoran sperton por plue efektiviĝi la revoluciigon kaj naciecigon de la baledarto kaj ĝian populariĝon inter la amasoj. Tio estas venko de la penso de Maŭ Zedong, kiu ĉiam venkas en ĉiu batalo.



*Prezidanto Maŭ intime premas la manojn de Ĉen Jongguj. La heroo revolucia emocio ondegas en la koro de 500 milionoj da kamparanoj.*

## Faligi la Prestiĝon de la “Aŭtoritatuloj” de Burĝaro

ĈEN JONGGUJ — Membro de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj, Sekretario de la Partia Filio de la Daĝaj-a Produkta Brigado de Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco

LA “aŭtoritatuloj” de burĝaro kalumnias, ke la studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas “vulgareco”, “trosimpligo” kaj “pragmatismo”. Tio ja estas absurda senencaĵo. Ni devas forbalai ĉiujn diablojn kaj demonojn per la penso de Maŭ Zedong kiel la armilo!

**Jam por Ĉiam Forpasis la Epoko Kiam la Popolo Estis Regata kaj Trompata de la “Aŭtoritatuloj” de Burĝaro, kaj Komenciĝis la Epoko Kiam la Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj Posedas Teorion**

Iuj tiel nomataj “aŭtoritatuloj” ĉiam kaj ĉie pretendas, ke ili estas “aŭtoritatuloj” kaj “instruituloj”, babilante ke la studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas “vulgareco”, “trosimpligo”. Ni diru al vi, sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro! Kian “aŭtoritaton” vi havas? Kian “prestiĝon” vi havas?

Ni jam vidis tro multe da tiel nomataj “aŭtoritatuloj” en la malnova socio. Ilia “aŭtoritato” estas tiu de subpremado al la popolo, tiu de regado al la popolo;

ilia “prestiĝo” estas “bato al malriĉuloj, insulto al malriĉuloj, malestimo al ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj”. Ilia “aŭtoritato” estas “tirana rajto” — tirani riveron, teron, monton, homon; ilia “prestiĝo” estas tiu de ofendego al malriĉuloj — bati kaj insulti malriĉulojn, trinki ilian sangon kaj manĝi ilian karnon. Nun vi sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj”, sub la mantelo de revolucio, svingante la flagon de komunista partio, vivas en socialismo, sed entreprenas konspiradon kontraŭ la Partio kaj kontraŭ socialismo, kaprompe cerbumante por servi al imperiismo kaj reviziismo. Vi, sinapogante sur la “rajto” donita al vi de la Partio kaj popolo, imponas per via prestiĝo, profitas la potencon por ofendi la popolon.

Antaŭ la Liberiĝo, en nia Daĝaj ankaŭ estis bienulaj kaj riĉkamparanaj “aŭtoritatuloj”, kiuj, krom ekspluatado kaj subpremado en ekonomio al la malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj, ankaŭ utiligis sian teorion “aŭtoritaton” por erarigi kaj trompi nin la malriĉajn kaj malsuperajn mezajn kamparanojn. Ekzemple, ili diris, ke “la nombro de loĝantaro de Daĝaj ne devas



superi tiun de tri cent, ĉar tio kaŭzus plagon”, ke “juglandarbido bezonas 18 jarojn por plenkreski kaj doni fruktojn, plantado de juglandarbo kaŭzas morton al homoj”. En tiu tempo ili ja trompis iujn. Maljunuloj ne volis planti juglandarbon, timante ke ili mem ne ĝisvivos la fruktadon; junuloj ne kuraĝis planti juglandarbon, timante ke ili mem mortos pro tio. Fakte, ĉio ĉi estis nenio alia ol la mistifiko ludita de la bienuloj kaj riĉaj kamparanoj por regi kaj trompi la kamparanojn. Post la Liberiĝo ni havigis al ni la penson de Maŭ Zedong, kaj tiuj “teorioj” de la bienularo kaj riĉkamparanaro ne plu povis regi super ni malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj. Nun la nombro de loĝantaro de nia Daĝaj pliiĝis ĝis 370, vere estas prosperiĝo en ekonomio kaj abundeco en homfortoj; la juglandarboj kiujn ni plantis, jam donis fruktojn en la dua jaro ekde sia plantado! Ni diras al vi, sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro! Kvankam vi ludis mistifikon iom pli artifice ol la antaŭaj bienuloj kaj riĉaj kamparanoj, tamen la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, kunportante kun si la “magian spegulon”, spegulos vin ĝis via plena malkovro, kian ajn mistifikon vi ludas.

La granda epoko de Maŭ Zedong estas epoko por la laboranta popolo leviĝi al revolucio, epoko por persisti en la konduko de socialisma revolucio ĝis la fino en politika, ekonomia, ideologia kaj kultura frontoj. Por ĝisfine revolucii, ĝisfine sin liberigi, la laboranta popolo devas havigi al si akran armilon. Tiu armilo estas nenio alia ol la penso de Maŭ Zedong. Por frakasi la monopolon super filozofiaj teorioj fare de la burĝaj “aŭtoritatuloj”, ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj devas leviĝi por posedi la filozofian teorion de Prezidanto Maŭ. Tio estas granda viv-morta klasbatalo inter ni kaj la burĝaro. Antaŭ la Liberiĝo de la tuta lando nia saĝa kaj granda Prezidanto Maŭ jam antaŭvidis tiun neeviteblan batalon. Li diris: “Post kiam la malamikoj kun pafiloj estis ekstermitaj, ankoraŭ ekzistas la malamikoj sen pafiloj, ili nepre faros mortbaraktan batalon kontraŭ ni, ni neniam devas subtaksi tiujn malamikojn.” Post decidiga venko de la socialisma revolucio en la tuta lando, Prezidanto Maŭ denove atentigis nin: “La batalo, kiu venkos kiun, inter socialismo kaj kapitalismo en nia lando en la ideologia kampo ankoraŭ bezonas sufiĉe longan tempon por solvi.” Ĝuste pro sia antaŭvido pri tio, li, nia amata, alprenis ĉiujn rimedojn por doni la revolucion teorion al la amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, por liberigi la filozofian teorion el la klasĉambroj, institutoj, oficejoj, kaj turni ĝin en la akran armilon en la manoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Ni ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ne perdas la esperon de Prezidanto Maŭ, agante konforme al la instrukcio de Prezidanto Maŭ, kaptis al ni la teorion pozicion. La libroj de Prezidanto Maŭ estas plej fortaj en sia klasa naturo, plej altaj en sia teoria karaktero kaj plej efikaj en sia praktikeco. Ĉiutage partoprenante la produktan batalon, klasan batalon kaj sciencan eksperimentadon, ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj povas plej bone kompreni la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj percepti la spiritan esencon de la penso de Maŭ

Zedong, tio kion ni lernas el la verkoj de Prezidanto Maŭ estas tute vera, reala kaj viva. Ni daĝaj-anoj komprenas, ke la leviĝo de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por posedi la teorion, la penson de Maŭ Zedong, ne estas ordinara problemo, sed la fundamento de revolucio, fundamento de konstruado, fundamento por preventi reviziismon kaj restarigon de kapitalismo, fundamento por kontraŭi imperiismon, fundamento por komplete frakasi la “aŭtoritatulojn” de burĝaro. Tial, ni opinias, ke studi librojn de Prezidanto Maŭ, posedi la penson de Maŭ Zedong estas la bezono de revolucio, bezono de la situacio, bezono por batali kontraŭ agresado de la usona imperiismo kaj bone konduki la militan preparadon, bezono por preventi kaj oponi reviziismon, bezono por preventi restarigon de kapitalismo. Ĝuste pro tio, estas la epoka fluo kaj nepra tendenco de la historia disvolviĝo ke la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj leviĝis por posedi la penson de Maŭ Zedong. Kiu malhelpas tiun epokan fluron, tiu agas kiel “nokta faleno sin ĵetas al la lampo — mempereigas.”

### **Ĉiu Frazo de la Vortoj de Prezidanto Maŭ Estas Vero, la Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj Kiuj Posedas la Penson de Maŭ Zedong Estas la Plej Grandaj Aŭtoritatuloj**

Iuj tiel nomataj “aŭtoritatuloj” ĉiam kaj ĉie babilaciis pri persistado de vero, ke la teorio ne devas esti “vulgargigita”, “trosimpligita” ktp. Ĉiuj ĉi tiuj estas ŝildo por kontraŭi la Centran Komitaton de la Partio kaj Prezidanton Maŭ, amuleto por kontraŭi posedon de la penso de Maŭ Zedong fare de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Mi volas demandi: Ĉu vi vere komprenas kio estas vero?

La pli ol dudekjara sperto de nia Daĝaj post la Liberiĝo pruvas, ke ĉi vero, tiu vero, finfine nur la vortoj de Prezidanto Maŭ ĉiuj estas vero. Jam ne parolu pri alio, prenu nur la batalon kontraŭ katastrofoj ekde 1963. En aŭgusto de 1963, Daĝaj trafis senprecedencan en la historio detruan katastrofon, monto rulfalis, kampoj estis ruinigitaj, domoj faligitaj, kaj vojoj baritaj. En tiu tempo, la renversitaj bienuloj, riĉaj kamparanoj kaj “aŭtoritatuloj” en Daĝaj malicĝojis, disvastigis venenaĵojn. Laŭ ilia “teorio”, eĉ post cent jaroj, estos malfacile restarigi la produktadon de Daĝaj. Tamen, ni daĝaj-anoj gravuris en nia memoro frazon de Prezidanto Maŭ: Malbona afero povas turniĝi en bonan aferon, kaj malbonaĵo povas alporti bonan rezulton. Post la katastrofo, ni, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, farinte decidon “nepre turni la malbonan aferon en bonan”, ordigis kampojn, konstruis domojn, restarigis plantidojn, lernis aplikante kaj aplikis lernante en la batalo kontraŭ katastrofo. La komunumanoj diris: “En lernado de la libroj de Prezidanto Maŭ, ni sentis ke ju pli ni studas, des pli malpeza ni sentas la premon, ju pli ni studas, des pli multajn rimedojn ni trovas, ju pli ni studas, des pli granda estas nia energio.” Vere, la spirito turniĝis en materion, en 1964 ni fundamente venkis la katastrofojn kaj akiris eksterordinare grandan riĉan rikolton en la historio de Daĝaj. En 1965 nin trafis alia 150-taga granda sekeco. Post kiam ni kondukis persistan kaj neflekseblan batalon, rezulte

ni denove akiris grandan riĉan rikolton kun pomua produkto de 398 kilogramoj da greno. De post la katastrofo ĝis nun, estas nur du jaroj kaj ok monatoj, sed nur sinapogante sur niaj pli ol 120 laborfortoj, per la spirito de “Montotranslokigo fare de Malsaĝa Avo” menciita de Prezidanto Maŭ, ni ne nur akiris en sinsekvaj jaroj riĉajn rikoltojn de greno, sed ankaŭ konstruis tegoltegmentajn domojn kun 148 ĉambroj, 60 kavernojn el bluroko kaj ĉiuj kampoj estis ordigitaj, la kvalito estis pli bona kaj la normo pli alta ol antaŭ la katastrofo. Kamaradoj kiuj vizitis Daĝaj diris, ke Daĝaj ŝanĝiĝis ĉiun monaton, ĉiun tagon. Ni respondis, ke ĉio ĉi estas dank’ al tio, ke la laboranta popolo de Daĝaj ŝatas studi la librojn de Prezidanto Maŭ, ĉiun tagon lernante. Sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro! Ĉu povas esti trovita tia “argumento” el via “teorio”? Ĉu povas esti trovitaj tiaj mirakloj en via historio? Ne, neniam trovebla.

Sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro! Ni diras al vi: Ni daĝaj-anoj ne memkontentigas pro la nun akiritaj atingoj, ni, laŭ la instruo de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”, subtenas la revolucion de la popoloj de la tuta mondo, ni plenumos kion ni promesas, por ke vi frapu viajn kapojn kontraŭ muro antaŭ la faktoj!

Sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro! Ni diras al vi: la veraj “aŭtoritatuloj” ne estas vi, sed ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiuj posedis la penson de Maŭ Zedong! En la pasinteco, en nia Daĝaj disvastiĝis kutimiro: “infanedzino\* ne fariĝas homo, se ŝi fariĝas homo, do ne homo sed drako”. Armitaj de la penso de Maŭ Zedong, ni “infanedzinoj” — la malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj — jam fariĝis “drakoj”, vi neniel kaj neniam sukcesos, se vi volas denove “forrabi nutraĵon el la buŝo de drako”.

#### **Kiu Oponas Nin Posedi la Penson de Maŭ Zedong, Tiu Estas Kontraŭevoluciulo, kaj Ni Luktos kontraŭ Li ĝis la Fino**

Sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro! Ĉu vi diris, ke la studo de la verkoj de Maŭ Zedong fare de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas “vulgareco”, “trosimpligo”? Akriĝu viajn orelojn por aŭskulti, kiel ni daĝaj-anoj diras.

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “La libroj de Prezidanto Maŭ estas trezoro el trezoroj, de kiu ni neniel povos disigi nin generacion post generacio.”

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “La teorio pri la klasa batalo de Prezidanto Maŭ estas la teorio por la malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj en ilia batalo por liberiĝo.”

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “Se nur ni bone gardas la librojn de Prezidanto Maŭ, la revolucia afero neniam perdiĝos. Ni devas legi la librojn de Prezidanto Maŭ ĉiun tagon, kaj tiel ni ne havos malfacilon en ŝanĝado de la ĉielo kaj tero.”

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “Post legado de la libroj de Prezidanto Maŭ, ni nin bone orientas, vidas pli alten, kaj neniam estos timigataj de malfaciloj.”

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “Havante la librojn de Prezidanto Maŭ, ni povas renversi la malnovan mondon, krei novan mondon, kaj defendi la novan mondon.”

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “Havante la librojn de Prezidanto Maŭ, ni povis kapti la ŝtatpotencon kaj povas teni la ŝtatpotencon.”

Sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro! Ĉu vi oponas la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn posedi la penson de Maŭ Zedong? Ĉu vi volas rompi nian ligan kun la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ? Ree akriĝu viajn orelojn por aŭskulti, kiel ni daĝaj-anoj diras.

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “Kiu oponas nin legi la librojn de Prezidanto Maŭ, tiu estas granda lakeo de imperiismo.”

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “Kiu oponas nin legi la librojn de Prezidanto Maŭ, tiu estas granda perfidulo de la Komunista Partio.”

La malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de nia Daĝaj diras: “Kiu oponas nin legi la librojn de Prezidanto Maŭ, tiu estas la Ĥruŝĉov de Ĉinio.”

Ni daĝaj-anoj generacion post generacio profunde suferegis pro la “aŭtoritatuloj” de bienuloj kaj riĉaj kamparanoj. Kaj nun ni gustumis la dolĉon de la nova socio. Mi estas pli ol 50-jaraĝa kamparano, same kiel miaj multaj klasfratoj, spertinte la amaron de la malnova socio kaj gustumante la dolĉon de la nova socio, mi plej komprenas kiu estas bona kaj kiu malbona. En la malnova socio, mi laboris pli ol 20 jarojn kiel jardungito por la bienuloj, kaj en la nova socio, mi laboris pli ol 20 jarojn por revolucio. Sub la regado de la “aŭtoritatuloj” de la bienuloj, riĉaj kamparanoj, naciperfiduloj kaj japana imperiismo, el la malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj de Daĝaj estis 40 kiuj estis al morto devigitaj de la bienuloj kaj riĉaj kamparanoj, estis 20 kiuj en la plagaj jaroj fuĝis aliloken de sia hejmloko, estis 40 kiuj estis mortigitaj de la japanaj invadantoj kaj naciperfiduloj, estis 40 kiuj estis devigitaj forvendi siajn edzinon kaj gefilojn; entute estis 140. En tiu tempo, la vivo de ni malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj estis: vagi en infan-aĝo por almozpeti, labori en mezaĝo kiel bruto por la bienulo aŭ riĉa kamparano, morti en maljun-aĝo pro malsato aŭ malsano, preskaŭ sen escepto. Nun, vi sinjoraj moŝtoj “aŭtoritatuloj” de burĝaro oponas nin posedi la penson de Maŭ Zedong, malpermesas nin sekvi Prezidanton Maŭ, tio estas, celas tiri nin returnen al la hommanĝa malnova socio. Ni diras al vi: La penso de Maŭ Zedong semita al ni la malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj en la ideologio jam enradikiĝis, burĝonis, kaj ĝi kreskos mil jarojn, dekmil jarojn, cent milionojn da jaroj. Prezidanto Maŭ diris: “Esti kontraŭstarata de malamiko estas bona sed ne malbona afero.” Vi oponas nin studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, tio ĝuste pruvas ke ni studas prave.



Ne nur ni mem studas, sed ankaŭ niaj filoj kaj nepoj studos ne ĉesante generacion post generacio. Vi provas disigi nin de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, tio estas dumtaga sonĝo! Ni scias, kiuj staras kun ni en unu familio, kaj kun kiuj ni staru en unu familio. Ni bone scias, sur kiuj ni nin apogu, kiujn ni unuigu ĉirkaŭ nin kaj kiujn batu; tiuj kiujn ni volas bati estas neniuj aliaj ol vi burĝaj "aŭtoritatuloj", la diabloj kaj demonoj!

**Kapti al Ni la "Grandan Rajton" de la "Aŭtoritatuloj" de Burĝaro, Faligi Surteren la "Prestiĝon" de "Aŭtoritatuloj" de Burĝaro**

Mi revenu al la antaŭa parolo, kial iuj tiel nomataj "aŭtoritatuloj" kuraĝis manovri sian "prestiĝon"? Ĉar ili havas rajton, potencon, kaj profitante tiujn rajton kaj potencon, kiujn ili trompe akiris de la Partio kaj popolo, ili manovris prestiĝon antaŭ la Partio kaj popolo. Tio estas neniel kaj neniam permesebla. Ni devas kapti al ni ilian "rajton", faligi surteren ilian "prestiĝon", detiri ilin de sur la trono de "aŭtoritatuloj" de burĝaro.

Sinjoraj moŝtoj "aŭtoritatuloj" de burĝaro! Vi oponis la Partion kaj Prezidanton Maŭ kun preparita, planita kaj organizita agado, kaj ankaŭ ni antaŭ longe jam faris preparadon. Prezidanto Maŭ instruis nin: Kiam la malamiko akriĝas sian glavon, ankaŭ ni devas tion fari. Vi tenas en la mano bastonon, ankaŭ ni devas tion fari. Viaj bastonoj estas "funebraj bastonoj" dum niaj estas "milkilogramaj bastonegoj". Kiel malgranda fiŝo povas levi ondegojn, kiel efemero povas skui arbegon! En 500-milionoj da kamparanoj de la tuta lando, 70 elcentoj estas malriĉaj kaj malsuperaj mezaj kamparanoj. Kion vi povas fari? Se nur ni ekkraĉas, la kraĉo jam sufiĉas vin forlavi!

Sinjoraj moŝtoj "aŭtoritatuloj" de burĝaro! Tiu batalo estis lanĉita de vi. Prezidanto Maŭ nin instruis: Rilate al la atako de la malamikoj, ni povas nur "trakti tiujn tiel, kiel tiuj traktas nin". Ĉar vi jam iniciative lanĉis tiun batalon, ni, kompreneble, devas plene armitaj iri al la batalkampoj por konduki viv-mortan batalon, kaj ni ne ĉesigos la atakon ĝis plena venko!

Viaj sinjoraj moŝtoj "aŭtoritatuloj" de burĝaro! Se vi estas viroj, vi ĉiuj staru antaŭ ni. Prezidanto Maŭ nin instruis: "Se ili batalos, ni ekstermos ilin komplete. Tiel estas la afero: Ili atakas kaj ni ekstermas ilin, jen ili estas kontentaj; iom ekstermas, iom kontentaj; multe ekstermas, multe kontentaj; komplete ekstermas, komplete kontentaj." Vi elvenas unu, ni batas unu, se vi ne elvenas, ni eltiras vin, finfine ni donos al vi kompletan kontenton.

La batalo kontraŭ "aŭtoritatuloj" de burĝaro estas batalo viv-morta. Ni vidas akre, pensas saĝe, havas grandan decidemon, se ili kuraĝas rezisti eĉ ĉe muranguleto, do ĝis kiam ili "rezistas", ĝis tiam ni batalas kontraŭ ili ĝis la fina venko de tiu granda kultura revolucio! Ni plenumos kion ni diras, kaj neniam kanonas sen obuso!

*\*Knabino aĉetita el alies domo kiel estonta edzino de sia filo.*



## En Konstruado

### ĈEFA TRUNK-KANALO KAJ NORDA TRUNK-KANALO DE ŜAŬŜAN-A IRIGACIA AREO FINKONSTRUITAJ KAJ MALFERMITAJ

En la 2-a de junio la unua grandtipa akvo-konduka konstruaĵo en Hunan-provinco — la ĉefa trunk-kanalo kaj norda trunk-kanalo de ŝaŭŝan-a irigacia areo — estis sukcese finkonstruita kaj malfermita por uzo.

La konstruado de tiuj du kanaloj komenciĝis je la 1-a de julio de la pasinta jaro kaj plenumiĝis fine de aprilo en la kuranta jaro. Ili trapasas 70 montojn kaj pli ol 80 riverojn, riveretojn kaj intermontajn ebenejojn, kaj ilia tuta longeco estas 174 kilometroj. Ili kruciĝas sur la triangula montetara regiono de Hianghiang-, Hiangtan- kaj Ninghiang-gubernioj ebligante irigaciadon al 700,000 muoj da kampo en tiuj tri gubernioj.

La kanaloj de la ŝaŭŝan-a irigacia areo utilas ne nur al irigacio sed ankaŭ al navigacio, defluigo de superakvego kaj disvolvo de akvaj produktoj. Ili ludos grandan rolon en la disvolvo de la produktado en tiu montetara regiono.

### PONTO SUPER JALUCANGPO-RIVERO EN KJUŜUJ MALFERMITA AL TRAFIKO

La unua moderna ŝosea pontego, kiu transpasas Jalucangpo-riveron en Tibeto, nome la Kjuŝuj-a Ponto de Jalucangpo-rivero, estis solene malfermita al trafiko en la 1-a de aŭgusto.

La konstruado de tiu ponto komenciĝis en la 20-a de februaro en la kuranta jaro. La tuta laboro daŭris nur pli ol 130 tagojn kaj kontentigis la postulojn pri alta kvalito, malalta kosto kaj rapida finkonstruo. Ĝi starigis por Tibeto efektivan modelon de socialisma konstruado plenumita multe, rapide, bone kaj ekonomie en disvolvo de industriaj kaj komunikaj entreprenoj.

### NOVA TIPO DE ALTKLASA AŬTOMOBILO "RUĜA FLAGO"

Antaŭnelonge la laboristoj kaj oficistoj de la Unua Aŭtomobila Fabriko de Ĉangĉun fabrikis la unuan aron da novtipaj altklasaj aŭtomobiloj kun tri vicoj da seĝoj sub la fabrika marko "Ruĝa Flago".

Por fabriki tiun ĉi novtipan altklasan aŭtomobilon oni uzas likvaĵo-preman transmisiilon, kadro-forman framon, V-forman motoron kaj multajn aliajn novajn strukturojn kaj novajn teknikojn. Ĝi posedas grandan potencon kaj altan rapidecon, kaj iras glate.

# Celu la Nigran Linion, Ĝin Forte Batu

VANG GINHI, Membro de Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj kaj  
Modela Laboranto de Kvin Bonoj de Petrolindustria Ministerio

LA granda socialisma kultura revolucio disvolviĝanta en la tuta lando, estas klasbatalo vivmorta. Ĝi estas afero kun unuaranga graveco, kiu koncernas defendon de la regpotenco de socialismo, koncernas gardon de la penso de Maŭ Zedong. Ni, la laborista klaso, devas stari en la plej antaŭa vico de la batalo, devas celi la kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman nigran linion, devas ĝin forte bati, ĝisoste bati kaj frakasi. Alie, la proleta diktaturo ne povas esti fortigita, kaj nia socialisma lando ŝanĝos sian koloron.

Deng Tuo, Vu Han kaj Liaŭ Moŝa, la plenmano da homoj, kiuj kune funkciigis la nigran gastejon "Trifamilia Vilaĝo", sub la bela nomo de rakontado de historio, de historietoj, transdonado de scio kaj humora parolo, ili elpafis unu venenan sagon post alia kaj faris frezezan atakon al la Partio kaj socialismo. Ili energie klopodis

trabati vojon por kontraŭevolucia restariĝo. Tiuj ĉi aĉuloj estas pli insidaj kaj venenaj ol malamikoj kun veraj glavoj kaj pafiloj en siaj manoj.

Ni, la laborista klaso, ĉiam batalas en la fronto en la produkta batalo, kaj devas tiel fari ankaŭ en la granda kultura revolucio. Ni suferis la plej profundan mizeron kaj la plej pezan ekspluaton en la malnova socio. Tial ni plej bone komprenas la suferon en la malnova socio kaj la nuntempan feliĉon. Deng Tuo, Vu Han kaj Liaŭ Moŝa, la plenmano da elementoj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, vane intencis retro-turni la radon de historio kaj retiri nin al la malnova vojo esti ekspluatataj kaj subpremataj. Ni diru al vi: Ne eble, dekmilfoje ne eble!

Deng Tuo, Vu Han kaj Liaŭ Moŝa diris, ke la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj ne komprenas la his-



*Modela laboranto de kvin bonoj de Daking-olekampo Vang Ginhi (gestanta) kondamnas kun indigno la nigran bandon de Deng Tuo.*





torion, ne estas kvalifikitaj por taksi historiajn personojn. Tio estas sensecaĵo! La historio estas kreita de la laboranta popolo, kiu ja estas plej rajtigita paroli. Tiuj aĉuloj, kiaj Deng Tuo kaj aliaj, povas nek labori nek plugi, sed ĉiutage kripligas kaj falsigas la historion. Ili levas la imperiestrojn, reĝojn, generalojn kaj ministrojn ĝis la ĉielo kaj tretas la laborantan popolon sub siaj piedoj. Kial ili falsigas la historion? Malkovrinte ilian veran vizaĝon, ni povas vidi, ke ili volas oponi la Partion kaj socialismon, revenigi la animon de kapitalismo, de feŭdismo.

Fi al Deng Tuo! En "Grandiozaj Vantaj Paroloj" li malice atakis nian grandan Partion. Ni rigardas la Komunistan Partion kiel nian patrinon, ni rigardas Prezidanton Maŭ kiel la sunon kaj nian savanton. Ni diras, ke "la orienta vento superas la okcidentan". Sed Deng Tuo spiras per la sama naztruo kun Ĥruŝĉov-revizismo kaj kalumniis ĉion ĉi tion "banalaj esprimoj". Mi laboris kiel petrollaboristo en Ole-kampo de Jumen de kiam mi estis dekkelkjara. Ni laboris kiel bruto, kaj post la laboro estis enfermitaj post dratobarilo. La malsanuloj estis ĵetitaj antaŭ morto en fosajon por mortintoj. Tie mi laboris dekkelkajn jarojn kaj nelonge antaŭ la Liberigo mi ankoraŭ dormis sur pajlstako, sub eluzita malnova ŝaffelo. Sen la Komunista Partio, sen Prezidanto Maŭ, kiu sciis, kien mia manpleno da ostoj estus ĵetita? Tio ja estas ververa fakto. Ni diras, ke tio estas grandioza vero, sed Deng Tuo diris ke tio estas "Grandiozaj Vantaj Paroloj". Deng Tuo riproĉis ankaŭ nian antaŭensaltegon per "Grandiozaj Vantaj Paroloj", kio estas kalumnio al la Partio kaj la laborista klaso. Ni, la laborista klaso, neniam diras vantajn vortojn. Kion ni diris, tion ni faros. Ni diris ke ni forlasos la postrestintecon de petrolo, do ni ĝin forlasis. Ni prenis la grandan ole-kampon kun alta rapideco, atingante altan nivelon, kaj starigis unuaklasan petrol-bazon de granda tipo en la mondo.

Deng Tuo, Vu Han kaj Liaŭ Moŝa, vi aro da demonoj kaj diabloj, per kiaj ajn metodoj vi artifiku, ni povas malkovri viajn verajn vizaĝojn kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn per la penso de Maŭ Zedong. La laborista klaso timas neniam demonojn kaj faligos ĉiajn demonojn. Nian Daking-olekampon ni akiris per batalado kontraŭ ĉiuj demonoj, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong. Imperiismo babilaĉas, ke nia lando estas "petrolmanka", kaj blokadis nin, reviziismo volas sufoki nin, sed tiuj demonoj ne povas difekti eĉ hareton de ni. Ni faligis ilin unu post la alia kaj akiris grandan venkon de preskaŭ kompleta memprovizo de petrolo. Vi, plenmano da demonoj kaj diabloj, estas destinitaj al la sama sorto kiel ili.

En la granda socialisma kultura revolucio, ni la Dakinganoj devas teni pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, stari en la plejfronto, forte pafadi kune kun la popolo de la tuta lando al la kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra linio de Deng Tuo, Vu Han, Liaŭ Moŝa kaj aliaj kaj senŝanceliĝe rebati ilian atakon. Ni nepre batalos kontraŭ ili ĝisfine. Antaŭ la forigo de la nigra linio, ni neniam ĉesos.

La novaĵo pri la refoja naĝado de Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero la 16-an de julio treege ĝojigis kaj kuraĝigis la popolon en diversaj lokoj de la lando. Sinsekve en la urboj Nanĉang, Anking, Tiangin, Hangĝoŭ, Kantono k. a., oni grandamase naĝis en la rivero kaj maro.

Kaj en la heroa urbo Nanĉang, pli ol tridek mil personoj naĝas ĉiutage. En la unua tago de aŭgusto, pli ol 3,500 personoj en la urbo partoprenis la naĝadon trans la rivero Gangiang.

La 30-an de julio, en la urbo Anking, Anhuj-provinco, la naĝosporton partoprenis pli ol dek mil personoj el kiuj pli ol mil transnaĝis Jangzi-riveron.

En Tiangin pli ol 1,800 personoj naĝis la 31-an de julio trans aŭ laŭ Zija-rivero, kaj la 1-an de aŭgusto, pli ol 1,300 personoj venis al la enfluejo de la rivero Hajhe kaj kune faris transnaĝadon tie antaŭ akvobarilo de Hingang.

En Hangĝoŭ, ĉi-somere ĝis la unua tagdeko de aŭg., nur tiuj naĝantoj kiuj vizitis naĝbasenojn aŭ strandojn nombris pli ol 600,000 personfojojn. La unuan kaj la duan de aŭgusto, pli ol 12,000 personoj en la urbo transnaĝis Kiantang-riveron. Ili estis komandantoj kaj batalantoj de la Liberiga Armeo, milicanoj, gejunuloj kaj geknaboj.

En Kantono, kie estas pli vaste disvolvita la naĝosporto, multaj organizaĵoj lastatempe organizis komunan naĝadon trans Perlo-rivero.

### ASTRONOMIA ALMANAKO

La ĉinaj astronomiaj almanakoj por la jaroj 1969 kaj 1970, kiujn nia lando mem pretigis, baldaŭ eliros el la presejo.

Astronomia almanako estas konsultlibro utila por la laboroj en nacia ekonomio. Ĝi enhavas detalajn registrojn pri la precizaj pozicioj de la suno, luno, grandaj planedoj kaj multaj steloj je malsamaj tempoj en la jaro kaj antaŭdonas informojn pri eklipsoj de la suno kaj la luno kaj diversajn astronomiajn fenomenojn specialajn.

En 1964, la astronomoj de la Ziginŝan-a Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcesis en provado kalkuli kaj pretigi memstare tiujaran astronomian almanakon de Ĉinio. En la jaro 1965, ili finis en 10 monatoj la pretigadon de la astronomia almanako de 1969 kaj 1970 en du libroj. La kontrolado montris ke ilia precizeco jam atingis la mondan nivelon.



*Kurban Tulum*

# *La Diversnacia Popolo de Hingiang Ĉiam Sek- vas Prezidanton Maŭ*

KURBAN TULUM, Membro de la Kongreso de Popolaj Rezentantoj de Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj Labormodelo de la Sama Regiono

**K**IAM mi aŭdis, ke la nigra bando de Deng Tuo en Pekino obstine kontraŭstaras Prezidanton Maŭ kaj la penson de Maŭ Zedong, mi tuj tiel koleriĝis, ke mia tuta korpo tremis kaj mia sango bolis en mia brusto. Je unu spiro mi kuris en la ĉambron, palpadis unu post alia la sep portretojn de Prezidanto Maŭ algluitajn sur tri muroj, zorgeme rigardis ilin, murmuris al li kelkajn vortojn, kaj nur tiam mi pli trankviliĝis. Poste, dum pluraj sinsekvaj tagoj en mia kapo ĉiutage turniĝas la ideo: Tio estas netolerebla! Mi iros al Pekino kun miaj du filoj kaj kontraŭbatalos tiun nigran bandon! La penso de Maŭ Zedong estas ruĝa suno neniam subiranta en nia koro. La nigra bando de Deng Tuo kontraŭstaras Prezidanton Maŭ kaj la penson de Maŭ Zedong, kaj ilia intenco estas forpreni la ruĝan sunon el nia koro. Kiel aŭdacaj vi estas! Mi diru al vi, ke la penso de Maŭ Zedong jam enradikiĝis en la koro de mi, Kurban Tulum, kaj en la koroj de la diversnacia popolo de Hingiang. Forpreni tiun ruĝan sunon el nia koro estas pli malfacile ol supreniri al la ĉielo. Ĉijare mi jam estas pli ol okdekjara, sed multaj el niaj konatuloj surpriziĝas pro tio, ke ju pli maljuna mi estas, des pli forta mi fariĝas, kaj ke ĉiujare mi fariĝas labor-modelo kaj mi eĉ fortendis mian barbon. Fakte tio estas neniam mirinda, ĉar en mia koro estas ruĝa suno neniam subiranta. Depost mia reveno de Pekino, kien mi dufoje veturis kaj vidis Prezidanton Maŭ, mia koro ne forlasas lin eĉ dum momento. En la tago kiam mi falĉis fragmitojn kaj distranĉis ilin por nia produkt-grupo, sopirante pri Prezidanto Maŭ, mi sentis, ke en mi troviĝas energio neelĉerpebla. Kelkfoje mi revenis post laboro al la hejmo por manĝi, sed kiam mi levis mian kapon kaj vidis la portreton de Prezidanto Maŭ, mi ree kuris eksteren kaj laboris por pli da tempo, kaj nur post tio mi denove revenis por manĝi. Ankaŭ en la nokto mi sopiras pri Prezidanto Maŭ. Antaŭ pli ol unu monato, kiam la nova ŝoseo estis malfermita al trafiko, mi sonĝis, ke laŭlonge de tiu vojo alkuras aŭ-

tomobilo kaj ĝi haltas antaŭ la pordo de mia domo. Prezidanto Maŭ, pri kiu mi sopiras tage kaj nokte, paŝas al mi en ruĝa lumo. Kun ekstazo, mi iras renkonte...

Mi, Kurban Tulum, ne povas forlasi Prezidanton Maŭ eĉ momente. Kiam la persikoj, abrikotoj kaj vinberoj en la frukto-ĝardeno maturiĝas, mi ĉiam deziras reteni la plej bonajn kaj provas trovi rimedon por sendi ilin al Prezidanto Maŭ. En la pasinta jaro mi speciale kreskigis multajn melonojn kaj mi estis preta sendi ilin al Prezidanto Maŭ, sed longe mi ne trovis la ŝancon, kaj mi estis en granda embaraso. Estas feliĉe, ke Prezidanto Liu kaj Vicĉefministro Ĉen Ji venis al Hetian, kaj mi ĝojante petis ilin transsendi du melonojn. Kvankam malnova estas la ĉapo, kiun mi portis por unuafaje vidi Prezidanton Maŭ antaŭ ok jaroj, tamen mi ankoraŭ ĉiam portas ĝin. Mi ankaŭ bone konservas la "hurĝun" (dorssako), en kiun mi pakis la donacojn por Prezidanto Maŭ, kaj la veston, kiun mi portis, kiam mi iris vidi Prezidanton Maŭ. Kaj mi elprenas kaj rigardas ilin de tempo al tempo. Kial mi surgluis sep portretojn de Prezidanto Maŭ en mia ĉambro? Ĉar tiamaniere mi povas vidi lin, en kiun ajn direkton mi turnas mian vizaĝon. Ĉiutage mi rigardas per la okuloj la portretojn de Prezidanto Maŭ kaj krias en la koro "Vivu Prezidanto Maŭ" por sennombraj fojoj.

Arbo havas sian radikon, kaj akvo havas sian fonton. La amo de mi, Kurban Tulum, al Prezidanto Maŭ ne estas senkaŭza. Tiaj kontraŭpartiaj elementoj, kia Deng Tuo, ŝatas paroli pri historio, do ankaŭ mi rakontu al vi pri mia historio. Mi, Kurban Tulum, vivis en la malnova socio dum pli ol 60 jaroj, kaj 40 jarojn el ili mi pasigis en la gregejoj kaj ter-kavoj de *baji* (riĉuloj), kaj tiam mi ankaŭ servis kiel ilia "ŝtono por surĉevaliĝo" (ŝtono kiun la bienulo tretis por sidigi sin sur la ĉevalon), banis ilin, kaj estis enkarcerigita en ilia privata malliberejo... Kian humiligon mi, Kurban Tulum, ne spertis! Ŝafte estis buĉita en la domo de *baji* po-



kelkaj tagoj, kaj mi supozis, ke mi almenaŭ povis havigi al mi iom da supo. Kontraŭe, ili trempis panon en la supo kaj manĝigis al la hundo. Tiam la malriĉuloj eĉ ne havis sian nomon en la propra senco. La nomo de mia patro estis Tulum, kiu signifas sakon el ŝafelo. Tio ne estis la propra nomo de mia patro, sed humiliga alinomo, kiun *baji* donis al li, kalumniante, ke li multe manĝas. Mi laboris por *baji* dum pli ol 40 jaroj, sed en la fino mi dronis en ŝuldoj.

Kaj vidu la nunan vivon de Kurban Tulum: mi loĝas en blanka domo, manĝas neĝ-blankajn farunaĵojn kaj fruktojn kaj trinkas lakton. Mi estis elektita kiel membro de la Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj labormodelo de la sama regiono. Okazis ankaŭ grandaj ŝanĝoj en mia hejma vilaĝo. En la pasinteco la malriĉuloj ĉi-tieaj eĉ ne havis vestojn el kruda ŝtofo, ne parolu jam pri litkovriloj. Nun ĉiuj portas vestojn el fajna ŝtofo ka el silko, kaj en ĉies domo estas litkovriloj. En la pasinteco la malriĉuloj eĉ ne havis monon por aĉeti *kantuman* (terkultura instrumento de la ujguroj) sed nun ni havas diversspecajn novtipajn agrikulturajn ilojn kaj eĉ traktorojn. Mia pliaĝa filo jam laboris kiel traktoristo. En la pasinteco regis ĉi tie sekeco kaj mankis akvo, kaj eĉ kiam la malriĉuloj volis havigi al si trinkakvon, ili suferis la ekspluatadon de *baji*. Nun la produkt-brigado konstruis novajn kanaletojn, kaj riĉa rikolto estas garantiita eĉ dum seka jaro. Antaŭ 1957 nia produkt-brigado akceptis grenojn provizitajn de la ŝtato. Ekde 1959 ni jam havas kromajn grenojn por vendi al la ŝtato. Nia produkt-brigado estas unu el la ordinaraj produkt-brigadoj de Hetian-gubernio, kaj al ĉiu loko tra la tuta Hetian kaj la tuta Hingiang, kiel al nia produkt-brigado, okazis frapante granda ŝanĝo! Tia grandega ŝanĝo ĉe mi kaj en mia hejma vilaĝo estas neniel disigebla de Prezidanto Maŭ, la penso de Maŭ Zedong kaj la bonaj ĝeneralaj kaj specifaj politikoj difinitaj de Prezidanto Maŭ. Kiel ni povas ne ami Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion, kiuj alportis al ni tiel grandegan ŝanĝon? Mi ofte pensas, ke mi, Kurban Tulum, kies gepatroj en mia juneco estis mortigitaj en turmentado de la bienuloj, ekhavas en mia aĝo de pli ol 60 jaroj gepatrojn, kaj tiuj gepatroj estas Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio. En la pasinteco, kiam ni ujguroj renkontiĝis, ni bondeziris unu al la alia la benon de *Huda* (dio). Nun ni ŝanĝis nian bondeziron en la benon de la Komunista Partio, la benon de Prezidanto Maŭ. Ĝuste por esprimi mian ardan amon al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ mi, Kurban Tulum, jam kelkfoje volis iri sur azeno al Pekino por vidi Prezidanton Maŭ. Pro la konsilo de aliaj homoj mi estis devigita reveni, kaj tiam mi deziris nek trinki nek manĝi. Poste, kiam mi informiĝis, ke tiu, kiu laboras plej bone, povos iri al Pekino por vidi Prezidanton Maŭ, en mi tuj kreskis energio por labori. Fine, en la aĝo de pli ol 70 jaroj mi fariĝis labormodelo, kaj mi dufoje veturis al Pekino kaj vidis Prezidanton Maŭ. En la kuranta jaro ankaŭ Prezidanto Liu akceptis min en Hetian. Post la Liberiĝo mi akiris mian liberon kaj mi decidis sekvi Prezidanton Maŭ ĉe ĉiu paŝo ĝis la fino. En 1959 mi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, kaj en la kuranta jaro mi plie komencis lerni la verkojn

de Prezidanto Maŭ. Mi donacis pli ol cent ekzemplerojn da verkoj de Prezidanto Maŭ al la kultura domo de la produkt-brigado kaj al diversaj produkt-grupoj, por ke ĉiuj leviĝu por revolucio sekvante Prezidanton Maŭ ĉe ĉiu paŝo.

Tamen la nigra bando de Deng Tuo volas, ke la Komunista Partio eksigu kaj "ripozu" kaj ke ni en ĉiu paŝo disigu nin de Prezidanto Maŭ, por ke la *baji* denove rajdu sur la dorsoj de ni malriĉuloj. Vere tio estas deliro en luma tago. Mi diru al vi: la tenilo de la tranĉilo estas en la manoj de ni laboranta popolo, kaj ni certe faligos vin ĉiujn diablojn kaj demonojn en la granda kultura revolucio. Viaj nigraj libroj kaj viaj nigraj paroloj neniel baras la lumon de la suno. Ju pli furioze vi kondamnas, des pli intime mi, Kurban Tulum, kaj la diversnacia popolo de Hingiang unuiĝas ĉirkaŭ la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj des pli bone ni studas la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultas liajn vortojn kaj decide sekvante lin kondukas la revolucion ĝis la fino.

Supre estas la vortoj kiujn mi diris al Prezidanto Maŭ tiutage kurinte en mian ĉambron je unu spiro, post kiam mi aŭdis pri la krimo de la nigra bando de Deng Tuo ataki la Partion. Prezidanto Maŭ, ekde nun mi, Kurban Tulum, ankoraŭ mil fojojn kaj dek mil fojojn diros al vi: Kara Prezidanto Maŭ, ni diversnacia popolo de Hingiang ĉiam arde amas vin ka sekvas vin ĉe ĉiu paŝo.

## VJETNAMAJ PROVERBOJ

- ☆ Preferu akvon de la amiko ol mielon de la malamiko.
- ☆ Donaco de la malamiko estas aŭ veneno aŭ ponardo.
- ☆ Pretigu kukon por amiko, sed pugnon por malamiko.
- ☆ Estingu fajron per malvarma akvo, konkeru malamikon per forto.
- ☆ Neniu vulpo estas honesta, kaj neniu tigo ne manĝas homon.
- ☆ Ne malestimu malfortan malamikon, kaj ne timu tiranan rivalon.
- ☆ La brilo de la suno ne estas ŝirmebla, kaj la fajro de la vero ne estingebla.

# Rabista Logiko, Hipokrita Filozofio

**L**A torento de la granda socialisma kultura revolucio nun impete forlavas ĉiujn diablojn kaj demonojn. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj intense pafas kontraŭ la kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra bando de “Trifamilia Vilaĝo”, kaj faras persekutan atakon post venko por pligrandigi la batalfrukton.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “La malamikoj ne ekstermiĝos per si mem. Nek la ĉinaj reakciuloj nek la agresaj fortoj de usona imperiismo en Ĉinio forlasos meminiacie la historian scenejon.” Por timigi homojn, manpleno da elementoj de nigra bando de Deng Tuo kaj aliaj elmetis la ekstreme putran devizon de la burĝaro: “Ĉiuj estas egalaj antaŭ la vero.” Tio estas centprocente logiko de rabistoj kaj filozofio de hipokrituloj.

## **La Tezo “Ĉiuj Estas Egalaj antaŭ la Vero” Estas Trompa Babilado de la Burĝaro**

Same kiel la imperiistoj kaj modernaj reviziistoj, la burĝoj estas unuarangaj hipokrituloj en la mondo. Estas vana la klopodo de la nigra bando de “Trifamilia Vilaĝo” intencanta utiligi la nomitan reakcian devizon por kovri sian esencon kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman.

Historio estas a plej bona atestanto. Ĝi refutas la trompan devizon de la burĝaro per sangaj faktoj. En la malnova Ĉinio, la subpremado kaj ekspluatado fare de la bienularo kaj burĝaro al la laboranta popolo, oni povas diri, atingis jam ekstremon. Tio, kion ili manĝis, estis la karno de la malriĉuloj, kaj tio, kion ili trinkis, estis ilia sango. Tamen, ili predikis senhonte pri “humaneco, justeco kaj moraleco” kaj pri “libereco, egaleco kaj homamo”, kaj en siaj satanaj temploj ili pendigis tabulon kun surskribo: “Halo de Akumulado de Bonfaroj” aŭ “Domo de Honesta Oficisto”. Sed, tio estas entute falsa montro-tabulo por “vendi viandon de hundo, elpendigante ŝafkapon kiel ŝildon”. De la infanaĝo mi kreskis banante min en amara akvo. Antaŭ la Liberiĝo, kvin el miaj familianoj estis formanĝitaj de tiuj kruelaj bestoj, kiuj sin vestas per la mantelo de “humaneco, justeco kaj moraleco”, kaj “libereco, egaleco kaj homamo”. Mia avo kulturebligis pecon da virga tero, sed ĝin uzurpis maljuste bienulo; poste kiam la avo ne povis pagi la terenton, li estis kondukita al juĝejo, tie oni katenis lin, pende ligis lin sur arbo kaj batis lin ĝis morto. La sama sorto kaptis ankaŭ miajn patron kaj

bofratinon. Mi volas demandi la nigran bandon de “Trifamilia Vilaĝo”: Vi babilas jen pri “vero” jen pri “egaleco”, sed, kia vero kaj egaleco tio estis? Mi volas demandi ankaŭ Vu Han: Kiu el via geneologio iam traktis laborantan popolon surbaze de vero kaj egaleco? Ne, tute ne. Via avo Vu Maŭhuan estis ekzekutisto, kiu masakris kaj subpremis la revoluciajn armeanojn de Tajping Ĉiela Regno. Kaj via patro Vu Bingjue estis fidela lakeo de la reakcia reganta klaso. Via familio loĝis en vasta etaĝdomo, havis dungitajn kamlaboristojn kaj servistinojn, kaj forprenis ĉiujare de malriĉuloj multegon da greno kiel terenton. Ĉu ĉio ĉi tio estis egaleco? La sangaj faktoj pruvas, ke tute ne ekzistas komuna vero kaj egaleco inter vi kaj ni malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tiuj faktoj ne povas esti kovritaj de vi kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj per viaj nigraj manoj, nek distorditaj per viaj buŝaĉoj. Facile videble, elpendigante tiun eluzitan ŝildaĉon vi fakte intencis fari kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman agadon sub tiu trompa devizo, kaj kovri vian krimon de restarigo de kaptitalismo, permesante nur al vi freneze ellasi venenon, sed ne al la popolanoj leviĝi por vin kritiki.

## **La Tezo “Ĉiuj Estas Egalaj antaŭ la Vero” Estas Distordo de la Historio de Klasbatalo**

La reganta klaso kaj la regata klaso estas mortaj malamikoj. Aŭ tiu subpremas ĉi tiun, aŭ ĉi tiu subpremas tiun, kaj la diferenco kuŝas nur en tio, ĉu la plimulto regas la malplimulton aŭ la malplimulto regas la plimulton. Inter ili tute ne ekzistas komunaj klasaj interesoj nek la tiel nomata komuna “vero”. Ĝuste male, ili troviĝas tute en antagonismo politike, ekonomie kaj ideologie, kaj inter ili absolute ne ekzistas la tiel nomata egaleco. La devizo “ĉiuj estas egalaj antaŭ la vero” elmetita de la nigra bando de “Trifamilia Vilaĝo” estas radikala distordo de la historio de klasbatalo.

La historio de la malnova Ĉinio dum miloj da jaroj antaŭ la Liberiĝo estas historio de subpremado al la laboranta popolo fare de la ekspluatantaj klasoj. En tiu ekstreme kruela, kanibala socio, oni eĉ ne preterlasis min dekkvin-jaran knabon. Oni ŝarĝis min per servlaboro kaj kaptis min kiel rekruton, pelante min de unu morta vojo al alia. Mi fuĝis al Gansu-provinco kvarcent liojn for kaj tie laboris kiel jardungito de bienulo. Ĉiuj korvoj en la mondo estas same nigraj. La trijara doloro de jardungito enplantis en mian memoron klasan



malamon. Iufoje, mi suferis de tifo. Mia nazo sangis dum pli ol unu horo kaj mi svenis. Ĉu iu el tiuj “bonkoraj” sinjoroj kun sankta skribo en la mano kaj preĝoj sur la lipoj ĵetis al mi solan rigardeton aŭ trinkigis al mi guton da malvarma akvo? Neniu! Nur dank’ al blovado de malvarma vento, mi rekonsciigis. Kiam mi volis iom sunumi min sub tegmentrando, la malica bienulino tute neatendite donis al mi baton sur la kapo per bambu-bastono kaj pelis min al la monto por kolekti brullignon. Mi grimpis kaj grimpis, ĝis mi venis sur la monton; mi ploradis tie rigardante en la direkto de mia hejmvilaĝo ĝis la suno kliniĝis okcidenten. Tri jaroj pasis. Mi neniam konis saton kaj varmon, kaj mi ne ricevis eĉ unu moneron krom malsano tra mia tuta korpo.

Proverbo diras, ke kiu semas, tiu rikoltas. Sed, en la malnova socio, grensemantoj havis nenion por manĝi, kaj kotonkulturantoj havis nenion por sin vesti. Kia vero kaj egaleco estas en tio?

Post kiam la ĉina popolo prenis en siajn manojn la regpotencon de la tuta lando sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, klasbatalo ankoraŭ ne finiĝis. Sed nun estas historio de klasbatalo, en kiu la laboranta popolo, kiu fariĝis mastro de la lando, kontraŭe al la pasinteco, regas vin malplimulton. Kiel ni agas kontraŭ vi, tiel ni agas ankaŭ kontraŭ la usona imperiismo, kiu spiras per la sama naztruo kun vi. Ĉar la imperiistoj volas nin mortigi, ni do devas disrompi ilian kapon. Tio estas vero, kaj tio estas egaleco. Kiam la usona imperiismo agresis Koreion, la milito ne alportis al ĝi ian bonon. Poste ĝi turnis sin al “intertraktado”, en kiu ĝi friponis per ĉiuj rimedoj. Kontraŭ la malamiko ekzistas nur unu rimedo: Bato! “Argumentu” kun ĝi per maŝinpafiloj, kanonoj kaj grenadoj. Je la 13-a de julio, 1953, nia armeo lanĉis fortan rebaton sur la fronto ĉe Kumsong. Tiam mi estis vicestro de rekognoska plotono. Mi komandis la “pintatranĉilan subplotonon” por fari surprizatakon al la malamika komandejo de “Blanktigra Regimento” laŭ la ĝenerala postulo de la kampanjo kaj venke donis helpon al la ĝenerala ofensivo. Niaj kanonoj malfermis sian buŝon kaj niaj maŝinpafiloj ekparolis, kaj la usonaj imperiistoj ĉesis esti arogantaj. Ĝuste tiaj senvaloruloj estis la malamikoj: “Se ni ekstermas ilin, ili estas kontentaj. Se ni iom ekstermas, ili estas iom kontentaj; multe ekstermas, multe kontentaj; komplete ekstermas, komplete kontentaj.” Jen la vero de proleta revolucio kaj de marksism-leninismo. Jen la granda penso de Maŭ Zedong.

En la nuna granda socialisma kultura revolucio, la nigra bando de “Trifamilia Vilaĝo” elmetis la absurdan tezon, ke “ĉiuj estas egalaj antaŭ la vero” por oponi la proletaron kaj protekti la burĝaron. Mi volas laŭte diri al vi: “Blindaj estas viaj okuloj!” La klasbatalo inter ni kaj vi kontraŭrevoluciuloj kontraŭpartiaj kaj kontraŭpopolaj estas vivmorta klasbatalo. Koncerne tion oni ja povas neniel paroli pri egaleco.

**La Tezo “Ĉiuj Estas Egalaj antaŭ la Vero” Estas Opono kontraŭ Proleta Diktaturo**

La burĝaj sinjoroj, kiuj distrumpetas ke “ĉiuj estas egalaj antaŭ la vero”, subpremis nin tiom longe en la

malnova socio kaj eĉ ne unu fojon traktis nin en egaleco. Nun, kiam ni vin faligis sub la saĝa gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, vi tamen postulas de ni, ke ni traktu vin en “egaleco”. Vi evidente volas, ke ni forlasu la diktaturon kontraŭ vi. Tio estas absolute neebla. Prezidanto Maŭ diris al ni klare, ke la proleta diktaturo “estas tre bona afero kaj magiaĵo por sinprotektado, heredenda de generacio al generacio. Tiu magiaĵo absolute ne devas esti forlasota, ĝis imperiismo eksterlande kaj la klasoj enlande estos ĝisfunde kaj komplete neniigitaj.” Tio estas fundamenta sinteno de ni liberigintaj laboristoj, malriĉaj kamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj aliaj laborantaj popolanoj kontraŭ la reakciuloj en- kaj eksterlandaj. Eble vi volas demandi: Ĉu tio ne estas malegaleco? Vi pravas. Se ni ne tiel agus, malsukcesus la revolucio, suferus la popolo kaj pereus la ŝtato. Krome nia agmaniero ja ne estas ia nova kreaĵo, ni ĝin lernis de la reakciuloj. Tio estas nenio alia ol: “Kiel li traktas aliajn, tiel ni traktas lin!”

Fakte, vian artifikon ni jam konis delonge de la ĥruŝĉov-reviziistoj. La ĥruŝĉov-reviziistoj iam konsideris sin en supereco kaj pelis siajn peonojn per direktobastono, freneze bojis, kriaĉis kaj faris ĉirkaŭatakon kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio, kvazaŭ la tuta mondo estus nenio antaŭ ili. Sed, kiam ilia kolorigita haŭto estis deŝirita de la Komunista Partio de Ĉinio kaj aliaj marksism-leninismaj partioj, kaj ilia esenco de papertigro estis malkaŝita, ili denove elpendigis la ŝildon de la tiel nomata “intertraktado en egaleco” farota “sur la bazo de marksism-leninismo”, dezirante malhelpi la fortan rebaton de marksist-leninistoj kaj gardi sian ŝanceliĝantan pozicion. Nun, vi nigra bando kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma vane provas denove ĉarlatani per la eluzita sloganaĉo “ĉiuj estas egalaj antaŭ la vero”, por daŭre defendi vian kontraŭpartian kaj kontraŭpopolan “fortikajon”, subfosi la fortan proletan diktaturon kaj efektiviĝi la restarigon de kapitalismo. Tio estas neniam realigebla.

Vi kontraŭrevoluciuloj kontraŭkomunismaj kaj kontraŭpopolaj insultis nin tiom da jaroj, verkis tiom da nigraj libroj, eldiris tiom da nigraj paroloj kaj senskrupule, senbride atakis nian karan Partion kaj ĝian gvidadon. Kaj nun vi provas levi la eluzitan flagon “ĉiuj estas egalaj antaŭ la vero” por sigeli la buŝon al ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ĉirkaŭligi niajn manojn. Tio signifas, ke estas permesite al vi fari incendion kaj malpermesite al ni eĉ lumigi lampon. Tio estas neebla, absolute neebla! Kontraŭ vi ni havas nur unu rimedon, t. e., praktiki al vi diktaturon, permesi al vi nur kondukti discipline kaj ne permesi al vi paroli aŭ agi senbride. En la pasinteco, vi ne sukcesis subigi nin; estas nur freneza aspiro de idioto, ke vi hodiaŭ volas efektiviĝi restarigon de kapitalismo!

---

*\*La aŭtoro estas unuaklasa heroo de la antaŭa Ĉina Popola Volontula Armeo por Rezisti Usonon kaj Help Koreion, en kiu li servis kiel vicestro de rekognoska plotono, kaj nun li estas vic-batalionestro de Ĉina Popola Liberiga Armeo.*

# Riĉa Rikolto en la "Regiono Malpermesita" al Agrikulturo

**PHAGRI** — alta urbo en la mondo, kiu situas inter glaciaj kaj neĝaj montoj de Himalajo kaj estas 4200 metrojn super la marnivelo, rikoltis en 1965 pli ol 100,000 kg. da grenoj sur pli ol 2000 muoj da tero.

## NENIAM PRODUKTIĜIS GRENOJ

"En Phagri neniam produktiĝis grenoj" — oni tiel konkludis en la pasinteco. La loko estas alta kaj malvarmega, kaj la klimato estas variema. Iumomente la ĉielo estas serena, kaj post nelonge nigraj nubegoj eble kovras la ĉielon, uragano hurlas kaj hajlo falas verŝe, aŭ dense neĝas. Laŭ la statistiko de meteorologia stacio, la absolute senprujna periodo en Phagri daŭras nur pli ol 30 tagojn ĉiujare, ĝia plej malalta temperaturo estas pli ol 30° C. sub nulo kaj la plej alta mez-temperaturo estas nur ĉirkaŭ 17° C.

Ĉi-tieaj servutuloj generacion post generacio peladis transportajn arojn da muloj por grandaj servut-mastroj kaj grandaj komercistoj, aŭ vagadis sur krutaj vojoj tutjare dorsportante pezajn varpakaĵojn. La grenprovizo de la loĝantoj dependis tute de aliaj lokoj.

## LA UNUA RIKOLTO

La demokrati-reforma movado en 1959 rompis la kriman feŭdan servutulan sistemon, liberigis la produktan forton kaj ankaŭ la homan penson.

La phagri-anoj firme decidis kulturigi grenojn sur sia propra tero por sia nutrado.

Tio estas batalo kontraŭ la naturo. Volante kulturigi grenojn sur la tero "neniam produktinta grenojn", kompreneble oni renkontos multajn malfacilojn. Sed la liberigitaj servutuloj havis firman volon, kuraĝon kaj persistecon. Ili komencis streĉan batalon per neŝancel-ebla spirito.

Antaŭa servutulino kaj nuna komunistino Trugtog estis estrino de la dua komitato de loĝantoj. Ŝi semis ĉinkon (*hordeumvulgare var. nudum Hook. f.*) sur unu muo da tero. Tiam iuj mokis ŝin freneza ke ŝi disĵetis bonajn grenojn en la teron, sed ŝi ne timis alies mokojn kaj diligente laboris. En la sama tago, en kiu Trugtog semis, ankaŭ antaŭa servutulino Ngojdrub de la unua komitato de loĝantoj kulturis iom da tero kaj semis 10 kg. da ĉinko.

Sub ilia influo ankaŭ aliaj eksemis ĉinkon.

En tiu jaro la phagri-anoj prisemis sume 50 muojn da tero, ili decidis ke ĉio trairu provojn kaj estu pruvata per praktiko. Per siaj firmeco kaj persisteco ili faris senĉesajn luktojn kontraŭ la malfavoraj kondiĉoj de vetero: vento, prujno, pluvo kaj neĝo, kaj fine akiris bonan rikolton post tiujara aŭtuno. Trugtog rikoltis 120 kg. en sia kampo, ankaŭ Ngojdrub rikoltis 90 kg. per 10 kg. da grensemoj. La fakto malfermigis la okulojn de la phagri-anoj, vizitantoj senĉese venis, forirante ili ĉiuj kunportis kelkajn dikajn spikojn de ĉinko por atesti ke grenoj povas esti kulturataj en Phagri.



*La popolo en Phagri konkeris ĉiujn malfacilojn kaj akiris riĉan rikolton.*



*Por akiri pli bonan rikolton Phagri-anoj veturigas ĉarojn sur neĝo por transporti sterkaĵojn al la kampoj.*



## SENTIMO ANTAŬ MALSUKCESOJ

El la faktoj la phagri-anoj ricevis instruojn, la prove prisemita areo plivastiĝis jaron post jaro. 50 muoj estis prisemitaj en 1960, la areo plivastiĝis en 1961 ĝis 300 muoj, en 1962 jam ĝis 1700 muoj. En la 3 sinsekvaj jaroj la phagri-anoj rikoltis ĉiujare, sed ankaŭ renkontis malfacilojn, eĉ malsukcesojn ĉiujare. Ekzemple, la senprujna periodo de Phagri estas tro mallonga, kiam oni semis tro malfrue, la plantoj suferis atakon de prujno dum la maturiĝo de siaj spikoj; kiam oni semis tro frue, la plantoj difektiĝis pro frostiĝo. Sed ĉio ĉi tio ne mal-kuraĝigis la phagri-anojn nek ŝancelis ilian volon.

Por trovi ĝustan tempon por semado kaj grenspecojn de mallonga kresk-periodo kaj forta frostrezisteco, la liberigitaj servutuloj de Phagri interŝanĝis 20 specojn de ĉinko kun aliaj lokoj, kaj faris provsemadon en malsamaj tempoj. Iuj esperis ke ĉinko maturiĝu rapide kaj sterkis multe. Tio kaŭzis troan kreskadon de la plantoj kaj longigis la maturiĝon. Por eviti la prujan froston oni starigis multajn fumturojn por rezisti prujnon, sed kiam la turoj eligis fumon, la prujno jam kovris la teron, kaj jam estis tro malfrue. Spertinte la malsukceson la phagri-anoj sorbis utilajn instruojn, ili iom post iom trovis a ĝustan tempon por semado, specojn de plantoj kultureblajn en Phagri kaj kaŭzon en la malsukceso de prujno-rezisto.

## KONKERO SUPER PRUJNA FROSTO

Estas interese rememori la procedon de kulturo de grenoj.

En Phagri estas fame konata meteorologia grupo kun 6 membroj. El ĝiaj membroj la plej juna estas pli ol 50-jara kaj la plej aĝa, 78-jara. Por rezisti prujan froston ili observis la meteorologion ĉiunokte sur domsupro dum la kreskanta periodo de la plantoj. Ektrivinte la simptonon de prujno ili tuj sonigis tamtamojn kaj tamburojn por averto. Aŭdinte la averton oni tuj sin ĵetis en agadon, post ne longe el centoj da fumturoj leviĝis fumo, kiuj formis fumkurtenon super la tero kaj bone ŝirmis la plantojn. En la grupo la 78-

jara aĝulo Palpar Gjalpo donis grandan kontribuon. En la pasinteco li estis pia kredanto de lamaismo, eĉ pro kapdoloro li petis lamaon citi por li sutron, nun lia superstiĉo malpliĝis kaj ellernis fari iujn meteorologiajn observojn. Dum la prujna periodo li starigis sian tendon sur la tegmento, ju pli malvarme, des pli atenta lia observo. Li diris: "Mi kredis al la dio kelkdek jarojn kaj suferis de la malsato kelkdek jarojn. Hodiaŭ la malnova sistemo estas renversita, kaj sufiĉas mia nutraĵo. Tio kredigis min ke la feliĉa vivo devas esti kreita de ni mem."

## ALKONDUKI NEĜAKVON

La prujnrezisto estas serioza batalo, la solvo de akvomanko estas pli malfacila. La loĝantoj devis dorsporti eĉ trinkakvon de deklivo, nun por kulturi plantojn, la akvokondukado por irigacio fariĝis nepre solvenda problemo. De kie la akvo venos? La liberigitaj servutuloj volis vivi ne pere de la natura favoro, ili decidis fosi kanalon sur neĝa monto malproksime 10 km. kaj alkonduki neĝakvon por irigacio.

Estis malvarmega vintro, frosta vento estis pika kaj penetra, la tero glaciiginta estis malmola kiel cemento. Post kelkdek hakoĵoj oni ankoraŭ ne povis fosi kaveton. Sed tiu kanalo longas 10 km., kaj ĉe iuj lokoj de la kanalo oni devis fosi profunden ĝis 6-7 m. La persistemaj phagri-anoj ekbruligis amasojn da fajroj por degeligi frostigitan teron tavolon post tavolo, kaj fosis la degeligitan teron parcelon post parcelo. Post kiam 5-600 homoj pene laboris pli ol 40 tagojn, fine la neĝakvo estis alkondukita de sur la neĝa monto. Eĉ hodiaŭ, kiam la phagri-anoj parolas pri scenoj de la tiama laboro, iliaj brovoj leviĝas kaj la vizaĝoj estas ĉirkaŭitaj. Ili diras: "Nokte fajra drako movetis ĉe duonmonto, kaj tage ĉie flirtis ruĝaj flagoj sur la montodeklivo, ĉie pioĉoj dancis kaj flugis, la energio de la homoj estis vere forta!"

\* \* \*

Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio ideologie liberigitaj de la tradicio, la phagri-anoj vivantaj sur la tegmento de la mondo akiris sukcesojn, kiujn oni eĉ ne kuraĝis imagi en la pasinteco.

# Ore Flagras la Penso de Maŭ Zedong, Ĉie Estas Bela Sceno de Aŭtuna Rikolto

Dank' al studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, multe altiĝis la politika konscio de la anoj de la Ruĝflaga Popola Komunumo en antaŭurbo de Ĉengdu; ili unuanime unuiĝinte venkis naturan katastrofon kaj akiris bonan rikolton.







Sub la kuraĝigo de la granda proleta kultura revolucio, la vastaj amasoj de kadroj kaj membroj de popolaj komunumoj de Gajhian, Liaŭning-provinco, kolektas entuziasme la abundajn aŭtunajn rikoltaĵojn.

La popolo de Haj-an, Giangsu-provinco, ĉerpis senfinan forton el verkoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj akiris altan rikolton de grenoj kaj kotono.



## POST LA KURSO

Vortoj kun "\*" estas klarig-itaj en "Nia Vortareto"

### Nofhan: Letero al Malproksimaj Amikoj (XIII)

# TIAN-ANMEN-POR KAJ TIAN-ANMEN-

Karaj geamikoj,

La 1-a de oktobro, ĉi-jare, estis la 17-a dat-reveno de la fond-iĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Ĉiu-jare, en tiu grandioza festotago Tian-anmen-pordego kaj Tian-anmen-placo\* en Pekino estas la centro de celebrado\* de la Nacia Festotago de Ĉinio. Permesu al mi iom skribi pri ili.

La 1-an de oktobro antaŭ 17 jaroj, Prezidanto Maŭ Zedong, granda gvidanto de nia popolo, solene proklamis\* al la tuta mondo sur la Tian-anmen-pordego, Pekino, la fondiĝon de Ĉina Popola Respubliko. Ekde tiu tempo, Tian-anmen-pordego kaj Tian-anmen-placo, kiu kuŝas antaŭ ĝi, fariĝis loko, kiu tiras al si la koron de la popolo de la lando kaj tiun de la revoluciaj popoloj de la mondo. Ĉiam kiam estas grandaj festotagoj de la lando aŭ okazas gravaj amas-kunvenoj, la popolo de la tuta lando aŭskultas grandajn al-vokojn diritajn de gvidantoj de la Partio kaj

ŝtato de sur la Pordego kaj grandan voĉon de la vasta popol-amaso aŭdigitan el la Placo. Kiam popolanjoj de diversaj\* naci-ecoj de nia lando venis en Pekinon, ili ĉiuj pilgrimas\* al la loko kun sen-lima respekto; ankaŭ ĉiuj fremdaj amikoj, kiuj vizitis Pekinon, sen-escepte venis al tiu loko tiom kor-tira por la revoluciaj popoloj de la mondo.

La impone granda Tian-anmen-pordego estas konstru-ajo kun historio de pli ol kvincent jaroj. Kun la supra pavilono\*, kiu sidas sur la ruĝa mur-ego, ĝi estas 33.7 metrojn alta. Sur la muro ambaŭflanke de la Pordego troviĝas du grandaj sloganoj\*: "Vivu la Ĉina Popola Respubliko!" "Vivu la Granda Unuiĝo de la Monda Popolo!". Inter ili pendas granda portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Antaŭ la Pordego kuŝas vico da pontoj\* el blankaj ŝtonoj super la Or-akva Rivereto, trans kiu kuŝas en direkto orienta-okcidenta strato 80 metrojn

larĝa, sur kiu povas marŝi homoj vic-ig-itaj en 150 kolonoj, unu apud alia. Sude trans la strato kuŝas Tian-anmen-placo.

La nuna Placo estis pli-vast-ig-ita en 1959. Ĝia areo\* ampleksas 400,000 kvadratajn\* metrojn. Okcidente de ĝi impone staras la granda Popola Halo\*, kaj oriente estas Muzeo de Ĉina Revolucio kaj Muzeo de Ĉina Historio. En ĝia suda flanko dense staras verdaj pinoj\*, post kiuj oni vidas Kianmen-pordegon, en la mezo de la Placo staras la Monumento\* de Popolaj Herooj, 37 metrojn alta, sur kiu gravur-iĝis\* la man-skribaĵo de Prezidanto Maŭ: "Sen-mortaj Estas la Popolaj Herooj!". Ĝongŝan-parko kaj la Kultura Palaco de Laboranta Popolo lokiĝas ambaŭ-flanke de Tian-anmen-pordego. Antaŭ ili, sur la norda kaj suda bordoj de la Orakva Rivereto troviĝas dek ses multŝtupaj terasoj\*, kiuj povas en-teni kune dekmilojn da personoj. Rigardante ĉirkaŭen de la Placo,





# DEGO PLACO

oni estas imponata de ĝia grandeco, vasteco kaj majesteco\*.

Popolo de Pekino kaj re-prezidentoj, aktivuloj de studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, progresintaj laborantoj, labor-modeloj\* kaj batal-herooj\* el diversaj naciecoj kaj regionoj de la lando ĉiujare venas ĉi tien pasigi kun ĝojo la Nacian Fest-tagon kaj raportoj al nia amata gvidanto, Prezidanto Maŭ, kaj la Partio pri la sukcesoj atingitaj sur sia posteno. Dum granda festa marŝado, per la plen-voĉaj krioj "vivu Prezidanto Maŭ!" kaj "vivu la Komunista Partio de Ĉinio!" oni manifestas ĉitie sian varman amon al Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio. Ĉi tie oni ofte ankaŭ festas la "Unuan de Majo" aŭ okazigas grandajn amaskunvenojn por sub-teni divers-landajn popolojn de la mondo en ilia batalo kontraŭ imperi-ismo, kaj aŭdigis justan voĉon de subteno al la bataloj de la fratoj en Vjetnamio, de la popoloj en Kongolando(L.), Dominiko, Pa-




*Tian-anmen-pordego*

namo, de la usonaj negroj\* ktp.

De kiam la granda proleta kultura revolucio komencis ŝtorme disvolviĝi en nia lando, milionoj da revoluciaj instruistoj, lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj venis al Pekino el diversaj lokoj de la lando por fari revolucion interkontakton, ili plurfoje kunvenis sur Tian-anmen-placo por esti akceptataj de Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto. Tiuj junaj revoluciuloj kun tiel granda emocio vidis persone la plej plej amatan Prezidanton Maŭ, al kiu ili sopiris en tago kaj en nokto, ke ili kun varmaj larmoj svingis siajn brakojn kun la ruĝkovrilaj libretoj *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* en la manoj kaj senpaŭze kriegis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu

Prezidanto Maŭ!" "Vivu Prezidanto Maŭ!"... La tuta placo fariĝis ruĝa maro kun ondanta entuziasmo kaj impona majesteco!

Ankaŭ amikoj el diversaj landoj de la mondo venas ĉiujare al tiu ĉi loko por celebri festojn kaj partopreni kunvenojn kune kun ni. Inter ili troviĝas gvidantoj el niaj frataj kaj amikaj landoj, delegitar-oj por amik-eco el diversaj landoj kaj revoluciaj gejunuloj, kiuj, tra-pasinte multajn malhelpojn, venis trans oceanoj\* por lerni en Ĉinio. Ĉi-jare venis por festi nian nacian feston famaj kontraŭimperiismaj revoluciaj batalantoj kaj aliaj fremdlandaj amikoj el la kvin kontinentoj de la mondo. Kune kun la ĉina popolo ili ĝojkriis ĉi tie pro sia amo al Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong, pro la sukcesoj en la granda proleta kultura revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio. Krome, ili ankaŭ kune aŭdigis sian indignan voĉon por oponi la modernan reviziismon kun la gvidantaro de KPSU kiel ĝia centro kaj por subteni la liberigajn batalojn de la subprem-ataj popoloj kaj nacioj kaj riproĉi la sovaĝajn perform-ajojn de la usona imperiismo. Tiuj voĉoj el Pekino estas la voĉoj de la revoluciaj popoloj de la mondo, kiu volas ĝis-funde detruigi la malnovan mondon kaj krei tute novan mondon revolucion.



*Tian-anmen-placo*

## KONDAMNI USONAN RABISTON AL MORTO

La suno estis subiranta okcidenten. Taĉment-estro T kun du gerilanoj el gerila taĉmento de suda Vjetnamio venis la trian fojon al Pho Trach-bazaro, grava komunikejo inter Hue kaj Quang Tri. Ĉifoje ili venis por plenumi specialan taskon: kondamni al morto surloke la leŭtenantkolonelon-komandanton de usona armeo, kiu faris multe da sangaj krimoj kontraŭ la vjetnama popolo.

En la bazaro aro kaj aro da pupaj oficiroj kaj soldatoj manĝegis kaj drinkis en bufedoj kaj drinkejoj. Ili insultis kaj kriaĉis, kaj ĉie regis granda haoso.

Taĉment-estro T kaj liaj kunuloj traserĉis ĉirkaŭe per la okuloj. Kiam ili atingis la ekstremon de la bazaro, subite aŭdiĝis krio el angulo: "Kiu? Haltu!"

"Pro kio kriaĉi! Vi gardstaras tie, ĉu ne?" Aplombe respondante, taĉment-estro T eniris butikon kun la gerilanoj, aĉetis paketon da cigaredoj kaj ekfumis. La pupa soldato prenis lin por "oficiro", akompanata de "gvardianoj", kaj ne kuraĝis plue demandi. Ili restadis dum momento kaj sekure forlasis la butikon. Ili longe atendis, sed tiu usona leŭtenant-kolonelo ankoraŭ ne venis. Unu el la gerilanoj proponis: "Ni mortpafos tiun pupan oficiro, se tiu usonaĉo ne venos ĉivespere!" Post momenta meditado taĉment-estro T diris: "Ni ne devas esti tro malpaciencaj. Mortpafi tiun usonan leŭtenant-kolonelon estas pli grave ol mortigi kelkdek pupajn soldatojn. Li faris tro multe da krimoj, ni ne devas lin indulgi! Ni nepre kondamnos lin al morto, kaj se li ne venos hodiaŭ, ni atendos ĝis morgaŭ, postmorgaŭ."

Apenaŭ fininte la interparolon, ili vidis, ke ĵipo algalopis kaj haltis antaŭ drinkejo. El ĝi eliris du pupaj oficiroj kaj eniris la drinkejon. Tiu usona leŭtenant-kolonelo ankoraŭ

restis sidanta arogante en la ĵipo, fumante cigaredon. Taĉment-estro T donis signojn por ke la du gerilanoj ekagu laŭ la antaŭe fiksita plano. Li mem paŝis el la mallumo, kaj kiam li iris ĝis tri paŝoj for de la ĵipo, li subite blindigis la du okulojn de tiu usona leŭtenant-kolonelo per forta brilo de poŝlampo, ĵetante lin en konsternon. La du gerilanoj tuj levis la mitraletojn, alpafis kaj mortigis tiun usonan rabiston tuj surloke.

La pupaj oficiroj kaj soldatoj en la bazaro rapide diskuris por savi sian vivon, kaj la malamikoj ĉe la reduto ankaŭ sendis konsternite la porsavan signalon. Sed kiam amaso da malamikaj soldatoj atingis tien, taĉment-estro T kaj la du gerilanoj jam tute malaperis.

### Humorajo

#### DIALOGO INTER DU USONAJ SOLDATOJ

*Unu el viaj kruroj perdiĝis,  
kaj rompiĝis mia brako pro eksplodigo.*

*Nun ni restos en la hospitalo,  
Pli gaje vivos ol en barako.*

*"Eksplodigita estis nia barako  
neatendite,*

*Sekve oni suferas de timo tage  
kaj nokte."*

*"Mi timas, ke ne estos sekure eĉ  
en hospitalo.*

*Ĉu ne povas esti, ke mi mortos  
sub operacio?"*

*Ĉi tiuj du usonaj fisoldatoj venis  
Al pordo de hospitalo en Sajgono,  
Ekaŭdis, ke ĝi estis "plene okupita",*

*ne povis sin deteni de plenda ĝemado.*

*"Ho ve, estiĝis eksplodo dum  
dormo kaj pafado sur vojo,*

*Ni, vunditaj, ne povas resti en hospitalo."*

*"Mi ne povas daŭre vivi,*


*Estus pli bone fari krucon por mia  
tombo."*

*Kiu imagis, la estro de la kadavrejo  
estas ĝuste apude,*

*Kaj tiu ĉi lasta koleriĝis ekaŭskultinte.*

*"Sinjoroj, ne ŝovu tien vian nazon,  
Ni jam estis tro okupitaj por ente-*

*rigi kadavrojn."*



### Nia Vortareto

**are-o** — ter-spaco inter difinitaj limoj  
**celebr-i** — plen-umi festan ceremonion

**divers-a** — malsam-speca  
**gravur-i** — desegni per ŝtala pinta ilo sur malmolaĵo

**hal-o** — ĉambrego

**hero-o** — homo nobla pro sia kuraĝo aŭ talento

**kvadrat-a** — kvar-angulo kun rektaj anguloj kaj egalaj flankoj

**majesta** — impone estiganta admiran respekton

**model-o** — io farita por esti imitata, io imitinda

**monumento** — memoriga konstruaĵo

**negro** — nigrulo

**ocean-o** — maro disiganta kontinentojn

**pavilon-o** — konstruaĵo altiganta super tegmento de la ceteraj partoj

**pilgrimi** — respekto viziti sanktan lokon

**pin-o** — ĉiamverda arbo kun kudrilaj folioj (pinus)

**placo** — libera spaco

**pont-o** — konstruaĵo ebliganta trairon de rivero

**proklami** — oficiale kaj publike anonci

**slogan-o** — mallonga frazo por propagando

**teras-o** — ejo por ĝui bel-vidon





## Kultura Vivo


### INVITA TURNIRO DE PEZLEVADO DE NOVE LEVIĜINTAJ FORTOJ

Tiu pezleva turniro por 1966 solene okazis de la 20-a ĝis la 24-a de majo en Pekino.

La Turniron partoprenis pezlevaj delegacioj kaj observantoj el 12 landoj kaj regionoj de Albanio, Japanio, Kamboĝo k.c., kiuj venis al Pekino spite al la minacoj kaj malhelpoj de la usona imperiismo, nova kaj malnova koloniismo kaj iliaj lakeoj.

Dum kvin tagoj, en la ok-kategoria turniro 18 sportistoj el kvar landoj rompis 44-foje en 19 eroj la rekordojn de la Unua Sportkunveno de la Novleviĝintaj Fortoj. Inter la rekordrompintoj estas du ĉinaj sportistoj, kiuj rompis trifoje du mondajn rekordojn kaj atingis egalecon al unu mondrekordo. La aliaj sportistoj atingis ankaŭ bonajn rezultojn en sia sporto.


Dum konkursado, la sportistoj intersanĝis spertojn pri pezlevado kaj kreis inter si intiman amikecon.



*Ĉina pezleva sportisto de malpeza pezklaso Deng Guojin sukcesis puŝlevi 145.5 kilogramojn kaj rompis la mondan rekordon de 145 kg. tenatan de la sovetunia sportisto E. Kacura.*

### BILDA EKSPOZICIO: "LA VJETNAMA POPOLO NEPRE VENKOS LA USONAN IMPERIISMON"

Inaŭguriĝis la 25-an de julio en Pekina Ekspoziciejo la ekspozicio de bildoj sub la nomo: "La Vjetnama Popolo Nepre Venkos la Usonan Imperiismon". Ĝi estis kune organizita de la Komisiono por Kulturaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj de la Ĉina Popola Respubliko, Ĉina-Vjetnama Amikeca Asocio kaj la Ĉina Popola Komitato por Monda Paco.



*Unu el la trupoj de la Sudvjetnama Liberiga Armeo kreskas kaj potencigas dum la popola milito.*

La ekspozicio konsistis el sep partoj kaj elmontris proksimume 200 bildojn.

Enirante la ekspozicejon, oni tuj vidis la vortojn de Prezidanto Maŭ: "La usona imperiismo kaj diverslandaj reakciuloj ĉiuj estas paperaj tigroj. Tion pruvis la batalado de la ĉina popolo. Kaj tion pruvas nun la batalado de la vjetnama popolo." La tuta ekspozicio vive montris la grandajn venkojn, kiujn gajnis la vjetnama popolo en sia heroa batalado, pruvante ke la usona imperiismo estas papera tigo.

### LA DUA "ŜENJANG-A MUZIKA SEMAJNO"

De la unua de julio, en la urbo Ŝenjang, okazis la grandioza dua "Ŝenjang-a Muzika Semajno", per kio oni festis la naskiĝtagon de la Partio kaj aktive partoprenis en la granda proleta kultura revolucio. El pli ol 4,000 partoprenantoj de la muzikoplenumado plejparte estis amatoraj artistoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj el diversaj lokoj de la tuta provinco. Multaj el ili estis labor-modeloj, avangardaj produktantoj, batalantoj kun kvin bonoj kaj aktivuloj en studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Kun alta revolucia temperamento ili prikantis la grandan Komunistan Partion de Ĉinio, la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ kaj la grandan penson de Maŭ Zedong.

En ĉi-foja Muzika Semajno oni aranĝis tri specialajn koncertojn por laboristoj, du por armeanoj, po unu por kamparanoj kaj infanoj kaj krome koncertojn kun specialaj temoj, kiaj "Vivu la venko de la penso de Maŭ Zedong", "Versaĵoj de Prezidanto Maŭ" k. a. La amatoraj artistoj ankaŭ iris pogrupo en fabrikojn, kamparanojn kaj kazernojn por ludi malgrandajn koncertojn.

En la tuta Muzika Semajno, la Oficista kaj Laborista Postlabora Ensemblo sume prezentis ĉ. 200 programerojn de muziko, danco, kantoj kaj aliaj ludoj.

# Inter Ni

## ĈIAM PROPAGANDI PRI ĈINIO

Karaj amikoj de la Ĉina Popola Respubliko, mi certigas vin, ke ankaŭ estonte mi daŭros propagandi al niaj gekonatumoj kaj amikoj viajn socialismajn sukcesojn pri tekniko, kulturo kaj precipe pri luma, brila kaj feliĉa vivo de la ĉina popolo kiu marŝas ĉiam antaŭen sur socialisma kaj prava vojo sub la Ruĝa Standardo de la Komunista Partio de Ĉinio laŭ la instruado de Prezidanto Maŭ Zedong.

J. B. K. (Rumanio)

## ĜOJEGO PRO LA LIBERIĜO DE ĈINIO

Ni tre bone scias kio estas la pasinto de via lando, t. e., kiel la kapitalismo de diversaj landoj dronigis la ĉinan laboristaron en mizerigon, por eltiri de la lando la plej eblajn avantaĝojn, kaj ke dank' al la gvido de la Komunista Partio, oni sukcesis liberigi la landon el la ekspluatado de la kapitalismo, kaj samtempe permesi al la milionoj da ĉinaj laboristoj havi liberecon kaj feliĉon. Fakte mi tre bone komprenas vian nunan situacion, kaj ĝojan laboradon je nuntempa kaj estonta plibonigo de via propra vivo...

La liberiĝo de via lando el jugo de la kapitalismo estis por mi ĝojego, same kiel estis por mi la liberiĝo de Rusio en 1917, gvidata de nia estimata kamarado Lenin.

C. J. (Francio)

## KONDAMNO KONTRAŬ LA USONAJ AGRESANTOJ

Mi multe ĝojas ke multaj popoloj nun staras por kondamno kontraŭ la agresado de la usonaj agresantoj en Vjetnamio. Ankaŭ en Usono la popolo mem nun parolas kaj

agas pri ĝi. Mi ofte pensas — "Bataladu, karaj vjetnamaj kamaradoj, kontraŭ la usonanoj kaj la pupaj lakeoj en Sajgono, ĉar multaj popoloj staras kun vi. Vivu Ho Chi Minh!  
B. F. R. (Britio)

## AŬSTRALIAJ LABORISTOJ PROTESTAS KONTRAŬ LA AGRESA MILITO EN VJETNAMIO

La dua kajero de "Certe Triumfos la Popolo de Vjetnamio! Certe Malvenkos la Usonaj Agresantoj!" estas eĉ pli interesa kaj eduka. La vero montriĝas en la vizito de la usona vic-prezidanto al Aŭstralio: Post tiu vizito, ni vidas ke multaj soldatoj de Aŭstralio estos senditaj al Vjetnamio je la ordonoj de la usonaj mastroj.

Ni ankaŭ rimarkis ke la aŭstralia laboristaro ne restas kvieta tiurilate, kaj multaj protestas kontraŭ la agresita milito en Vjetnamio kiun neas kaj Aŭstralio kaj Usono, dume ili murdadas ĉiutage la pacajn polanojn en Vjetnamio.

S. D. (Aŭstralio)

## KONTENTA PRI LA ENHAVO DE EPĈ

Mi estas tre kontenta pri la enhavo, precipe pri la bildoj kiuj montras la novan vivon de la Ĉina Popola Respubliko, ankaŭ pri la literaturaĵoj kaj poemoj kiuj respegulas la heroan batalon de la ĉina popolo.

Tre efika estas ankaŭ la aparta kajero kiel dokumentaro pri la heroa batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo.

Mi povas diri ke ankaŭ estis tre kontentaj ĉiuj al kiuj mi montris Vian gazeton. Tre kontentigaj estas la preseja tekniko, la kvalito de papero, same tiel la kolorigo.

M. P. (ĈSSR)



人民中國報道

Dumonata gazeto eldonata de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 6 (101) 1966**

## Ĉefa Enhavo

Kamarado Maŭ Zedong en la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio (foto)

Decido de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio

Komuniko de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio

CK de Ĉina Kompartio Decidis Eldoni Grandkvante la Verkojn de Prezidanto Maŭ

La Brilo de la Penso de Maŭ Zedong Lumigas la Tutan Mondon

La Popolo de Nia Lando Okazigis Grandegajn Mitingojn kaj Manifestaciojn por Plej Firme kaj Plej Entuziasme Subteni la Vjetnaman Popolon Konduki la Nacisavan Batalon kontraŭ la Usona Imperiismo ĝis la Fino

Prezidanto Ho Chi Minh Publikis "Alvokon"

Ĉinio Pretas en Ĉiu Ajn Tempo Alpreni Ĉiujn Necesajn Paŝojn por Helpi Vjetnamion en Ĝia Batalo kontraŭ Usona Imperiismo ĝis la Fino

Nia Registaro Publikis Deklaron por Plejforte Kondamni la Usonian Imperiismon pro Ĝia Senskrupula kaj Sinsekva Bombado al Hanojo kaj Hajfongo

Sur la kovrilo — Survoje de persekutado al Huang Ŝjen, Daĉun renkontis "blankharan knabinon" en kaverno.

Sur la dorskovrilo — En la brila festotago, la junpioniroj torente ekfluas al Tian-anmen-placo krian-te: "Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!" "Vivu Prezidanto Maŭ!"





La ruĝaj gvardianoj —revoluciaj junuloj, plenaj de ardanta revolucio, varme huraas kaj salutas al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kun firma decido ĉiam sekvi Prezidanton Maŭ kaj antaŭeniri tra ventegoj kaj ondegoj. (*supre*)



La junaj revoluciuloj de la ĉefurbo senlime amas la Partion kaj Prezidanton Maŭ. Ili varmege huraas kaj ĵuras, ke ili kondukos la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino. (*malsupre*)

